

Aktoj de la kolokvo

Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj “

**19-a kaj 20-a de oktobro 2007
en Vieno**

Redaktis Detlev Blanke

Rotterdam

Universala Esperanto-Asocio

2009

Aktoj de la kolokvo

Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj “

**19-a kaj 20-a de oktobro 2007
en Vieno**

Redaktis Detlev Blanke

Rotterdam

Universala Esperanto-Asocio

2009

Enhavo

<i>Detlev Blanke</i>	Antaurimarkoj	7
<i>Herbert Mayer</i>	Tradicia biblioteko kaj novaj defioj: La Kolekto por Planlingvoj de la Austria Nacia Biblioteko	9
<i>Detlev Blanke</i>	Bibliotekoj kaj arkivoj kelkaj problemoj.....	13
<i>Utho Maier / Karl-Heinz Schaeffer</i>	La stato de la 100-jara Germana Esperanto-Biblioteko Aalen en la jaro 2008 Historio kaj perspektivoj	35
<i>Christian Cimpa</i>	Modernaj teknikoj en la servo de la Esperantokulturo: Bildarchiv Austria	49
<i>Árpád Máthé</i>	Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto	53
<i>Reinhard Haupenthal</i>	La plan-lingvo Volapük en arkivoj kaj bibliotekoj	57
<i>Miroslav Malovec</i>	Esperanto-bibliotekoj en Ĉeĥio kaj disponigo de libroj per elektronikigo.	71
<i>Marek Blahuš</i>	Propono pri starigo de interreta superkatalogo kaj cifereca arĥivo de Esperanto-literaturo	75
<i>Barbara Pietrzak</i>	Esperantlingvaj arkivaĵoj de Pola Radio	79
Autoroj		83

Antaurimarkoj

La Internacia Lingvo nun agas pli ol 120 jarojn. El projekto farigis vivanta lingvo. Grava, eventuale la plej grava, parto de tiu vivo reflektigas kaj konservigas en skriba formo, kiu cefe aperas kiel presajoj tra la jardekoj. La multegaj revuoj, bultenoj, libroj, broŝuroj, aliaj paperformaj materialoj, sed ankaŭ aliaj registraj materialoj (sonbendoj, filmoj, fotoj, elektronikaj dosieroj k.s.) troviĝas en certaj bibliotekoj, arkivoj kaj muzeoj, ne laste en la domoj de privataj kolektantoj.

Parolante pri planlingvaj bibliotekoj ni konsciu, ke krom Esperanto kun la cefa parto ankaŭ aliaj planlingvaj sistemoj donis konsiderindan kontribuon al tio, ke entute la ideo pri universala lingvo farigis reale funkcia.

Ne estas klare, ĉu la movadoj pri internacia lingvo ciam konscias pri la grandaj trezoroj, kiuj amasiĝis dum pli ol jarcento. Tro ofte oni pensas nur en kategorioj de la nuntempo. Cetere, ne sufiĉas konscii pri la valoro de la pasintepokaj trezoroj aŭ pri la lastatempaj publicadoj. Kiel montras la historio, la danĝero pri detruoj kaj perdoj daŭre ekzistas. Do, oni devas agi, por povi sekure kaj kiom eble plej komplete transdoni la tre specifan spiritan heredaĵon al la estontaj generacioj, por ke ili lernu el niaj atingoj kaj eraroj kaj ne reinventu la radon. Tio estas pli facile dirite ol farite. Jam por fakulo estas malfacile orientiĝi en la abundo de la ekzistanta materialo. Sed des pli tio validas por novuloj. Do, necesas iom pli sisteme ol ĝis nun aliri la temon de niaj bibliotekoj kaj arkivoj.

La temo ja ne estas tute nova. Jen kaj jen aperis artikoloj en la esperanta gazetaro, eble eĉ foje iĉ okazis seminarieto. Tamen nur dum la lastaj jaroj pli kaj pli ofte oni parolis pri la sorto de niaj bibliotekoj kaj (multe malpli) pri arkivoj. Evidente maturiĝis la tempo por entrepreni novajn paŝojn kaj okazigi internacian kolokvon. Ĝi okazis la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 en la Austria Nacia Biblioteko (ANB, Österreichische Nationalbibliothek, ÖNB) sub la kadra titolo Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj. Viena sendube estis la gusta loko por tia arango. Mi ne konas pli bonan por trakti la temon. Ja estas konate, ke ANB disponas pri unika kolekto de planlingvaj materialoj, nome la Sammlung für Plansprachen (Kolekto por Planlingvoj). Al ĝi estas ligita kiel memstara unuo la internacie konata Esperantomuzeo de ANB (tradicie nomita Internacia Esperanto-Muzeo). Ĉio ĉi nun troviĝas en modernaj salonoj kaj estas administrata kaj flegata de profesia teamo sub gvido de la direktoro Herbert Mayer.

Ĉi tiun kolokvon sekvis relative senpere dua arango pri tema: De 23-a ĝis 25-a de novembro 2007 la 17-a konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL, Societo pri Interlingvistiko) en Berlino traktis la kadran temon Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj. Inter la 40 partoprenantoj ankaŭ troviĝis tri personoj, kiuj estis partoprenintaj la vian kolokvon. Tiel la rezultoj de la kolokvo estis pludonitaj al la arango en Berlino kaj eble jen kaj jen povis aldoni kromajn vidpunktojn. Prelegis Herbert Mayer pri la novaj defioj antaŭ la planlingvaj bibliotekoj, Marek Blahu prezentis siajn ideojn pri cifereca superkatalogo kaj mi mem faris ĝeneralan enkondukon al la kadra temo. La aktoj intertempe aperis¹. Ĉiuj prelegoj estis registritaj sur DVD-disko. Espereble ĉi tiu volumo kaj la aktoj de GIL helpas plifortigi la konscion, ke estonte oni devos dediĉi multe pli da energio, intelekto kaj financoj al niaj bibliotekoj kaj arkivoj.

Certa signalo en la ĝustan direkton estis la fakto, ke kadre de la 93-a Universala Kongreso de Esperanto (19.-26. Julio 2008, Roterdamo) Herbert Mayer faris du bone vizititajn prelegojn, kie li prezentis la planlingvan kolekton kaj la Esperanto-Muzeon de ANB kaj aparte elstarigis la defiojn de novaj teknologioj, aspektoj, kiuj ankaŭ ludis rolon en kelkaj prelegoj de la viana kolokvo kaj de la konferenco de GIL.

¹ Blanke, Detlev (2008, Red.): Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2007, in Berlin. *Interlinguistische Informationen, Beiheft 15*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 157 p.

Ci tiu volumo entenas la prelegojn de ciuj kontribuintoj kun du esceptoj. Malgrau multaj petoj miaj kaj ricevataj promesoj liaj bedaŭrinde ne eblis akiri la tekston de la prelego de Ljubomir Trifoncovski el Bulgario (lia temo estis L'ŝa biblioteko ĉu nur deponejoj?)“Ankau Toon Witkam prezentis interesan prelegon (Provlegado post skanado Homo kaj teknologio).” Sed jam antaŭ la kolokvo li informis, ke li ne liveros tekston, des pli, car jam aperis du similenhavaĵoj studoj de li aliloke.²

Kelkajn vortojn pri miaj redaktaj principoj:

Mi klopodis arangi la tekstojn laŭ certa modelo, se necese elstarigis capitrajn kaj subcapitrajn titolojn. Antaŭ la cefan tekston mi metis enhavtabelon, car tio ebligas al la leganto iom rapide orientigi pri tio, kion li/si povus atendi de la kontribuo. Mi nur malmulte intervenis en la tekstojn, faris tion nur, se necesis forigi iujn stilajn malglatatojn aŭ elsarki iujn erarojn. Mi ne unuecigis la malsaman lingvo-uzon de kelkaj aŭtoroj, ekz. ciferecigi/digitizi, komputilo/komputoro.

Antaŭ la finredakto ĉiuj kontribuinto havis la eblon ankoraŭfoje trarigardi sian tekston.

Kompreneble ne eblis normigi la sinprezentadojn de la aŭtoroj. Ĉi-rilate mi donis certan modelon kaj poste tolereme akceptis la finan rezulton.

Provlegado la senerarigon grave helpis en la Centra Oficejo Rob Moerbeek. La enpagigon faris Roy McCoy. Al ambau ni ŝuldas dankon.

La apero de la volumo iom malfruas, car diversaj kontribuoj nur venis post kelkaj admonoj. Krom tio mi havis iujn prioritatojn, kiuj malhelpis la pli fruan finredakton de la materialo, kiu tamen ne malaktualigas. Mi mem iom plivastigis mian temon kaj ne limigis min, kiel en la prezentita prelego, nur al la arkivoj.

La kolokvon en Vieno partoprenis 30 personoj el 8 landoj. Flanke de UEA ĝi estis taksata aparte grava, kion pruvas la partopreno de la vicprezidantino Claude Nourmont, la ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak kaj la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller.

Pri la aranĝoj informis kelkaj fakaj bultenoj, revuoj kaj gazetoj³. Ankau la Esperanta redakcio de Pola Radio raportis.

Ce la fino restas substreki, ke la kolokvo estis modele organizita, okazis sub bonegaj teknikaj kondicoj kaj estis financita de ANB kun subteno de UEA. Restas do esprimi grandan dankon al ANB kaj al UEA, sed aparte al la cefa organizinto Herbert Mayer kun liaj gekolegoj.

Cetere, valoras reveni al Vieno ...

Berlin, decembro 2008

Detlev Blanke

² Witkam, Toon (2005): La ekscito de vortstatistiko: Kiel krudforma kunmet-analizo kompletigas tekstkontrolojn. En: Blanke, Detlev (Red.): Lingvaj kaj historiaj analizoj. Aktoj de la 28-a Esperantologia Konferenco en la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno 2005. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 23-46.

Witkam, Toon (2007): Automatische Morphemanalyse in Esperanto macht Komposita besser lesbar auf dem Bildschirm. En: Blanke, Detlev (Red.): Esperanto heute. Wie aus einem Projekt eine Sprache wurde. Beiträge der 16. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 1.-3. Dezember 2006 in Berlin. Berlin: GIL, p. 51-58.

³ Vidu i.a. Esperanto 1/2008, p. 4-6 (Claude Nourmont); Heroldo de Esperanto 14/2007, p. 1 (Ljubomir Trifoncovski), Zagreba Esperantisto 2/2008, p. 50-51 (redakcio); Informilo por Interlingvistoj, ĥ-ro 63(4/2007), p. 8-10, Interlinguistische Informationen ĥ-ro 64-65 (3-4/2007), p. 28-30 kaj Esperanto aktuell 6/2007, p. 14-15 (la tri lastaj de Detlev Blanke).

Tradicia biblioteko kaj novaj defioj: La Kolekto por Planlingvoj de la Austria Nacia Biblioteko

Enhavo

- 1 Enkonduke
- 2 La havajo
- 3 La historio
- 4 Projektoj de katalogado
- 4.1 TROVANTO
- 4.2 La bildarkivo
- 4.3 HANNA kaj PUKLIKO
- 5 La digitizaj projektoj
- 6 Konservado
- 7 Utiligado kaj servoj
- 8 Eldonado
- 9 La Muzeo

1 Enkonduke

La Esperantomuzeon kaj la Kolekton por Planlingvoj fondis en 1927 la austra fervojisto Hugo Steiner kiel asocion kun la nomo Internacia Esperantomuzeo en Wien. “Jam en 1928 gi farigis parto de la Austria Nacia Biblioteko (ANB) kaj estis malfermita dum stata soleno kun la partopreno de austriaj politikistoj kaj reprezentantoj de la internacia esperantistaro. Ekde la komenco la instituto ludis duoblan rolon: gi estis kaj estas samtempe muzeo kaj biblioteko. La muzeo sin limigas al la prezento de Esperanto, la biblioteko –kiu ricevis en 1990 la nomon Kolekto por Planlingvoj – kunigas generale la vastan gamon de internaciaj planlingvoj kaj artefaritaj lingvoj. Pere de pli ol 80-jara kolekta laboro la biblioteko farigis mondscale la plej ampleksa fakbiblioteko por interlingvistiko.

2 La havajo

35.000 volumoj, 2.500 titoloj de gazetoj kaj revuoj, 3.000 muzeaj objektoj, 2.000 autografoj kaj manuskriptoj, 23.000 fotoj, 1.100 afisoj kaj 40.000 flugfolioj. Estas kolektitaj 500 planlingvoj, inter kiuj la plej grava estas kompreneble Esperanto.

3 La historio

Post rapida kresko en la 1930-aj jaroj de la 20-a jarcento la Gestapo –post la anekso de Austrio fare de la nazioj –fermis la muzeon kaj la kolekton jam en marto 1938. Oni intencis transporti la havaĵojn al Berlino por krea biblioteko, kiu kunigu librojn nedeziratajn flanke de la nazioj. Sed la fakto, ke la kolekto estis en la posedo de Nacia Biblioteko savis ĝin. Pro tio en 1947 povis okazi la remalfermo.

En 2005 la tute novarangita muzeo kaj la kolekto translokigis al la palaco Mollard en la centro de Vieno (Herrengasse 9, 1010 Wien). Krom oferti al la vizitantoj kaj legantoj facilan aliron, la nova ejo estas ekipita per plej modernaj instalajoj, kiuj garantias sekurecon, idealan stokadon kaj konservadan flegadon de la dokumentoj kaj objektoj.

4 Projektoj de katalogado

La celo de tiuj projektoj estas la katalogado de la kompleta havaĵo de la kolekto kaj la muzeo per komputilaj rimedoj. Dum la katalogado okazas parte skanado de la objektoj aŭ dokumentoj kiel ekzemple en la kazo de la fotoj kaj ilia disponigo en interreto.

4.1 TROVANTO

TROVANTO estas la katalogo de la Kolekto por Planlingvoj kaj parto de la cefa katalogo de ANB. Ĝia lanco okazis en 1996, unue surbaze de la biblioteka sistemo Allegro, poste ni migrigis la datenojn al Aleph, la sistemo de la sciencaj bibliotekoj. La retrospektiva katalogado konkludigis en 2005, tiel ke la katalogo estas kompleta kaj daŭre aktualigata. En la nuna momento en ĝi troviĝas 39.000 rikordoj de libroj, broŝuroj kaj 2000 rikordoj de artikoloj el sciencaj gazetoj. La materialo koncernata estas precipe libroj, broŝuroj, revuoj, manuskriptoj kaj muzikaĵoj. TROVANTO estas atingebla en la interreto¹, la utiligitaj laborlingvoj estas laŭlace la germana kaj Esperanto.

4.2 La Bildarkivo

La **Bildarkivo Austria** (BA, Bildarchiv Austria)² estas unu el la katalogoj de la Bildarkivo de ANB. Ekde la komenco de 2007 ni kunlaboras en BA. Por tio ni skanas respektive fotos la 23.000 fotojn kaj 3.000 objektojn. La tiel produktitajn bilddokumentojn oni povas vidi kaj desuti en interreto. En la nuna momento estas videblaj 3160 fotoj kaj 910 objektoj en BA. La fakta nombro de dokumentoj prilaboritaj estas multe pli alta, ĉar ĉiu pro mankanta kvalito, ĉu pro autorrajtaj problemoj ĉu ĉiuj rikordoj eniras la reton. La utiligita laborlingvo estas la germana. Pro la fakto, ke Esperanto-arangojn ni dokumentas ankaŭ paralele en la originala lingvo (ekz. Universala Kongreso), oni povas trovi ankaŭ multon per serĉ-vortoj en Esperanto.

4.3 HANNA kaj PUKLIKO

HANNA –mallongigo de la germana **HAN**dschriften, **Nachlässe**, **Autographen** (manskribaĵoj, postlasaĵoj, autografoj)³ entenas la postlasaĵojn kaj arkivaĵojn en la posedo de ANB. Ekde 2008 ni katalogos en HANNA niajn antaŭ- kaj postlasaĵojn. Ni planas la konkludon de la retrospektiva prilaboro post tri jaroj, tiam trideko de Esperantaj postlasaĵoj estos konsulteblaj en tiu datumbanko. Laŭ la graveco kaj la amplekso estas speciale menciindaj la postlasaĵo de *Eugen Wüster* kaj la antaŭlasaĵo de *Manuel de Seabra*. HANNA entenas listigon de pulikaĵoj, gazetartikoloj, manuskriptoj, autografoj kaj vivo-dokumentoj de la post- kaj antaŭlasinto. La laborlingvoj de Hanna estas la germana, parte ankaŭ Esperanto.

¹ kp. http://aleph.onb.ac.at/F?func=file&file_name=login&local_base=ESPERANTO .

² kp. <http://www.bildarchivautria.at/default.aspx> . Pri la bildarkivo kp. la tekston de Christan Cimpa en tiu-ci volumo.

³ kp. http://aleph.onb.ac.at/F?func=file&file_name=login&local_base=ONB06

PUKLIKO entenas la rikordojn de la 1.100 afisoj de la kolekto. Tiu datumbanko ne estas en interreto kaj ni planas la transmigrigon al Bildarkivo Austria.

5 La digitizaj projektoj

ANB plenumas ampleksajn digitizajn projektojn, en kiuj partoprenas ankaŭ la Kolekto por Planlingvoj. Koncernataj estas la malnovaj gazetoj, Esperanto-inkunabloj kaj la sonarkivo.

5.1 100 Esperanto-inkunabloj estas ekde 2006 en la interreto. Temas pri ciuj Esperanto-libroj kaj broŝuroj de nia kolekto gis 1900⁴.

5.2 ANNO (AustriaN Newspapers Online) estas la virtuala legejo por ĵurnaloj de ANB. Ĝi entenas malnovajn aŭstriaĵn ĵurnalojn. Ekde 2008 oni povas legi ankaŭ dekduon da Esperanto-ĵurnaloj.⁵

5.3 La digitiza sonarkivo ampleksos en la unua fazo proksimume 80 horojn da historiaj sondokumentoj en Esperanto. La digitizo kaj disponigo de tiu materialo en interreto havos ankaŭ la gravan kromefikon, ke ĝi protektos kaj konservos la dokumentojn. Sonbendoj kaj kasedoj ne vivas eterne kaj materialaj transformoj malbonigas la kvaliton. La fino de la unua fazo de digitizo sur tiu tereno konkludigos en 2009.

6 Konservado

Grava tasko de ANB estas ne nur la disponigo de la dokumentoj al la publiko, sed ĉe en pli alta grado la savado de la kultura heredaĵo. Pro tio konservado estas esenca okupo ankaŭ de la Kolekto por Planlingvoj, kaj en ties plenumo subtenas nin la Instituto por Konservado de ANB, kiu regule kontrolas la tutan havadon de la kolekto kaj mezuras per automataj iloj la humidecon de la aero kaj la temperaturon en la librostokejo, legejo kaj muzeo. Oni protokolas kaj plibonigas ĉe plej etajn deviojn de la normoj.

La Instituto por Konservado transprenas ankaŭ la riparadon de damaĝitaj objektoj kaj dokumentoj. Tio gravas okaze de nov-akiro de malnova materialo, ekz. ĉe postlasaĵoj.

Grava punkto en la klopodo pri konservado estas protektado kontraŭ acido: Papero kaj aliaj materialoj enhavas tre ofte sufiĉe altan kvanton da diversaj acidoj, kiu ĉe la paso de la tempo - povas kaŭzi disfalon. Koncernataj estas printaĵoj kaj manuskriptoj, sed ankaŭ la ujoj, en kiuj oni gardas la dokumentojn -kovertoj, skatoloj ktp., kiuj povas transigi acidan substancon al la originaloj. Pro tio dum la lastaj jaroj ni metis 4.000 fotojn kaj 2.000 broŝurojn kaj manuskriptojn kaj 500 revuojn en novajn senacidajn kovertojn. La sufiĉe altaj kostoj pro tio pagas ANB. Tiu projekto de sistema transkovertigo daŭre plenumigos en la sekvaj jaroj.

7 Utiligado kaj servoj

La legokarto de ANB permesas la aliron al la kolekto laŭ la bibliotekaj reguloj. En normala kazo oni ricevas surloke la dokumentojn post mallonga tempo. Elpruntado eblas nur kun speciala

⁴ Kp. <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

⁵ Enretigo estas preparata.

permeso. Telepruntado eblas tra europaj universitataj bibliotekoj. Kompreneble oni ne povas elprunti rarajojn kaj unikajojn.

La legosalono funkcias regule dum 23 horoj en la semajno. Fakuloj helpas en la trovo de dokumentoj kaj donas informojn pri la funkcio kaj strukturo de la katalogoj.

La kunlaborantoj transprenas serclaborojn. Mallongaj serclaboroj estas senkostaj, por ampleksaj validas la tarifoj de ANB. Ankau kopiado kaj filmado eblas.

8 Eldonado

Ekde 2000 aperis 14 volumoj kun originalaj romanoj kaj rakontoj. Pro nova financa statuso de ANB ni cesis la produktadon kaj la rektan vendadon de libroj. La distribuo funkcios ekde 2008 ekskluzive tra Universala Esperanto-Asocio.

9 La Muzeo

La Esperantomuzeo de ANB montras per moderna muzea koncepto sur 80m² la esencajn aspektojn de la lingvo Esperanto. Interagaj komputiloj informas pri la Esperanto-movado kaj ĝia historio. Komputila ludo instruas la bazan Esperantogramatikon, kaj leciono de vidbenda kurso donas impreson pri la parolata Esperanto.

El la jaro 2006 pli ol 5.000 personoj vizitis la muzeon. Ekde 2008 ni planas la plilongigon de la deĵoro de la muzeo de 23 al 51 horoj semajne.

Bibliotekoj kaj arkivoj kelkaj problemoj¹

Enhavo

- 1 Enkonduko
- 2 Kolektoj: Bibliotekoj Arkivoj Muzeoj
- 3 Kelkaj bazaj postuloj: informi, sekurigi, flegi, kunlabori, prezenti enhavon, utiligi
- 3.1 Informi pri la ekzisto kaj situacio de la kolekto
- 3.2 Sekurigi la ekziston de la kolekto
- 3.2.1 Minacoj
- 3.2.2 Kion fari?
- 3.2.2.1 La unua paso: kolekti kaj deponi
- 3.2.2.2 Familia posedo
- 3.2.2.3 Esperanto-organizadoj
- 3.2.2.4 Lokaj komunumaj partneroj
- 3.2.2.5 Stataj partneroj
- 3.3 Flegado de la kolekto
- 3.4 Kunlaborado
- 3.4.1 Kunlaborado interna
- 3.4.2 Kunlaborado ekstera
- 3.5 Prezento de enhavo
- 3.6 Ebloj de utiligo de kolektoj
- 4 Kelkaj kriterioj por priskribi la kolektojn
- 5 Kion necesas fari?
- Mallongigoj
- Bibliografio

1 Enkonduko

Dum epokoj de drastaj politikaj kaj sociaj sangoj ekzistas grandaj minacoj, ke malaperos gravaj materialoj kaj kun ili la fiksitaj ekkonoj. Konatas, ke ekz. dum la du mondmilitoj grandamplekse detruigis gravaj bibliotekoj kaj arkivmaterialoj, krome ne malofte unikaj privataj kolektoj. Tiuj kaj aliaj militoj, revolucioj, persekutoj ks., grave damagis la Esperanto-movadon. Ankaŭ la trancaj sociaj perturboj dum la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento, kiuj decide sangis la mapon aparte de Eŭropo, krom aperigo de novaj sancoj ankaŭ havis negativan influon. Tio validas precipe por orienteŭropaj landoj, kie la lingvo antaŭe atingis konsiderindan disvastigon kaj enradikigon en la socioj de kelkaj landoj.²

Valorsangigoj, perdigo de intereso flanke de iamaj esperantistaj funkciuloj, manko de kompetentaj kaj laborpretaj personoj, financaj krizoj, politikaj malstabilecoj kaj aliaj faktoroj minacadas la pluekziston de gravaj materialoj.

Parolante pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj mi eliras de la fakto, ke pli ol 90% de la planlingva materialo koncernas Esperanton. Rilate al la materialkvanto versajne sekvas Ido (kp.

¹ Mi dankas al Wera Blanke kaj Herbert Mayer pro la utila trarigardo de mia teksto. Pri restantaj eraroj mi kompreneble mem respondeblas.

² Tio ne validas por Albanio kaj Rumanio. La movado en Sovetunio estis laŭteritorie malsame evoluinta kaj havis siajn specifajn komplikajn trajtojn. Aliloke mi klopodis skizi kelkajn cefajn aspektojn de la Esperanto-movado en la orienteŭropaj landoj (Blanke 2007).

Carlevaro/Haupenthal 1999), Volapuko (kp. Haupenthal 1982), Interlingua³ kaj Occidental-Interlingue (kp. Stenström 2003).

Dum la lasta jardeko la temaro de tempo al tempo estis traktita en prelegoj⁴ kaj publicaj (vidu la bibliografion ĉe la fino). Foje oni okazigas ekspoziciojn. Grupigo de la Esperanta lingvo-komunumo, la t.n. Civito, ek klopodas starigi Komunan Integran Bibliotekan Sistemon⁵, sed limigas ĝin al siaj adeptoj.

La sekva studo klopodas sistemigi problemojn kaj aspektojn de la titola temo kaj donas kiel ilustraĵojn kelkajn konkretajn ekzemplojn. Ĉio ĉi restas nekompleta, mankohava. Mi tamen esperas, ke iam iu pli kompetenta kaj pli bone informita persono verkos la necesan ampleksan libron ... (Ĉiujn menciitajn retejojn mi laste vidis 10.12.2008.)

2 Kolektoj: Bibliotekoj Arkivoj Muzeoj

Por la celo de tiu ĉi studo mi volas doni jenajn difinojn:

(a) **Esperanto-biblioteko** estas kolekto de libroj, broŝuroj, revuoj kaj foje ankaŭ de diversspecaj teknikaj registraĵoj (diskoj, sonbendoj, vidbendoj, disketoj, kompaktdiskoj k.s.), posedata de persono(j), de organizo aŭ de iu alia institucio. Lauenhave ĉefe temas pri libroj en aŭ pri Esperanto, respektive en aŭ pri aliaj planlingvoj, ofte ankaŭ pri la internacia lingvo-problemo ĝenerale, ties aspektoj kaj solvebloj. La materialo povas esti ordigita diversmaniere: fake, alfabeto, kronologie, laŭ verkistoj k.s.

(b) **Esperanto-arkivo** estas kolektaĵo, kiu konsistas ĉefe el nelibro-formaj dokumentoj rilatantaj al la historio de la loka, regiona kaj/aŭ internacia Eo-komunumo kaj ĝiaj personoj. La kolektaĵo povas esti posedata de privata, de Esperanto-organizaĵo aŭ alia institucio.

Arkivaĵoj povas esti:

- personaj dokumentoj (originaloj)
- alitipaj oficialaj dokumentoj
- kopioj de originalaj kaj aliaj dokumentoj
- manuskriptoj (publikigitaj kaj nepublikigitaj)
- diversaj ellaboraĵoj, notoj, skizoj, malnetaĵoj por prelegoj kaj studoj
- korespondadoj
- printaĵoj el la reto
- prelegfolioj (por tagluma projekciilo)
- materialoj pri biografiaj detaloj de personoj
- gazetaltranĉaĵoj
- afiŝoj
- taglibroj
- kalendaroj

³ Krom en Esperanto vere gravaj presadoj kontinue aperadas nur en Interlingua (vidu www.interlingua.com), sed ĝis nun mankas kompleta bibliografio. Mi ne konsideras la virtualajn publicadojn en la reto, ĉar ili estas nestabilaj. Certan impreson pri la eldonaktiveco en Interlingua donas la ĵaraj vendo-katalogoj Bibliographia de Interlingua³; ĝis 2002 kiel papera eldonaĵo, kaj poste la libro-oferto en la reto.

⁴ Mi kelkfoje prelegis pri la temo, i.a. en la klerigejo de Germana Esperanto-Asocio en Herzberg/Harz-montaro (2005), kadre de KAEST-Kolokvo 2006 en Dobrichovice/Prago (Blanke 2007) kaj kadre de la 84-a Germana Esperanto-Kongreso 2007 en Hamburgo (<http://www.nigra-kato.de/GEK2007/album/index.html>), krome dum la internacia kultura arango ARKONES en Poznań (2008).

⁵ Vidu Heroldo de Esperanto 5/2007.

- kartaroj, sliparoj
 - adreslistoj
 - invitiloj
 - programkajeroj
 - fotoj, fotoalbumoj, diapozitivoj kaj aliaj bildmaterialoj
 - filmoj kaj mikroficoj
 - sonbendoj
 - vidbendoj
 - kompaktdiskoj, DVD-diskoj kaj aliaj elektronikaj storiloj
 - insignoj, flagoj kaj flagetoj
 - diversaj postlasaĵoj de personoj
- ktp.

Malsame al libroj granda parto de arkivaĵoj estas unikajoj, kiuj estas nemalhaveblaj por historiaj kaj aliaj studoj.

(c) **Esperanto-muzeo** ne nur kolektas diversajn objektojn kaj materialojn (librojn kaj arkivaĵojn), sed ankaŭ prezentas ilin konstante aŭ por difinita tempo laŭ diversaj planoj kaj programoj. Ofte muzeoj estas ligitaj al bibliotekoj. Ili servas al publika informado pri Esperanto. Plej konata estas la [Internacia] Esperantomuzeo en Vieno⁶, oficiala parto de la Austria Nacia Biblioteko (ANB, Österreichische Nationalbibliothek). Aliaj muzeoj troviĝas en Gray/Francio (Nacia Esperanto-Muzeo), en San Paŭl d'Ordal/Hispanio (Hispana Esperanto-Muzeo)⁷ kaj en Szeged (Hungara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko kiel parto de la urba biblioteko Somogyi). Dum oktobro 2008 en Svitavy/Cehio estis inaugurita la Ceha Esperanto-Muzeo⁸. Ekzistas planoj por pluaj muzeoj, i.a. pri la Kroata Esperanto-Muzeo en Ĵurdevac⁹.

La distingo inter tiuj tri tipoj ne ĉiam facilas. Ofte temas pri diversakcenta kombino el ili. Pro tio mi ĝenerale parolos nur pri **Kolektoj**, elstarigante la specifan karakteron nur, se necese.

3 Kelkaj bazaj postuloj: informi, sekurigi, flegi, kunlabori, prezenti enhavon, utiligi

Analizante la situacion de planlingvaj kolektoj oni povas konstati:

- (a) Mankas sufiĉe da **informoj** pri ekzistantaj kolektoj, en kadroj nacia kaj internacia.
- (b) La **jura statuso** de multaj kolektoj ofte ne estas klare fiksita. Sekve la ekzisto de la kolektoj estas minacata.
- (c) Ofte la **fizika stato** de la kolektoj estas malbona. Minacas la disfalo de malnova papero, i.a. pro ĝia acideco.
- (d) La **kunlaboro** inter la respondeculoj de la kolektoj ofte ne bone funkcias.
- (e) Ofte mankas informoj pri la **cefa enhavo** kaj la eventualaj specifajoj de difinitaj kolektoj.
- (f) Kaj fine ne ĉiam ekzistas sufiĉe da ebloj vere **utiligi** la ofte rican materialon de difinitaj kolektoj por sciencaj kaj aliaj celoj.

⁶ Vidu <http://www.onb.ac.at/esperantomuseum.htm>.

⁷ Vidu http://eo.wikipedia.org/wiki/Hispana_Esperanto-muzeo

⁸ Vidu la raporton en *Esperanto* 46-ro 1219 (11), 2008, p. 237 kaj la specialan primuzean kajeron de *Ŝtarto* 2008.

⁹ Vidu *Zagreba Esperantisto* 2/08.

3.1 Informi pri la ekzisto kaj la situacio de la kolektoj

La Esperanto-komunumo ne disponas pri iom aktuala detala superrigardo pri siaj bibliotekoj. Kelkfoje aperis nekompletaj studoj (ekz. Zilvar 2003). En la Jarlibro de UEA 2008, p. 81-84, (Bibliotekoj kaj muzeoj) ni trovas informojn nur pri 14 bibliotekoj el 12 landoj (Austrio, Belgio, Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Nederlando, Svisio kaj Uzbekio), de kiuj 4 trovigas en germanlingvaj landoj.¹⁰ En la jarlibro mankas mencioj pri privataj bibliotekoj, el kiuj iuj estas pli ricaj kaj science pli valoraj ol kelkaj menciitaj. *Marinko Givoje* (1980) klopodis konsideri ankau gravajn privatajn kolektojn kaj menciis 30 bibliotekojn el 21 landoj.

Grandan forto-strecon antaŭ suface da jaroj faris *Árpád Máthé*, kiu prepare al la Esperantologia Konferenco 1992 en Vieno (kadre de la 77-a UK) tutmonde enketis kaj trovis entute 99 bibliotekojn en 31 landoj kun po pli ol 1000 volumoj. Lia listo restis nekompleta kaj nepublikigita.

Ankau *Martin Weichert* provis doni superrigardon (en la interreto¹¹), sed bedaŭrinde ne plu aktualigadas ĝin. Li mencias nur 14 kolektojn el 12 landoj. Tre malofte aperas bonaj priskriboj de difinita biblioteko kaj ĝia historio, ekz. pri la *“Biblioteko Hodler”* de UEA en Roterdamo (Sikosek 2004, van Dijk 2008).

Pri kelkaj grandaj bibliotekoj ekzistas broŝuraj, libroformaj aŭ nur ŝliparaj katalogoj. Mi registris ĝis 1984 40 katalogojn kaj bibliografiojn (Blanke 1985: 302-304). Intertempe la kvanto versajne duobligis.

Lastatempe en la reto estas storataj pli kaj pli da plenaj tekstoj de diversspecaj libroj, ekz. la Scienc-teknika Esperanto-biblioteko sub prizorgo de *Láslo Szilvási*¹² aŭ la eLibrejo, “fondita de *Franko Luin*, la kolekto de Don Harlow k.a. Ankau en Vikipedio trovigas certa superrigardo.¹³

Pli precizajn informojn ni havas pri jenaj kolektoj:

La planlingva kolekto de ANB en Vieno (kp. Mayer 2003; Mayer/Fettes 2006; Mayer 2008 kaj Mayer kaj Cimpa en ci tiuj aktoj).¹⁴

La Biblioteko Hector-Hodler en la Centra Oficejo de UEA Rotterdam.¹⁵

La Biblioteko de Germana Esperanto-Instituto en Aalen (Maier/Schaeffer 2007, krome Maier/Schaeffer en ci tiu volumo kaj la tie menciita literaturo).

Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue auxiliaire Internationale (CDELI) en la svisa urbo La Chaux-de-Fonds (Gacond 2004¹⁶)

¹⁰ Temas pri jenaj kolektoj: Planlingva Kolekto de ANB Wien/AT, Biblioteko César Vanbiervliet en Kortrijk/BE, Biblioteko Montague C. Butler en Barlastono/GB, Nacia Esperanto-Muzeo Gray/ FR, Germana Esperanto-Biblioteko Aalen/DE, Interkultura Centro Herzberg/DE, Fritz-Hüser-Instituto Dortmund/DE, Esperanto-Kolekto Fajszí Budapeŝt/ HU, Hispana Esperanto-Muzeo San Pau d'Ordal/ES, Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Arkivo en Massa/IT, Biblioteko de Japania Esperanto-Instituto Tokio/JP, Hector-Hodler-Biblioteko Rotterdam/NL, CDELI La Chaux-de-Fonds/CH, Internacia Pacmuzeo/Uzbekio.

¹¹ Kp. <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/>.

¹² Kp. www.eventoj.hu/steb/.

¹³ La kolekto de la forpasinta *Don Harlow* ankoraŭ konsulteblas en la reto : <http://www.webcom.com/~donh/don/don.html>, krome en Vikipedio vidu la superrigardon <http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-biblioteko>.

¹⁴ Ankau vidu: http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantomuzeo_kaj_Kolekto_por_Planlingvoj kaj la intervjuon kun *Herbert Mayer* en *Esperanto* 6/2004, p. 124-125.

¹⁵ Vidu Lins 1991; 1995 a,b; 1998; Sikosek 2004 a,b ; van Dijk [nask. Sikosek] 2008; krome http://de.wikipedia.org/wiki/Bibliothek_Hector_Hodler kaj <http://esperantic.org/ced/hodler.htm>.

La sekcio pri la historio de la laborista Esperanto-movado en la Fritz-Hüser-Institut en Dortmund (vidu Noltenius kaj Proskovec en Noltenius 1993, Noltenius/Palm/Vogt 2005 kaj Proskovec 2008).

Valoras mencii la librojn devenantajn de la iama Germana Esperanto-Instituto (Leipzig) gis la deviga dissolvigo fare de la nazioj en 1936. La libroj savigis kaj iris al la Germana Stata Biblioteko en orienta Berlino (Staatsbibliothek zu Berlin. Preußischer Kulturbesitz) (Szimkat 2004; Hartwig 2006). Ekzistas slipara katalogo kaj informoj en la reto.¹⁷

Foje en la Esperanta gazetararo aperas raportoj pri unuopaj kolektoj, ekz. pri la Hispana Esperanto-Muzeo San Pau d Ordal (Blanke 1997) au pri la Esperanto-libraro en la Itala Nacia Biblioteko en Massa (Benedetti 2008)¹⁸.

Malofte oni ekscias ion pri personaj postlasaĵoj kaj ties savo. Pri la gazeta postlasaĵo de la dana esperantisto *Gustav Kühlmann* el Kopenhago verkis *Bernhard Pabst* (Pabst 2008)¹⁹.

En CDELI troviĝas postlasaĵoj ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de gravaj reprezentantoj de aliaj planlingvoj, aparte de Volapuko (vd. Hauptenthal en ĉi tiu volumo), Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua. Necesus detale priskribi tiujn materialojn.

En la menciita Fritz-Hüser-Institut troviĝas postlasaĵoj de kelkaj laboristaj esperantistoj.²⁰

La postlasaĵo de la unua prezidanto de GDREA²¹, *Rudi Graetz* (1907-1977) troviĝas en Stiftung Archiv der Parteien und Massenorganisationen der DDR im Bundesarchiv (SAPMO)²², parto de la germana federacia stata arkivo. Tie ankaŭ troviĝas multaj aktoj pri Esperanto en diversaj aliaj sekcioj (Ulrich 2008).

Interlingvistike gravaj materialoj troviĝas en la Berlin-Brandenburgische Akademie der Wissenschaften (Berlina-Brandenburgia Akademio de Sciencoj), la iama Akademie der Wissenschaften der DDR (Akademio de Sciencoj de GDR) (kp. Wollenberg 1998, 2006, 2008).

Pri la privata biblioteko kaj arkivo de *Wera* kaj *Detlev Blanke* ekzistas enhava skizo (Blanke 2006a).

En komunumaj arkivoj de urboj foje troviĝas gravaj historiaj materialoj. Tio ekz. validas pri la urba arkivo de Leipzig. Leipzig ludis gravan nacian kaj internacian rolon lige al SAT kaj ties politika skismo. La tie trovitaj materialoj farigis la bazo por grava libro pri la historio de la germana laborista Esperanto-movado (Kolbe 1996).

¹⁶ Vidu la intervjuon de *Stefano Keller* kun *Claude Gacond*, la arkivisto de CDELI, en *Esperanto* 10/2006, p. 198-199.

¹⁷ Informojn pri la enhavo oni trovas ĉe :

<http://altdrucke.staatsbibliothek-berlin.de/de/sammlungen/esperanto-sammlung.html>.

¹⁸ Pri Benedetti vidu la artikolon de *Michela Lipari* en *Esperanto* 7-8/2008, p. 157.

¹⁹ *Bernhard Pabst* transprenis la ampleksan kolekton de revuoj kaj bibliografiis ĝiajn esperantologiajn materialojn. La rezulto estas unika retrorigarda bibliografio de revuo-artikoloj (vidu Pabst 2003 kaj la saman tekston en <http://www.interlinguistik-gil.de/ebealink.html>).

²⁰ Temas pri la postlasaĵoj de *Josef Burger* (1881-1970), *Franz Gerboth* (1902-1989), *Adolf Schwarz* (1906-1996), *Eduard Weichmann* (1919-1988) kaj *Siegfried Ziegler* (1902-1984), kp. Noltenius/Palm/Vogt 2005, p. 131-139. Ankaŭ vidu Proskovec 2008.

²¹ Gis la fondo de *Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR* (Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR) la organizado miskomprenige nomigis *Zentraler Arbeitskreis Esperanto im Deutschen Kulturbund* (Centra Laborrondo Esperanto en Germana Kulturligo).

²² SAPMO. Vidu la mallongigojn antaŭ la Bibliografio.

3.2 Sekurigi la ekziston de la kolektoj

Post iom pli detala informigo pri la situacio de multaj kolektoj evidentigas, ke ekzistas diversaj minacoj por ilia pluekzistado. Sekve necesas serci vojon por sekurigi ilin kaj redukti la minacojn.

3.2.1 Minacoj

Ekzistas tuta gamo da minacoj, kiuj povus malcertigi au ec fini la pluekziston de kolektoj. Mi nur menciuj kelkajn:

(a) Detruoj: Dum la historio malaperis au detruigis kelkaj gravaj kolektoj. La plej konata el la unua periodo de la lingvo estas la biblioteko de *Georgi Davidov* (1879-1967), pri ties enhavo ni felice estas informitaj, car jam en 1908 aperis katalogo. La kolekto de la ruso siatempe versajne estis la plej ampleksa Esperanto-biblioteko.²³ Pro la perturboj de la Unua Mondmilito kaj de la rusa Oktobra Revolucio oni taksas gin perdita. Intertempe tamen partoj sajne estis retrovitaj en regiona biblioteko de Saratov²⁴.

(b) Duoninformoj: Gis la nuntempo ne estas klara la sorto de gravaj interlingvistikaj arkivoj. Temas i.a. pri la arkivo de *Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale*, kiu versajne troviĝas en CDELI. Sed pri la enhavo estas nenio speciale konata.

Antaŭ kelkaj jaroj oni legis en publikaĵoj de *Union Mundial pro Interlingua* (UMI), ke oni retrovis la arkivon de *International Auxiliary Language Association* (IALA) (Esterhill 2000). Tamen mankas precizaj informoj. Unu el la plej gravaj kunlaborintoj de IALA, la brita lingvisto kaj esperantisto *William Collinson* (1889-1969)²⁵, ellaboris multajn studojn por IALA, i.a. komparante diversajn planlingvajn sistemojn. La serco pri lia postlasaĵo gis nun restis senrezulta.²⁶

(c) Malzorgemo: Aparte post 1990, kiam en multaj orienteuropeaj landoj sangigis la politikaj kaj ekonomiaj sistemoj, draste malbonigis la kondicoj por la landaj Esperanto-organizaĵoj. La statoj ne plu subvenciis. La intereso pri Esperanto sajne forte reduktigis. Iuj respondeculoj ne montris apartan intereson pri la pasinteco, kiun ili tamen estis kunkreintaj. Sekve ili ne vidis neceson zorgi pri bibliotekoj kaj arkivoj. Sed aldone ankaŭ la por ili komplikiginta ciutaga vivo malfaciligis okupigi pri tiuj sajne flankaj aferoj. Multo perdis. Tio ekzemple koncernas Bulgarijon, en kiu gis 1990 laboris unu el la plej fortaj Esperanto-organizaĵoj de la mondo. Tie agadas ankoraŭ nur tre malgranda resto. Laŭ miaj informoj regas malklareco pri multaj gravaj postlasaĵoj, ekz. pri tiuj de *Krastju Karucin* (1915-2008) kaj *Canko Murgin* (1921-1995). Ankaŭ neklaras la sorto de la siatempe bone prizorgita Bulgara Esperanto-Muzeo, iniciato de la kuracisto *Boris Nedkov*.²⁷

(d) Teknikaj katastrofoj: Foje aldonigas teknikaj katastrofoj, kiuj povas okazi sub plej diversaj cirkonstancoj. Du ekzemploj: Pro inundo en la domo de Bulgara Esperanto-Asocio en Sofio detruigis la kompleta arkivo de BEA²⁸. En 2005 forbrulis la tegmenta etago de la rekonstruata Esperanto-Domo en Berlino. Detruigis au grave difektigis partoj de la privata materialo de la posedanto *Johann Pachter* (aparte valoraj revukolektoj) kaj partoj de la arkivo de Germana

²³ http://eo.wikipedia.org/wiki/Biblioteko_de_Davidov. Katalogo de la biblioteko de Georgi Davidov, Saratov. Berlin: Möller & Borel 1908 (III+53 S.), 2. Auflage 1911, Wolfenbüttel: Germana Akademia Esperantista Ligo (VI+130 p.).

²⁴ Vidu *Starto* 2/2007, p. 46.

²⁵ Vidu http://en.wikipedia.org/wiki/William_Edward_Collinson.

²⁶ Mi verkis la alvokon *Sercataj informoj pri W. E. Collinson* en *ĉer esperantist* 21(1985) Nr. 133: 108. Neniam venis uzebla reago.

²⁷ Persona informo de *Dimitar Papazov*, iama sekretario de BEA de 14.10.2008.

²⁸ Persona informo de *Dimitar Papazov*, iama sekretario de BEA de 14.10.2008.

Esperanto-Asocio.²⁹ Al teknikaj katasrofo ankaŭ kalkuligas la malaper(ig)o de gravaj arkivaj retejoj kun storitaj libroj kaj gazetoj. Post la forpaso de Claude Piron ekz. malaperis lia rica retejo. Do, oni devus zorgi ankaŭ pri tiaĵoj.

(e) Misekonomio/Mistakso: Financaj problemoj, ofte rezulto de misekonomio aŭ nekomprene pri prioritatoj, povas minaci la pluekziston eĉ de institucioj de nacia kaj internacia reputacioj. Tio ekz. koncernis la domicilon de la fama germana kemiisto kaj nobelpremiito *Wilhelm Ostwald* (1853-1932)³⁰. Lia domicilio en la urbeto Großbothen (Regiono Leipzig) estas la sola komplete konservita rezidejo kun esploro de sciencisto en Germanio. La arkivo i.a. entenas valorajn interlingvistikajn materialojn. La engagigo de Ostwald por la ideo de internacia lingvo ja estas konata (kp. Becker/Wollenberg 1998; Blanke 2006b: 133-162). Li aparte subtenis Idon. Okaze de la 150-a naskiĝtago de Ostwald, en la jaro 2003, en la domicilio de Ostwald okazis internacia solena arango de idistoj.³¹

Lau la ideoj de la registaro de la germana federacia lando Saksio en 1995/96 oni volis vendi la domicilon al investanto, kaj tie konstruigi hotelon. Fortaj protestoj el Germanio kaj el eksterlando malebligis tiun planon.³²

(f) Sangigo de respondecoj: La ekzisto de kolektoj de Esperanto-organizaĵoj ĝenerale dependas de la sindona honorofica laboro de difinitaj personoj. Se ili fordonas sian oficon, ne plu pretas engagi sin aŭ forpasas, ne ĉiam estas facile trovi posteulon, kiu zorgos pri la kolekto.

Alia problemo estas, ke multaj aktoj de landaj kaj internaciaj organizaĵoj plu trovigas sub privata dispono de demisiintaj funkciuloj kaj ne estas pludonataj al posteuloj. Tial multaj materialoj facile malaperas.

(g) Familia problemo: Bibliotekoj kaj arkivoj en la plej oftaj kazoj estas la rezulto de dumviva kolektado de unuopa persono. Ne malofte la kolektanto (kaj ĉefe temas pri viroj) ne nur investas grandan parton de sia tempo kaj de financoj en la kolektadon, sed ofte ankaŭ suferigas la familion. La familianoj ne ĉiam partoprenas la entuziasmon de la kolektanto, kiu plenigas la loĝejon per materialoj kaj apenaŭ havas tempon por la famila vivo. Post lia morto, kaj se mankas klaraj instrukcioj pri la traktado de lia kolekto, povas okazi, ke familianoj simple forĵetas la gravajn materialojn. La perdo aparte dolorigas koncerne aktojn, ĉar ili plej ofte estas unikaj. Kvankam ankaŭ la perdo de libroj estas bedaŭrinda, ili tamen ĝenerale trovigas en diversaj aliaj bibliotekoj kaj kolektoj.

3.2.2 Kion fari?

Ekzistas kelkaj eblecoj adekvate trakti planlingvajn kolektojn, aparte por preventi ilian malaperon aŭ detruon. Mi mencias nur kelkajn.

3.2.2.1 Kolekti kaj deponi

Lige al la supre menciitaj minacoj unue gravas certigi, ke iuj personoj aŭ difinita institucio certigas, ke oni kolektu materialojn, kiuj eventuale povus malaperi.

Ĝenerale la loka Esperanto-klubo estas informita pri la forpaso de siaj membroj kaj devus havi strategion, kiel savi eventuale ekzistantan materialon. Do, almenaŭ necesas adekvataj kontaktoj al la

²⁹ Vidu la raportojn en *Esperanto-Infamilio Berlino* Brandenburgio 56 (2005) n-roj 10 (597) kaj 11 (598), krome *Esperanto aktuel* 5/2005. Ankaŭ la gazetaro de Berlino raportis.

³⁰ Kp. http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Ostwald kaj <http://hometown.aol.de/ostwaldenergie/index.htm?f=fs>.

³¹ Vidu <http://www.europa.idolinguo.com/Germania/Idokonfero2003/ido.htm>.

³² Ankaŭ la Societo pri Interlingvistiko (GIL) protestis kaj ricevis respondon de la respondeca ministro.

familianoj. Pro tio gravas konsciigi ilin pri la dezirindeco de antaŭmortaj decidoj, por preventi la forjeton aŭ detruon de la materialoj.

Ci-rilate levigas la problemojn, kien meti la savitajn librojn kaj aktojn, se ili ne povas eniri la kluban bibliotekon aŭ alian institucion. Pro tio estas utile, disponi pri deponejo, kie eblas loki la materialojn tiom longe, ĝis kiam oni estos trovinta adekvatajn instituciojn, kiuj transprenus la kolektojn. Ankaŭ estas penseble, ke la kolekto mem iam povus fariĝi la bazo por Esperanto-biblioteko aŭ muzeo. Ekzemploj i.a. troviĝas en Vieno kaj Budapeŝto.

Kiel konate la privata kolekto de *Hugo Steiner* fariĝis la bazo por la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. La privata kolekto de la hungaro *Károly Fajsz* nun konsistigas apartan sekcion en la Hungara Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto.

Aktuale instrua ekzemplo estas la Marie-Hankel-Centro (MHC) en Dresdeno/Germanio, kiun gvidas *d-ro Wolfgang Schwarz*. MHC estas oficiala institucio de la Teknika Universitato (TU) Dresdeno, kiu disponigas ejojn je tre modera luprezco. La centro samtempe estas ligita al Germana Esperanto-Asocio, kiu iom subvencias. Ĝi ankaŭ daŭre havas ligojn al Kulturligo³³.

MHC devenas de iniciato de la distrikta organizado de GDREA en Kulturligo, en la iama distrikto Dresdeno. Tie dum la 1980-aj jaroj Schwarz fondis Rondon de Amikoj de Esperanto ĉe TU Dresdeno, kie membriĝis diversaj universitataj profesoroj. Intertempe en MHC troviĝas abunda materialo. Wolfgang Schwarz kun sia edzino Barbara ne nur kolektas kaj tiel savas materialojn de antaŭ nelonge forpasintaj esperantistoj, li ankaŭ sisteme serĉas eventualajn postlasaĵojn de famaj personoj el la politika vivo de Dresdeno kaj Saksio, kiuj estis engagitaj esperantistoj (i.a. la banka familio Arnold, Marie Hankel, Albert kaj Theodor Steche, Johannes Dietterle k.a.). MHC kunlaboras kun la Saksia Esperanto-Biblioteko, kiun gvidas *d-ro Benoit Philippe*³⁴.

3.2.2.2 Familia posedado

Se en la familio de forpasinto Esperanto ludis kaj plu ludas gravan rolon, tiam ekzistas la sancoj, ke la familianoj –almenaŭ por difinita tempo –plu okupigos pri la kolekto. Tio ekz. validas por Hispana Esperanto-Muzeo en San Paŭl de Ordal/Barcelono, kiu restas en familia posedo post la forpaso de ĝia fondinto kaj ĉefa prizorginto *Luis Hernández Yzuel* (1917-2002)³⁵. Tamen la estonteco de privataj kolektoj restas malstabila.

3.2.2.3 Esperanto-organizaĵoj

Landaj aŭ regionaj asocioj aŭ lokaj Esperanto-klubo, se ili konscias pri la graveco de la problemoj kaj disponas pri teknikaj kaj homaj kondiĉoj, foje sisteme konstruas siajn bibliotekojn kaj arkivojn transprenante i.a. materialon de siaj forpasintaj membroj kaj ricevante donacojn. Tiel ekz. estis la *Esperanto-Ligo Berlino* kun pli ol 4000 volumoj. Ĝin ĉefe kunmetis la familio *Ina* kaj *Hermann Tautorat*. Ekzistas surdiskeda katalogo.

La Biblioteko Montague C. Butler, ĉefpropraĵo de *Esperanto-Asocio de Britio*, trovis sian lokon en Barlastono/Britio.

³³ Post la germana unuiĝo Kulturligo, la iama tegmenta organizado de la esperantistoj de GDR, pluekzistadas kaj – en iom sangiginta strukturo – relative bonfartas. Ekzistas kelkaj Esperanto-grupoj de orienta Germanio, kiuj plumembras en Kulturligo kaj povas uzi ties teknikajn eblojn.

³⁴ Ekzistas du-partita katalogo: *Alphabetischer Katalog der Sächsischen Esperanto-Bibliothek*. I. Band, Dresden, 2001, 89 p.; II. Band, Dresden 2007, 80 p.

³⁵ Cetere, konsciante kiom multe la familianoj devas elteni sed ankaŭ pozitive povas influi la vivon de tre aktiva esperantisto kaj grava kolektanto, *Luis Hernández Yzuel* fondis la medalon Klara Silbernik por distingigi hispanajn edzinojn, kiuj modele helpas kaj subtenas la esperantistan agadon de siaj edzoj. Vere plaĉas kaj imitinda iniciato.

Pri granda biblioteko disponas la cefa japana Esperanto-organizaĵo, la *Japana Esperanto-Instituto*. Pri parto de ĝi, la kolekto de *Kenji Ossaka* (1888-1969), ekzistas speciala katalogo (Katalogo .1989).

Kelkaj gravaj postlasaĵoj estas konservataj de Esperanto-organizaĵoj kaj aliaj institucioj. En la Esperanta Kultura Centro *Kvinpetalo*, en Bouresse ce Poitiers/Francio, oni flegas la postlasaĵojn de *Gaston Waringhien* (1901-1991) kaj *Roger Bernard* (1907-1997)³⁶.

La postlasaĵoj de *Juan Régulo Perez* (1914-1993) konservas la arkivo de *Hispana Esperanto-Federacio*³⁷.

La kompleta korespondaraĵo de *Kálmán Kalocsay* (1891-1976)³⁸ estas je la dispoŝo de esplorantoj en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Rotterdam.

En la estonteco ni eventuale disponos pri elektronikaj superrigardoj bibliografiaj kaj katalogaj (kp. Malovec 2008, Blahu 2008)³⁹.

3.2.2.4 Lokaj komunumaj partneroj

Se al Esperanto-klubo mankas la eblecoj ordigi kaj deponi siajn librojn kaj arkivaĵojn, foje lokaj komunumaj partneroj povas helpi. Pri tio ekzistas bonaj ekzemploj. Mi mencios kelkajn:

(a) **Urbaj bibliotekoj** en kelkaj kazoj estas bonaj partneroj.

Surbaze de 10-jara kontrakto, kiun eblas ciam plilongigi, la biblioteko de Germana Esperanto-Asocio (*Germana Esperanto-Biblioteko*) trovigas en la urba biblioteko de la sudgermana urbo Aalen (kp. Maier/Schaeffer en ci tiu volumo). Levigas la demando, kien meti la amplekseĝan bibliotekon kun pli ol 40 000 bibliotekaj registraĵoj unuoj, se pro iu kialo la 10-jara kontrakto, ĝis nun kelkfoje plilongigita, estus nuligita.

Post la planlingva kolekto de ANB versajne la plej grava planlingva kolekto estas *CDELI* en la biblioteko de la svisa urbo La Chaux-de-Fonds. Dum jardekoj *Claude Gacond* faras grandegan laboron. La perspektivo tamen saĝnas neklara.

Alia grava kolekto trovigas en la biblioteko de la belga urbo Kortrijk. Ĝin fondis *César Vanbiervliet* (1905-1992). La kolekto nomigas Fondaĵo César Vanbiervliet kaj estas parto de la publika urba biblioteko. Ankau en la urba biblioteko de la belga urbo Leuven trovigas kolekto (Stedelijke .1987).

*Karóly Fajsz*i (1911-2004)⁴⁰ ankoraŭ dum sia vivo sukcesis fari kontrakton pri la estonteco de sia kolekto, kiu nun, kiel menciite, trovigas en la *Hungara Fremdlingva Biblioteko* en Budapeŝto.

(b) Foje **urbaj arkivoj** estas pretaj transpreni librojn kaj arkivaĵojn. La biblioteko kaj arkivo de *Itala Esperanto-Federacio* trovis lokon en la urba arkivo de Massa (Lipari 2008). La kolekton fondis *Mario Dazzini* (1910-1985).

³⁶ Kp. <http://eo.wikipedia.org/wiki/Kvinpetalo> . Mi dankas *Michel Duc Goninaz* pro la informo-DB.

³⁷ Kp. <http://www.esperanto.es/hef/index.php> .

³⁸ Kp. http://de.wikipedia.org/wiki/K%C3%A1lm%C3%A1n_Kalocsay .

³⁹ *Ziko van Dijk* (nask. Marcus Sikosek) eksperimentis per ĵetaro ĉen la reto cele al konstruo de reta katalogo.

⁴⁰ Kp. la ampleksajn katalogojn, Parto I (Pataki-Czeller 1991) kaj Parto II (Zsebeházy 2005). La dua parto de la katalogo estas publikigita dank al subvencioj de Esperantic Studies Foundation kaj Hungara Esperanto-Asocio.

Antaŭ nelonge la regiona stata arkivo de la urbo Vraca/Bulgario akceptis la arkivon de la *Esperanto-Societo „Verda Raketo“*.⁴¹

Ankaŭ la *urbaj arkivoj* de la nordgermana (antaŭpomeria) urbo *Stralsund*⁴² kaj de la saksa *Chemnitz*⁴³ transprenis aktojn de Esperanto-klubo, resp. interesajn prihistoriajn studojn.

3.3.3.5 Stataj partneroj

Ne ciam eblas klare distingi inter komunumaj, urbaj kaj stataj partneroj. Ci-loke ni menciuj kelkajn ekzemplojn de naciaj bibliotekoj, stataj arkivoj, krome universitatoj kaj sciencaj akademioj.

(a) Foje en **naciaj bibliotekoj** eblas lokigi gravajn kolektojn kaj postlasaĵojn. La jam menciita planlingva kolekto de ANB, siatempe fondita kaj longe gvidata de *Hugo Steiner* (1878-1969), ne nur disponas pri moderna ejo, sed ankaŭ estas profesie gvidata. ANB jam komencis ciferecigi gravajn materialojn kaj meti ilin en la reton (vidu la kontribuojn de Mayer kaj Cimpa en ci-tiu volumo).

La ampleksa postlasaĵo de la dana fitopatologo kaj esperantologo *Paul Neergaard* (1907-1987)⁴⁴ troviĝas en la dana stata (rega) biblioteko en Kopenhago (The Royal Library).

La Skota Nacia Biblioteko en Edinburgh transprenis la libraron de *William Auld* (1924-2006).

Pri nia temo aparte meritigis la kroata ĵurnalisto kaj kolektanto *Marinko Gjivoje* (1919-1982). Lia kolekto nun troviĝas en la Kroata Nacia Biblioteko en Zagrebo, kvankam saĝe ne ordigita kaj nealirebla.⁴⁵

(b) Fojfoje **centraj stataj arkivoj** estas pretaj transpreni materialojn. Ili versajne donas la plej sekuran lokon. Generale ili estas finance kaj teknike bone ekipitaj. La Dana Stata Arkivo transprenis la postlasaĵon de *Ivo Lapenna* (1909 - 1987)⁴⁶.

Specifa sekvo de la germana unuigo estas la konservado de ĉiuj aktoj de partioj kaj amasorganizaĵoj de GDR. Ili formas apartan sekcion de la stata Federacia Arkivo (SAPMO).⁴⁷ La tegmenta organizaĵo de GDREA estis la Kulturligo de GDR. Ties aktoj, kaj sekve ankaŭ tiuj de GDREA, nun troviĝas en SAPMO. Tio ankaŭ koncernas la bibliotekon de GDREA kun c. 2200 volumoj.⁴⁸ Laŭ kontrakto de 11.8.2005 SAPMO transprenos la postlasaĵon de *Wera* kaj *Detlev Blanke*, inkluzive ties grandan interlingvistikan bibliotekon kaj arkivon.

(c) En **universitataj bibliotekoj kaj arkivoj de sciencaj akademioj** foje troveblas gravaj materialoj. La scienca postlasaĵo de *Eugen Wüster* (1898-1977)⁴⁹ troviĝas en tri lokoj, krom en ANB ankaŭ en la universitato de Vieno. Parto de la interlingvistike gravaj aktoj ankoraŭ troviĝas ĉe la filo, *Thiele Wüster* (Frickingen/DE).

⁴¹ Bulgara Esperantisto 2/2008, p. 7.

⁴² En Stralsund la prezidanto de la loka grupo de GDREA, *Hans-Joachim Borgward* transdonis komence de la 1990aj jaroj materialojn al la urba arkivo.

⁴³ La urba arkivo de Chemnitz volonte akceptis studojn pri la regiona historio de la Esperanto-movado verkitajn de *Rudolf Burmeister*.

⁴⁴ Kp. http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Neergaard; pri la Biblioteko: <https://rex.kb.dk/>.

⁴⁵ Laŭ informo de *Velimir Piskorec* el Zagrebo. Ankaŭ vidu Zagreba Esperantisto 2/2008, p. 50-51.

⁴⁶ Kp. Esperanto 12/2008, S. 258.

⁴⁷ SAPMO, vidu Ulrich 2008.

⁴⁸ Kp. http://www.bundesarchiv.de/aufgaben_organisation/abteilungen/sapmo/01097/index.html

⁴⁹ Pri la rilatoj de Wüster al Esperanto vidu Blanke 2006b:163-176.

En la universitato de Graz eblas konsulti la postlasaĵon de la lingvisto/romanisto *Hugo Schuchardt* (1842-1927). En ĝi estas interlingvistike interesaj materialoj (Slaje 1987).

Antaŭ nelonge en la universitato de Torino estis defendita doktora disertacio pri la interlingvistika verko de la itala matematikisto *Giuseppe Peano* (1858-1932), aŭtoro de Latino sine flexione (Gagliardi 2007-2008). La laboraĵo bazigas je rica interlingvistika akta materialo troviganta en la universitato.

Kolektoj de esperantaj kaj aliplanlingvaj libroj trovigas i.a. ankaŭ en jenaj universitataj bibliotekoj:

- Amsterdam/NL (Catalogi I, Catalogi II 1969)
- Lublin /PL (Wojtakowski 1979)
- Milano/IT (Libera Università di Lingue e Comunicazione IULM, Montagner 2002)⁵⁰
- Oregon/US (Smith/Haake 1978)
- Saarbrücken/DE (Hauptenthal 1977)

La en krampoj menciitaj katalogoj intertempe malaktualigis. Parto de la materialoj estas konsulteblaj en la reto.

En la Berlina-Brandenburgia Akademio de Sciencoj trovigas gravaj materialoj de kelkaj famaj sciencistoj, kiuj sin engagis por la ideo de internacia lingvo, inter ili la kemiisto *Wilhelm Ostwald* (1853-1932), geofizikisto *Adolf Schmidt* (1848-1992), filologo *Julius Hanauer* (1872-1949) kaj de la filologo *Johannes Irmscher* (1920-2000)⁵¹ (Wollenberg 2006 kaj 2008).

3.3. Flegado de la kolektoj

Planlingvaj materialoj ne ĉiam estas flegataj kiel necese. Ofte ne nur mankas financoj kaj la teknikaj instalaĵoj, sed ankaŭ la scio pri la problemoj. Multaj malnovaj libroj estas presitaj sur malbona, acidhava papero, kiu tendencas disfali. Necesus skanado aŭ mikrofildado de la materialo. Ankaŭ filmoj, malnovaj fotoj, diapozitivaj, sonbendoj, vidbendoj k.s. devus esti metitaj sur elektronikajn storilojn.

En la ejoj de multaj privataj kolektoj mankas fajroprotektaj instalaĵoj. Dum la lasta jardeko kelkaj incendioj detruis parte aŭ komplete valorajn kolektojn (en Germanio konatigis i.a. la kazoj de *Richard Hirsch*/Bad Hersfeld, *Johann Pachter*/Berlino, *Michael Scherm*/Weißenhorn kaj *Klaus Urban*, Dresdeno).

3.4 Kunlaboro

Necesas pli intima kunlaborado inter la respondeculoj de planlingvaj bibliotekoj, arkivoj kaj muzeoj (kunlaboro interna). Same necesas kunlaboro kun neplanlingvaj partneroj (kunlaboro ekstera). Por ambau kampoj la reto prezentas novajn kaj grandajn eblecojn, ankoraŭ ne sufiĉe uzatajn.

3.4.1 Kunlaboro interna

Tiu formo de la kunlaboro povus koncerni i.a. jenajn kampojn kaj aktivadojn:

- Intersango de informoj pri la situacio kaj problemoj de difinitaj kolektoj.
- Intersango de duoblaj surbaze de manko-listoj por reciproke kompletigi la havaĵojn.
- Kunlaboro ĉe la ellaboro de katalogoj uzante jam ekzistantajn bibliografiajn donitaĵojn

⁵⁰ Aliro al la katalogo: <http://131.175.3.95/F>.

⁵¹ *Johannes Irmscher* dum multaj jaroj estis aktiva membro de GIL, vizitis kelkajn konferencojn kaj tie prelegis.

- Reciproka interkonsilado pri financaj demandoj, ekz. pri la temo, kiel akiri subvenciojn por difinitaj projektoj. Ekzemplo el la lasta tempo estas la financado de la dua volumo de la katalogo de la Karóly Fajsz-Kolekto en Budapeŝt per la usona *Esperantic Studies Foundation*⁵². Subvenciojn ankaŭ eblas ricevi i.a. de la *Thorsen-fondajo* de UEA⁵³ kaj de la *Fame-fondajo*.⁵⁴

Grava punkto de kunlaboro estas la reciproka solidara subtenado en kazo de minacoj kontraŭ la pluekzisto de difinitaj kolektoj. Internacia lobiado povus efiki. Ci-rilate povus utili aparte fondindaj sciencaj konsultaj (au patronaj) organizadoj, ligitaj al difinitaj kolektoj. Ekspertizoj de fakaj organizadoj, resp. institucioj kiel *Center for Research and Documentation on Language Problems* ” (Hartford/USA – Rotterdam/ Nederlando)⁵⁵ kaj la germana *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (GIL) povus argumenti la scienca valoron de difinita kolekto. Propono pri kunlaboro ekzistas de julio 2008 flanke de la Fondajo César Vanbiervliet el Kortrijk/Belgio.⁵⁶

3.4.2 Kunlaboro ekstera

Tiu formo de kunlaboro koncernas la rilatojn de planlingvaj kolektoj al eksteraj partneroj, ekz. neplanlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj, kiuj disponas pri profesia kompetenteco kaj povus helpi diversmaniere, por stabiligi la planlingvaj kolektojn.

Kelkfoje Esperantaj bibliotekoj estas menciataj kiel specialaj au fakaj bibliotekoj en biblioteksciencaj registriroj, ekz. en la eldonoj de *World Guide to Special Libraries* (K.G. Saur München – New Providence-London-Paris)⁵⁷ kaj en studo de Burkhardt (1994) pri la Germana Esperanto-Biblioteko.

Kelkaj urboj foje informas pri sia oferto de diversaj bibliotekoj. Ekzemple en gvidilo tra la bibliotekoj de la pola urbo Lodz oni ankaŭ mencias la bibliotekon de la loka esperantista organizado (Biblioteki Lodzi informator. Lodz 1970).

Kompreneble tre dependas de individuaj iniciatoj, kiom kaj kie oni mencias planlingvaj bibliotekojn. Pli sistema agado ci-rilate estus dezirinda.

Same gravus, disponigi al urbaj au naciaj bibliotekoj elektitajn titolojn en kaj pri Esperanto. Ci-rilate multon faras cehaj esperantistoj, aparte *Miroslav Malovec*⁵⁸.

Gravaj novaj iniciatoj, lige al la grandegaj ebloj de elektronika storado estas la t.n. elektronikaj bibliotekoj. Al tiuj apartenas *Project Gutenberg*, iniciato startita en 1971 de la usonano *Michael S. Hart*. Temas pri biblioteko en la Interreto, kiu konsistas el elektronikaj versioj de fizike ekzistantaj libroj, kie rajtoj (Copyright) ne malhelpas la publikigon.⁵⁹

Kadre de la projekto estas storitaj pli ol 90 libroj de Esperantaj aŭtoroj.⁶⁰

⁵² Pri la kondicioj por ricevi subvenciojn vidu <http://esperantic.org/en/research> kaj Informilo por Interlingvistoj 15 (2006) Nr. 57 (2/06), krome en Interlinguistische Informationen 15 (2006) Nr. 59 (2/06).

⁵³ Kp. Esperanto 7-8/2005, p. 151 kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Biblioteka_Apogo_Roma_kaj_Poul_Thorsen.

⁵⁴ Kp. <http://www.fame-stiftung.de/index.htm>

⁵⁵ La angla nomo de la originale esperanta Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj “ (CED) estas uzata aparte por la agado ekstera.

⁵⁶ Kp. http://groups.yahoo.com/group/Esperanto_fonds_Cesar_Vanbiervliet/. www.esperanto-kortrijk.be/esperantofonds_eo.html.

⁵⁷ En la 3-a eldono de 1995 oni mencias nur 5 bibliotekojn.

⁵⁸ Vidu la raporton en Starto 1/2004, p.10.

⁵⁹ Kp. http://de.wikipedia.org/wiki/Project_Gutenberg kaj http://en.wikipedia.org/wiki/Project_Gutenberg

⁶⁰ <http://www.gutenberg.org/browse/languages/eo>. Vidu ankaŭ [http://www.gutenberg.org/wiki/Esperanto_\(Bookshelf\)](http://www.gutenberg.org/wiki/Esperanto_(Bookshelf))

Simila projekto, financata de Europa Unio, estas la cifereca biblioteko Europeana. "Gi ebligis al uzantoj la aliron al enhavoj de europaj muzeoj, bibliotekoj kaj arkivoj. Lau tiu projekto en europaj bibliotekoj kuras pli ol 2,5 miliardoj da libroj, de kiuj en cifereca formo ĝis nun alireblas nur ĉirkaŭ 1 %. Levigas la demando, ĉu kaj kiom da planlingvaj titoloj eniros la projekton. Por atingi tion necesas profesinivelaj klopodoj."⁶¹

3.5 Prezento de enhavo

Grava helpilo por trovi fakan literaturon estas la **bibliografioj**. Ili povas havi malsaman strukturon. Plej ofte ili estas ordigitaj laŭ aŭtoroj aŭ laŭ unu aŭtoro (persona bibliografio), sed ekzistas ankaŭ bibliografioj laŭ fakoj resp. temoj, laŭ eldonejoj (ekz. listo de ĉiuj publikaĵoj de difinita eldonejo), periodaĵoj⁶² kaj laŭ aliaj kriterioj. Do, bibliografio informas pri tio, **kie** ekzistas.

Por ekscii, **kie** io ekzistas, necesas informigi pri la enhavo de difinita biblioteko. Pri tio ĉefe informas katalogoj.

Katalogoj prezentas la materialon de difinitaj institucioj aŭ de privataj kolektoj laŭ certa ordo kun preciza trovloko de difinitaj libroj, dokumentoj aŭ aliaj materialoj. Pli kaj pli da planlingvaj kolektoj intertempe posedas diversformajn kaj diverstipajn katalogojn. Antaŭ c. dudek jaroj mi prezentis liston da katalogoj kaj bibliografioj (Blanke 1985: 302-304). La kvanto intertempe certe duobligis. Ankaŭ ekzistas katalogoj, kiuj listigas aktojn ks., tio ekz. validas por la planlingva postlasaĵo de *Hugo Schuchardt* (Slaje 1987) kaj pri la enhavo de *Fritz-Hüser-Instituto en Dortmund/Germanio* (Noltenius/Palm/Vogt 2005, Proskovec 2008).

Tute novajn eblojn prezentas la **interreto**, kie troviĝas pli kaj pli da planlingvaj katalogoj.

Pri la arkivaj materialoj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA 1965-1990) troviĝas informoj en la reto.⁶³ Parto de la postlasaĵoj de *Gaston Waringhien* kaj *Kálmán Kalocsay*, nome partoj de iliaj korespondaĵoj, ankaŭ troveblas tie⁶⁴. Por celkonscie orientigi en arkivoj servas t.n. serĉlibroj (trovlibroj), kiuj pli kaj pli estas enretigitaj.

Nekompleta superrigardo⁶⁵ ilustru, kion oni povas trovi en la reto⁶⁶:

Austria Nacia Biblioteko kun la planlingva katalogo Trovanto (Vieno):

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue Internationale (CDELI),

(La Chaux-de-Fonds): <http://opacrbnj.rero.ch/gateway>

Germana Esperanto-Biblioteko (Aalen): <http://esperanto-bibliothek.de.nr/>

Brita Esperanto-Biblioteko Butler (Barlaston): www.biblbut.org

Japana Esperanto-Instituto (Tokio): http://www.jei.or.jp/hp/materialo/bibli_e.htm

Biblioteko de GDREA en la Germana Federacia Arkivo (sekcio SAPMO):

⁶¹ http://ec.europa.eu/deutschland/press/pr_releases/7975_de.htm, ankaŭ vidu: <http://dev.europeana.eu/about.php>.

⁶² Sub la gvido de *Árpád Mathé* estas preparata bibliografio de periodaĵoj, kies aperigon oni atendas en 2009. Vidu lian kontribuon en ĉi-tiu volumo

⁶³ http://www.bundesarchiv.de/aufgaben_organisation/abteilungen/sapmo/01097/index.html#ziel_1_11

⁶⁴ <http://www.vanoostendorp.nl/interlinguistiek/kalocsay.kaj.waringhien/>

⁶⁵ Pro utilaj kompletigoj mi dankas *Miroslav Malovec* (DB).

⁶⁶ Ankaŭ vidu: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-biblioteko>. La superrigardo de *Martin Weichert* bedaŭrinde ne estas aktualigata: www.esperanto.net/veb/.

http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm

Biblioteko de Flandra Esperanto-Ligo (Antverpeno):

http://www.esperanto.be/cgi-bin/mal/Database_manager/db_manager.cgi

Hispana Esperanto-Muzeo http://users.telenet.be/ikef/rr_hem.html

Esperanto-Bibliotekoj en Ĉeĥio⁶⁷:

<http://mujweb.cz/Veda/traxler/bibliot.htm>

Esperanto-Kolekto de Karóly Fajsz en la Hungara Fremdlingva Biblioteko (Budapest):

www.oik.hu

Esperanto-kolekto Ĉesar Vanbiervliet en la urba biblioteko de Kortrijk/Belgio:

http://www.esperanto-kortrijk.be/esperantofonds_eo.html

Biblioteko de William Auld en la Skota Nacia Biblioteko (Edinburgh):

<http://www.nls.uk/collections/rarebooks/news/>

Biblioteko kaj arkivo de la katalano Petro Nuez (Barcelono):⁶⁸:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Biblioteko-Arkivo_Petro_Nuez

Esperanto-Biblioteko Ljbraro Ludovika en Halifax (Nova Skotlando/Kanado):

<http://genekeyes.com/Enkonduko.html>

Scienca kaj teknika biblioteko (kompilas László Szilvási): <http://eventoj.freeweb.hu/steb/>

Krom tio menciidas diversaj provoj arkivi librojn⁶⁹ kaj gazetojn.⁷⁰

3.6 Ebloj de utiligo de kolektoj

La ampleksaj planlingvaj kolektoj malmulton valoras, se ili ne estas utiligeblaj de studentoj, esploristoj kaj aliaj interesitoj. Pro tio necesas havi praktikajn informojn pri la uzebloj. Aparte la menciitaj komunumaj kaj stataj kolektoj kutime disponas pri bone ekipitaj legejoj kaj teknikiloj. Tamen ankaŭ multaj privataj kolektoj estas tre valoraj kaj povas al esploristoj disponigi konvenan materialon.

4 Kelkaj kriterioj por priskribi la kolektojn

Mi ellaboris kelkajn kriteriojn, laŭ kiuj oni eventuale povas karakterizi planlingvan kolekton, ĉu privatan ĉu publikan. La trarigardo de la kriterioj eble konsciigos pri multaj problemoj nesolvitaj. Supozeble estus utile, aldoni pliajn kriteriojn. Ankaŭ eblas kunigi iujn al unu. Do, la listo estas nur propono:

(1) **Cefa tipo:** kutima biblioteko, arkivo, muzeo (kun transiroj inter la tri tipoj).

⁶⁷ Rigardu ankaŭ:

- Faka Biblioteko de CEA <http://www.esperanto-praha.net/biblioteko.htm>
- Kluba biblioteko de Brno <http://www.medy.cz/Brno-Esperanto/Bib-Brno.htm> (Mi dankas Miroslav Malovec pro la informojn).

⁶⁸ Vidu http://eo.wikipedia.org/wiki/Pere_Nuez_P%C3%A9rez

⁶⁹ Ekz. <http://esperanto.net/literaturo/index.html>

⁷⁰ Ekz. www.gazetotekolanti.com kaj www.gazetejo.org

(2) **Jura statuso:** formo de posedo: proprajo de privatulo, Esperanto-organizajo (kluba, regiona, tutlanda, internacia), au de stata biblioteko, universitato, muzeo au alia institucio.

(3) **Memstareco:** memstara kolekto au parto de iu alia [universitata au alispeca (ne)stata] institucio ktp.

(4) **Amplekso:** kvanto da materialo.⁷¹

(5) **Specialigo:** ekz. nur esperantajoj au ankau materialoj pri aliaj planlingvoj; specialigo pri belestro, scienc-teknika literaturo, laborista movado, revuoj k.s.

(6) **Registigo:** (ne)ekzisto de katalogo.

(7) **Kataloga tipo:** presita au surdisk(ed)a katalogo, elektronika aliro en la reto.

(8) **Ordigo:** formo de ordigo (lau nacia au internacia normo, dekuma klasifiko au propra sistemo), alfabeto au enhave ordigita ktp.

La principoj de registrado povas malsami ce la unuopaj bibliotekoj, kio povas malhelpi al komuna kataloga laboro.

La interna ordo de la Brita Esperanto-Biblioteko, nomita lau gia fondinto kaj bibliotekisto *Montague C. Butler* (1884-1970)⁷², ekzemple bazigas sur speciale de Butler ellaborita klasifiko (Butler 1950)⁷³.

Foje ekzistas kolektoj tute sen katalogo. La kialo ne devas nepre esti la manko de tempo kaj laborforto. La biblioteko de *Eugen Wüster* ekzemple estis ordigita lau la decimala klasifiko, kiun la posedanto parkeris.

(9) **Flegateco:** grado de flego, ordo, kvalita stato de papero kaj bindo.

(10) **Prizorgateco:** diversspeca (ne)regula (au manko de) prizorgado flanke de salajrulo au volontulo.

(11) **Priskribiteco:** priskribo de la kolekto en studoj au aliaj formoj, eventuale eldono de pribiblioteka bulteno kun registro de novaj akirajoj.

(12) **Geografia situo:** trafika atingeblo.

(13) **Alireblo:** viziteblo, uzebleco por interesigantoj.

(14) **Pruntservo:** eblo pruntepreni materialojn, ligiteco al la interbiblioteka (inter)nacia pruntservo.

(15) **Uzateco:** prunteblo au alispeca uzeblo, malofta au ofta uzado.

(16) **Aktualeco:** kolekto malnova kaj fermita au daure aktualigebla kaj aktualigata.

⁷¹ Sub http://encyclopedia.kids.net.au/page/es/Esperanto_libraries oni trovas informojn pri kvantoj de kelkaj kolektoj. Tamen mankas klaraj kriterioj, kion oni kalkulas (volumoj, jarkolektoj de revuoj binditaj au nebinditaj ekzempleroj, flugfolioj, duoblajoj ks.). Necesas difini, kio estas biblioteka unuo. "La informoj de la unuopaj kolektoj do ne estas ciam kompareblaj.

⁷² Kp. http://en.wikipedia.org/wiki/Montagu_C._Butler.

⁷³ *Geoffrey King* ellaboris alian sistemon, resp. prilaboris tiun de Butler. http://biblbut.org/html/pri_la_klasifo.html, http://biblbut.org/html/klasifo_00.html.

(17) **Teknika ekipo:** ekzisto de modernaj bretaroj, kestoj, komputiloj, kopiiloj, bindiloj, mikrofotiloj ktp., laborloko por esplorantoj, sed ankaŭ humidec-stiriloj, alarmiloj, fajro-estingiloj ks.

(18) **Tipo de ejo:** teknika konveneco, trovebleco, spaco, (mal)eblo facile orientigi k.s.

(19) **Stabileco:** tipo de pozicio kaj perspektivo, gradoj de minacoj.

(20) **Financoj:** regulaj aŭ okazaj subvencioj, deveno de la monfonto aŭ manko de ajna financa subteno.

(21) **Programfunkcio:** biblioteko, muzeo k.s. sen aŭ kun akompanaj klerigaj programoj (seminarioj, kolokvoj, ekspozicioj, gvidadoj).

(22) **Eldonebleco:** ĉu kun aŭ sen propra eldonejo, tipo de la eldonejo ([mal] profesia)?

(23) **Kunlaboro:** kontaktoj, kunlaboro kun aliaj bibliotekoj, intersango de duoblajoj, reciproka helpo ktp.

(24) **Impulsoj:** ĉu el la biblioteko, muzeo ktp. eliras impulsoj utilaj por la nacia aŭ/kaj internacia biblioteka pejzago?

(25) **Prestigo:** pozicio en la (inter)nacia biblioteka pejzago, grado de konateco, faka registrigo (ekz. en pribibliotekaj manlibroj) k.s.

5 Kion necesas fari?

Eblas fari longan liston da farendadoj. Mi klopodas menciigi kelkajn, laŭ mi ĉefajn:

(a) En la Esperanta lingvo-komunumo necesas vekigi la **konscion** pri la graveco de la temo. Necesas uzi diversstipajn arangojn por informi pri la problemoj, i.a. la Universalajn Kongresojn de Esperanto.

(b) Kompetentaj fakuloj ellaboru **strategion** pri sistema kaj kontinua prizorgado de bibliotekoj, arkivoj kaj aliaj kolektoj. La materialo konsideru la internaciajn bezonojn kaj estu adaptebla al la ofte malsamaj naciaj bezonoj.

(c) Necesas **registrado kaj priskribo** de ĉiuj iom gravaj planlingvaj kolektoj, katalogoj kaj bibliografioj en nacia kaj internacia skaloj.

(d) Necesas komenci la kreadon de kiom eble plej kompleta kaj daŭre aktualigenda **centra elektronika bibliografio** de publikaĵoj en kaj pri Esperanto (kaj pri aliaj gravaj planlingvoj). De tempo al tempo la bibliografio aperu en papera formo. (Respondo al: *Kio entute ekzistas?*)

(e) Lige al (d) estu iom post iom ellaborata **centra elektronika katalogo**, kiu registru la libran kaj arkivan materialojn de kiom eble plej multaj kolektoj (Respondo al: *Kie troviĝas kio?*).

(f) Kreo de **institucioj** (ĉe naciaj aŭ internaciaj Esperanto-organizaĵoj), kiuj sisteme okupigu pri problemoj de kolektoj. Ili i.a. konsciigu materialhavajn esperantistojn, ke ili antaŭzorgu pri siaj kolektoj, pensu pri ties estonteco.

(g) Kreo de **reto de informado, impulsado, kunlaboro kaj reciproka helpo** de la bibliotekoj kaj arkivoj, i.a. por distribuado aŭ intersangado de duoblajoj; donaco de duoblajoj al nove fonditaj bibliotekoj aŭ subten-bezonaj organizaĵoj en malricaj landoj ktp.

- (h) Certigo de daŭra **financa subteno** uzante planlingvajn kaj aliajn monfontojn.
- (i) Surbaze de (a gis (h) ellaboro de **baza dokumento** pri la situacio kun ciuj aspektoj. La dokumento ekzistu kaj en printita kaj en elektronika formoj (en la reto) kaj estu aktualigata de tempo al tempo, respektive kontinue.

Mallongigoj

ANB	Austria Nacia Biblioteko (= Österreichische Nationalbibliothek, ÖNB)
ARKONES	Artaj Konfrontoj en Esperanto
BEA	Bulgara Esperanto-Asocio
CDELI	Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue Auxiliaire Internationale
GDREA	internacie kutima mallongigo por Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR: Germana Demokratia Respubliko Esperanto-Asocio
GIL	Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (Societo pri Interlingvistiko)
kp.	komparu
KAEST	Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko
SAPMO	Stiftung Archiv der Parteien und Massenorganisationen der DDR im Bundesarchiv (Fondajo arkivo de partioj kaj amasorganizoj de GDR en la germana federacia arkivo).
TU	Technische Universität (Teknika Universitato)
UEA	Universala Esperanto-Asocio

Bibliografio

BECKER, Ulrich/ WOLLENBERG, Fritz (1998, Red.): Eine Sprache für die Wissenschaft? Öffentliches Interlinguistik-Gedenkkolloquium für Wilhelm Ostwald am 9. November 1996, an der Wirtschaftswissenschaftlichen Fakultät der Humboldt-Universität zu Berlin, veranstaltet von der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL), der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen und der Esperanto-Liga Berlin. *Interlinguistische Informationen, Beiheft 3*. Berlin: GIL, 120 p.

BENEDETTI, Amedeo (2008): L'artificio universale. L'esperanto e la Biblioteca Nazionale di Massa. *Charta*, Vol. 17, Nr. 5-6:60-63.

BLAHU, Marek (2008): Vorschlag zur Schaffung eines Superkatalogs und digitalen Archivs der Esperanto-Literatur im Internet. *Blanke 2008a*: 91-95.

BLANKE, Detlev (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag, 408 p.

BLANKE, Detlev (1997a): Kia sorto por la bibliotekoj? *Esperanto* 90, Nr. 3: 42-43.

BLANKE, Detlev (1997b): Migranto, se vi venos al San Pau d'Ordal .. *Esperanto aktuell* 2-3/1997, p. 1-2.

BLANKE, Detlev (2006a): Interlingvistika arkivo kaj biblioteko de Wera kaj Detlev Blanke. *Wollenberg 2006*: 157-162.

BLANKE, Detlev (2006b): *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Frankfurt/Main ktp.: Peter Lang, 405 p.

BLANKE, Detlev (2007a): Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj – kelkaj problemoj. *Pluhar, Zdenek (Red.): Lingvo kaj interreto kaj aliaj studoj*. Dobrichovice: Kava-Pech [134 p.]: 75-81

- BLANKE, Detlev (2007b): *Esperanto kaj Socialismo? Pri la movado sur la "alia flanko"* (Dua, reviziita eldono), New York: Mondial, 64 p.
- BLANKE, Detlev (2007c): Ni konservu la scion! *La Ondo de Esperanto*, Nr. 6/2007, p. 8-9.
- BLANKE, Detlev (2008a, Red.): Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2007, in Berlin. *Interlinguistische Informationen, Beiheft 15*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 157 p.
- BLANKE, Detlev (2008b): Probleme plansprachlicher Bibliotheken und Archive. *Blanke 2008a*: 9-32.
- BURKHARDT, Adolf (1994): Aalen. Deutsche Esperanto-Bibliothek. *Kehr, Wolfgang (Hrsg.): Handbuch der historischen Buchbestände in Deutschland*. Bd. 7. Baden-Württemberg und Saarland. A-H. Hildesheim, Zürich, New York: Olms-Weidmann [309 p.], p. 41-43.
- BUTLER, Montagu C. (1950): *Klasifo de Esperantaj temoj*. Bergen-op-Zoom: Esperanto Film-Grupo, 144 p.
- CARLEVARO, Tazio/ HAUPENTHAL, Reinhard (1999): *Bibliografio de Ido*. Bellinzona: Hans Dubois/ Saarbrücken: Edition Iltis, 193 p.
- Catalogi Kunsttalen I (1969). *Esperanto. Catalogus van de boekerij de Nederlandse Esperantistenvereniging "La Estonto estas nia" en van de Esperanto-collectie in de Universiteitsbibliotheek. Eerste Deel*. (Speciale Catalogi, Nieuwe Serie, No. 5), Amsterdam: Universiteitsbibliotheek, 338 p.
- Catalogi Kunsttalen II (1969). *Esperanto. Catalogus van de boekerij de Nederlandse Esperantistenvereniging "La Estonto estas nia" en van de Esperanto-collectie in de Universiteitsbibliotheek. Tweede Deel*. Tijdschriften –en Serietitel. (Speciale Catalogi, Nieuwe Serie, No. 5), Amsterdam: Universiteitsbibliotheek, 56 p.
- DIJK, Ziko van (2008): Die Hector-Hodler-Bibliothek 1908-2008 - Symbiose von Vereins- und Fachbibliothek. *Blanke 2008a*: 79-86.
- ESTERHILL, Frank (2000): *Interlingua Institute: A History*. New York: Interlingua Institute, 106 p.
- GACOND, Claude (2004): Naissance du CDELI. *Hauptenthal, Irmi/ Hauptenthal, Reinhard (2004, Hrsg.): Esperante kaj Ekumene. Fest-libro por la 75a naskig-tago de Adolf Burkhardt*. Schliengen: Edition Iltis [368 p.], 119-128.
- GAGLIARDI, Giulia (2007-2008): *Giuseppe Peano e il Latino sine flexione. Un matematico alla ricerca di una lingua per la comunicazione internazionale*. Tesi di laurea. Università degli studi di Torino. Facoltà di lettere e filosofia. Anno Accademico 2007-2008, 555 p. (Ekspertizanto: Fabrizio A. Pennacchietti).
- GJIVOJE, Marinko (1980): *Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj*. Zagreb: Autor, 55 p.
- HARJU, Paula (1992): *Esperantolitteraturen*. Vid ? bo Stadsbibliotek. En bibliografi, 49 p.
- HARTWIG, Sebastian (2006): Finfine stata zorgo pri Esperanto. *Wollenberg 2006*: 156.

- HAUPENTHAL, Reinhard (1977): *Katalog der Plansprachenliteratur der Universitätsbibliothek Saarbrücken. Katalogo de la planlingva literaturo de la universitata biblioteko Saarbrücken*. Saarbrücken: Saarländischer Esperantobund e.V., 50 p.
- HAUPENTHAL, Reinhard (1982): Volapük-Bibliographie. *Beigebunden in: Schleyer, Johann Martin (1982), Volapük. Die Weltsprache*. Hildesheim: Olms, 124 p.
- Katalogo 1989...: *Katalogo pri „Ossaka Kolekto“ de la Biblioteko de JEI*. Tokio: Japano Esperanto-Instituto 1989, 173 p.
- KOLBE, Ino (1996): *Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (Westsachsen). Teil I und II. Von den Anfängen bis zum Verbot 1933. Teil I: Von den Anfängen bis zum „Völkerspiegel“ (1924); Teil II: 1925 bis zum Verbot (1933)*. Eine kommentierte Dokumentation. Herausgegeben, kommentiert und bearbeitet von Detlev Blanke. Leipzig: Sächsischer Esperanto-Bund. 64+VIII+135+23.
- LINS, Ulrich (1991): Respondo al malesperaj krioj. *Esperanto* 84, 12: 225.
- LINS, Ulrich (1995a): Biblioteko pli kaj pli rica. *Esperanto* 88, 7-8: 121.
- LINS, Ulrich (1995b). Die Hodler-Bibliothek in Rotterdam. *Interlinguistische Informationen* 4, Nr. 5-6: 8-11 (Angla versio A, Little-Known Linguistic and Cultural Treasure: The Hector Hodler Library in Rotterdam, *Language Problems and Language Planning* 19 [1995]2: 185-187; kiel aŭtoron oni erare menciis Humphrey Tonkin).
- LINS, Ulrich (1998): Das Esperanto-Archiv im Fritz-Hüser-Institut. *Mitteilungen des Förderkreises Archive u. Bibliotheken zur Geschichte der Arbeiterbewegung*, Nr. 13: 2-4.
- LIPARI, Michela (2008): La renesanco de Esperanto-bibliotekoj. *Esperanto* Nr. 7-8: 157.
- MAIER, Utho/ SCHAEFFER, Karl-Heinz (2007): *La germana Esperanto-Biblioteko. Hierau, hodiaŭ – kaj kio morgau?* Aalen: Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen, 25 p., Man.
- MALOVEC, Miroslav (2008): Ni bezonas grandskalan elektronikan arkivon. *Starto* Nr. 2, p. 61.
- MAYER, Herbert (2008): Eine traditionelle Bibliothek und neue Herausforderungen (Die Sammlung Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek). *Blanke 2008a*: 33-36.
- MAYER, Herbert/ FETES, Katinjo (2006): En la ventre de la Kolekto por Planlingvoj. *Esperanto* 99, Nr. 6: 124.
- MONTAGNER, Andrea (2002): *Catalogo di Esperanto*. Milano: Libera Università di Lingue e Comunicazione IULM. Biblioteca, 361 p.
- NOLTENIUS, Rainer (Hrsg.)(1993): *Den Arbeitern aller Länder eine Sprache! Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung. Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon! Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado*. Informationen 37/93. Katalog zur Ausstellung des Fritz-Hüser-Instituts Dortmund. Dortmund: Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiter-Literatur (Tekstoj en la germana kaj Esperanto), 113 p.

- NOLTENIUS, Rainer/ PALM, Hanneliese/ VOGT, Gregor (2005, Hrsg.): *Literatur und Kultur der Arbeitswelt: Inventar zu Archiv und Bibliothek des Fritz-Hüser-Institut*. München: Saur, 420 p.
- PABST, Bernhard (2003): EBEA - Retrobibliographierung nichtmonographischer Literatur zum Esperanto. *Blanke, Detlev (Red.): Plansprachen und elektronische Medien. Interlinguistische Informationen, Beiheft 9*. Berlin: GIL, [201 p.], p. 64-76. (ankau vidu <http://www.interlinguistik-gil.de/ebealink.html>)
- PABST, Bernhard (2008): Die Esperanto-Sammlung des Gustav Kühlmann –dänischer Arbeiter-Esperantist 1912-1999. *Blanke 2008a: 87-90*.
- PATAKI-CZELLER, Mária (1991, Red.): *Katalogo de la Esperanto-Kolektajo de Károly Fajsz Budapeŝt. Libroj. Parto I*. Budapest: Országos Idegennyelvű Könyvtár, 542 p.
- PROSKOVEC, Jiri (2008): Das Fritz-Hüser-Institut und seine Esperantosammlung. *Blanke 2008a: 57-98*.
- SIKOSEK, Marcus Ziko (2004a): Books and their association. The history of the Hector Hodler Library. *Language Problems & Language Planning* 28: 45-73.
- SIKOSEK, Marcus Ziko (2004b): ABC und M für Esperanto. Die Vielfalt der Esperanto-Bibliotheken macht den Unterschied. *Esperanto aktuell* 23, Nr. 2:18; Nr. 3:22-23.
- SLAJE, Walter (1987): Plansprachliche Materialien im Nachlass Hugo Schuchardt. *Anzeiger der Österreichischen Akademie der Wissenschaften. Philosophisch-Historische Klasse*, 124 (1987), Nr. 1-0: 250-263.
- SMITH, Karin/ HAAKE, Susan (1978): *Catalog of the George Alan Connor Esperanto Collection*. Oregon: University of Oregon Library, Special Collections Division, 121 p.
- Stedelijke .1987: *Stedelijke Openbare Bibliotheek Leuven. Esperanto-catalog*. Leuven, 31 p.
- STENSTRÖM, Ingvar (2003): Veröffentlichungen in und über Occidental-Interlingue. *Interlinguistische Informationen* 12, Nr. 48-49: 2-10.
- SZIMKAT, Annakris (2006): Dokumentoj cirkau la morto de unu biblioteko. *Hauptenthal/ Hauptenthal 2004: 201-210*.
- ULRICH, Grit (2008): Die Stiftung Archiv der Parteien und Massenorganisationen der DDR im Bundesarchiv und Unterlagen zu Esperanto in den Beständen der Stiftung und des Bundesarchivs. *Blanke 2008a: 37-44*.
- WOJTAKOWSKI, Edward T. (1979): *Decimala katalogo de la planlingva literaturo ce universitata biblioteko de la Katolika Universitato en Lublino (K.U.L.)*. Katalog dziesiętny księgozbioru esperanckiego w bibliotece uniwersyteckiej K.U.L. Romo-Lublino: I.K.U.E.-Centro, 303 p.
- WOLLENBERG, Fritz (1998): Der Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zu interlinguistischen Problemen. *Becker/Wollenberg 1998: 32-107*.

- WOLLENBERG, Fritz (2006, Hrsg.): *Esperanto - Sprache und Kultur in Berlin. Jubiläumsbuch 1903-2003. Esperanto –Lingvo kaj Kulturo en Berlino. Jubilea Libro 1903-2003*. New York - Berlin: Mondial, 368 p. (Esperanto und Deutsch).
- WOLLENBERG, Fritz (2008): Plansprachen im Archiv der Berlin-Brandenburgischen Akademie der Wissenschaften. *Blanke 2008a*: 45-56.
- ZILVAR, Peter (2003): Bibliotekoj kaj muzeoj rilate al Esperanto. *Scienca Revuo* 54, n-ro193: 75-82.
- ZSEBEHÁZY, György 2005, Red.): *Katalogo de la Esperanto-Kolektajo de Károly Fajsz Budapest. Libroj. II. parto*. Budapest: Országos Idegennyelvu Könyvtár, 506 p.

Utho Maier
Karl Heinz Schaeffer

La stato de la 100-jara Germana Esperanto-Biblioteko Aalen en la jaro 2008¹

Historio kaj perspektivoj

Enhavo

- 1 Antaŭparolo
- 2 Enkonduko al la temo
- 3 Historio de Germana Esperanto-Biblioteko
- 4 Aktuala stato
- 5 Perspektivoj
- 6 Resumo tipologia
Bibliografio kaj fontoj

1 Antaŭparolo

Pasis jam multaj jaroj post la unua eldono de broŝuro pri la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen.² Do necesis iu adapto aktualiga al la nuna stato. Bonvena instigo al tiu reviziado estis kolokvo en Vieno pri Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj, al kiu ni estis invititaj. Ni volonte kontribuis al ĝi prelegeton, jam antaŭgojante la diskuton kun multaj diversaj samcele laborantoj en tiu ĉi kampo. Por tiu kolokvo ni modifis ĝian subtitolon al Ĥierau, hodiaŭ kaj kio morgau? ” Ankau la lingvajon ni iom adaptis al la precipa celo, prezenti buse la enhavon.

Car jam semajnojn antaŭ la kolokvo montrigis, ke partoprenos multaj prelegantoj, do ke okazos rondeto de fakuloj, ĉiu preleganto estis devigita koncizigi sian prelegon al duona horo kaj ĉe rezervi suŝican tempon por posta diskutado. Tial necesis reverki la tekston al preskau rĉsumo ĥri La stato de la 100-jara Germana Esperanto-Biblioteko Aalen 2008 .”

Tiu ĉi resuma prelego aperis aparte³ kaj jam antaŭ la kolokvodato, havebla tra nia tut-tera retejo:http://esperanto-bibliothek.gmxhome.de/broschur/espbib_eo/vieno2007/GEB_2008_resumo_konciza.pdf

2 Enkonduko al la temo

Tuj post la naskigo de la Internacia Lingvo Esperanto en Julio de 1887, okulfrape montrigis diferenco kontraste al naciaj lingvoj: kiel lingvo planita, Esperanto komence evoluis el unuavice skribita al parolata lingvo. Do tuj ekde la komenco prosperis la Esperanta libro-produktado: en

¹ Lau la 4-a eldono (2008) de broŝuro pri la Germana Esperanto-Biblioteko, iom modifita de Utho Maier kiel resuma prelego La stato de la 100-jara Germana Esperanto-Biblioteko Aalen - 2008 ĥor la Viena kolokvo pri planlingvaj bibliotekoj. Tiu broŝuro ne estas multfoje presita, sed havebla precipe tra la interreto, kp. MAIER (2007).

² SCHAEFFER (2003).

³ MAIER (2007).

1888, fine de la dua jaro, ekzistis jam 29 libroj; tiu kvanto kreskis al 75 libroj en 1895, kaj dum la jaro 1912 oni jam povis rigardi al entute 1.989 Esperanto-libroj.⁴

Nuntempe ekzistas jam multaj biblioteko, kiuj kolektas Esperanto-librojn aŭ pli generale librojn pri planlingvoj kaj interlingvistiko. Certe neniu el ili disponas pri *ĉiuj* Esperanto-eldonaĵoj ĉar se ni rigardus nur la malnovajn ĉiokaze ĝi fiera kaj tute prave fanfaronus pri tiu informo en la mondo, ĉu gazeto, vikipedio, interrete.

Grandaj Esperanto-biblioteko (krom nia Germana Esperanto-Biblioteko en la urbo Aalen)⁵ troviĝas en Barlaston⁶, Vieno⁷, Sofio, La Chaux-de-Fonds kaj en Roterdamo⁸, kaj rimarkindajn havaĵojn posedas en Germanujo la Bavara Stata Biblioteko de Munkeno kaj la biblioteko de la universitatoj Kolonjo, Munkeno, Saarbrücken⁹ kaj Frankfurto. Sed certe la plej ampleksa Germana kolekto troviĝas en Aalen: la Biblioteko de la Germana Esperanto-Instituto, kiu ekde 1989 nomigas Germana Esperanto-Biblioteko Aalen (Biblioteko de la Germana Esperanto-Instituto).

3 Historio de Germana Esperanto-Biblioteko¹⁰

La naskigo de nia biblioteko estas dense ligita kun la nomo *d-ro Albert Schramm*¹¹ (1880-1937). En 1906 li komencis helpi dum la restarigo de Esperanto-societo Dresdena. La unua oficiala Esperanto-Biblioteko en Germanujo farigis la Biblioteko de la Saksa Esperanto-Instituto, de Schramm fondita en Aŭgusto 1908. Albert Schramm laboris kiel parlamenta stenografisto kaj bibliotekisto ĉe la Saksa Stenografia Instituto (*Sächsisches Stenographisches Landesamt*) en Dresdeno, kaj ĝis 1914 li estis la unua direktoro de la nova Saksa Esperanto-Instituto. Kiel homo tre lerta, li montrigis eminenta fakulo en ĉiuj aferoj, kiuj rilatas al libroj, presado, ilustrado kaj skribo. Ekzemple en 1913-1928 li estis direktoro de la Germana Muzeo pri Libro kaj Literaturo (*Deutsches Buch- und Schriftmuseum*) en Lipsiko. En 1929 li ĉar fondis kaj ekestris bibliotekistan lernejon (*Bibliothekarschule*) en Lipsiko.

Je la 12-a de Novembro 1908 la Saksa Stato agnoskis la Esperanto-Instituton kaj ankaŭ ties bibliotekon. La Instituto estis sub protekto de la Rega Saksa Stata Ministerio pri Internaj Aferoj. En la jaro 1913 la instituto kaj biblioteko sangis sian sidejon de Dresdeno al Lipsiko, ĉar Schramm tie ricevis la postenon de muzeodirektoro. Kiel financa subtenanto por tiu biblioteko grave distingigis *Albert Steche* (1862-1943)¹², kiu inter 1909 kaj 1918 estis membro de la Saksa Parlamento. En tiu pozicio li kelkfoje sukcesis akiri statajn subvenciojn. Kvin jarojn poste la publike alirebla biblioteko en la urbocentro de Lipsiko posedis ĉirkaŭ 1 200 titolojn (sed ili ne ampleksis ĉiujn ĝisdatajn eldonaĵojn).

Ĉar intertempe la instituto ne plu laboris nur por Saksujo, sed por la tuta Germanujo kaj ĉar mondvaste, oni post la unua mondmilito sangis ĝian nomon al Esperanto-Instituto por la Germana Regno. Sub la nova direktoro *Johannes Dietterle* (1866-1942)¹³ pli kaj pli kreskis la havaĵo de tiu biblioteko, sed ankaŭ la amplekso de la institutaj taskoj. Ĉefaj institutaj okupoj, pri kiuj respondece laboris ankaŭ *Elisabeth Wunderlich* (1889- ?), estis la informado pri Esperanto-organizaĵoj, laŭ propra material-kolekto, pri instrumaterialoj, pri lingvaj demandoj kaj pri la mondvasta disvastigado

⁴ Lau BURKHARDT (1977, p. 33).

⁵ La situacion ĝis 1980 priskribas GJIVOJE (1978).

⁶ Kp. <http://www.biblbut.org> kaj <http://www.biblbut.org/html/mcb.html>.

⁷ Kp. <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm> kaj la presitajn katalogojn de Steiner (1957, 1958) kaj Hube (1975).

⁸ Kp. http://ttt.uea.org/esperanto_p/servoj/biblioteko.html.⁹Kp. la katalogon de HAUPENTHAL (1977).

¹⁰ Pri la historio de la biblioteko kp. BURKHARDT (1977, 1994).

¹¹ Pri Schramm kp. HAUPENTHAL (1983, 1985, 1987).

¹² Pri Steche kp. J. DIETTERLE (1921).

¹³ Pri J. Dietterle kp. H.-B. DIETTERLE (2000, 2001).

de la lingvo.¹⁴ Certe apartenis al tiuj taskoj ankau la fontokolektoj pri sciencaj laboroj kaj ties registrado en kaj pri Esperanto.

Meze de la jaro 1936¹⁵ ciuj asocioj de artefaritaj lingvoj en la Germana Regno estis dissolvitaj, do ankau Germana Esperanto-Asocio. Kaj fine de tiu ci jaro ankau la tradicirica Instituto devis cesigi sian laboron. Sekve nun ne plu ekzistis financrimedoj por luado de bibliotekcambroj, kaj la libroj estis tute sen hejmo. Por eviti ilian makulaturigon, Steche ofertis ilin unue al la Germana Biblioteko de Lepsiko, kiu ne pretis transpreni ilin. Sed poste la Prusa Stata Biblioteko en Berlino pro sia pli universala karaktero, transprenis donace¹⁶ la pli ol 3000 bibliotekajn unuojn, kie ili ankoraŭ hodiaŭ troviĝas. Oni eĉ estis preta, pagi la koncernajn transportkostojn. Tiamaniere Steche kaj liaj kunbatalantoj sage sukcesis savi la librojn antaŭ ol okazis la Naziaj libroforbruligoj; sed por nia hodiaŭa Germana Esperanto-Biblioteko tio tamen restas perdo grava.^{17 18}

Post la dua mondmilito¹⁹ oni refondis en Munkeno la Germanan Esperanto-Instituton, al kiu la donacoj de eksterlandaj Esperanto-organizadoj kaj de germanaj esperantistoj formis modestan bazon de nova biblioteko; oni ankau povis transpreni la bibliotekojn de kelkaj gravaj esperantistoj.²⁰ Sed kiam en 1953 la estro de Germana Esperanto-Instituto, *Siegfried Ziegler* (1902-1984) subite rezignis pri sia ofico, oni fermis la bibliotekon kaj deponis ĝian enhavon en skatoloj kaj dislokiĝis ilin al diversaj Munkenaj keloj .”

Fine, en 1967 Germana Esperanto-Asocio donis novajn impulsojn al la Germana Esperanto-Instituto kaj planis rekonstrui ties bibliotekon. Tiam la Generala Asembleo decidis i. a. la eŝablon de biblioteko kaj ties daŭran funkcion .”Bazo de tiu biblioteko estu la skatolaj havaĵoj, restintaj en Munkenaj keloj. Kompreneble la Instituto nun ne nur havis la problemon trovi ĉion por la biblioteko, sed ankau necesis trovi personon, kiu kapablis fari adekvate la koncernan laboron kaj – eĉ pli malfacile – trovi homon, kiu pretas fari tiun laboron regule, zorgeme, fidele. Kaj ĝuste tiun homon oni trovis en la persono de pastoro *Adolf Burkhardt* (1929-2004), kiu krom sia emo fari la laboron ankau disponis pri sufiĉe da spaco en la granda pastora domo en Gechingen kaj pri sufiĉe da libera tempo. Krome li konis grupon de aktivaj junaj esperantistoj surloke, kiu ebligis kontinuan laboron.

Felice pastoro *Adolf Burkhardt* estis preta transpreni tiun taskon. Ekde la 3-a de Novembro 1967 li komencis ordigi la enhavon de la alvenintaj skatoloj. Somere de 1968 la interlingvisto kaj esperantologo *Reinhard Haupenthal* pasigis kelkajn tagojn en Gechingen, por helpi en la klasifika laboro. Ili kune tralaboris la tutan havaĵon²¹ kaj fine decidis apliki la Universalan Dekuman Klasifikon (UDK) en la formo adaptita al esperantaj temoj, kiun siatempe *Montagu Christie Butler* (1884-1970)²² proponis por la biblioteko de la Brita Esperanto-Asocio. Ĝi daŭre restas la bazo de nia klasifika laboro.

Pro praktikaj kialoj la Germana Esperanto-Biblioteko decidis uzi ankau diversajn krom-siglojn (siglojn) por klare distingi inter libroj, gazetoj ktp., en maniero, kiu similas al tiu de *Montagu Christie Butler*.

¹⁴ Pri tiu periodo kp. WUNDERLICH (1921, 1933).

¹⁵ Precize la 15-an de Julio 1936.

¹⁶ LINS (2000).

¹⁷ Taksebla lau *Verzeichnis der Königlich Sächsischen Esperanto-Bücherei* (1918).

¹⁸ SZIMKAT [t.e. R. HAUPENTHAL] (2004).

¹⁹ La 9-an de Januaro 1948.

²⁰ *Siegfried Ziegler* (1902-1984, Munkeno), *Leo Blaas* (1891-1951, Innsbruck), *Felix Epstein* (1882-1982, Hamburgo) kaj *Hans Rausch* (? -1988, Kolonjo).

²¹ HAUPENTHAL (1968).

²² BUTLER (1950).

Principe tiu siglo-sistemo, starigita tuj ekde la komenco, ebligis facilan kontakton kun similaj bibliotekoj, ec se gi ne estas en plena agordo kun la nova evoluo de la UDK-sistemo. Kelkfoje necesis al ni aldoni novajn siglojn; sed intertempe ni konvinkigis, ke prefere oni uzu malpli multajn diversajn siglojn, do ree ni forigis kelkajn, kaj pri la resto tamen ni devos daure pludiskuti tiun temon. Jam kune kun Burkhardt ni komencis forigi el la elektronika katalogo la gazetojn kaj registris ilin en aparta katalogo, iom modifita pro adapto al ties specifaj bezonoj. Nuntempe do estas je dispono du katalogoj diversaj: AAGAZ pri la registritaj gazetoj kaj AALIB pri la libroj (au pli precize: la resto en nia bretaro).

Jen listigo de niaj sigloj lau la nuna stato:

A	Afisoj kaj kalendaroj grandformataj	TC	kompaktdiskoj, CD
AR	arkivajoj	TD	(son-)diskoj
E	Esperanto	TK	(son-)kasedoj
LB	El la biblioteko de Leo Blaas	TM	mini-diskoj
P	aliaj planlingvoj	TS	softvaro, diskedoj
TAS	trovebla ankau sub ... (do fakte kvazau montrilo)	TV	vidbendoj kaj kasedoj
TB	(son-)bendoj	X	titoloj kun autografoj

Pro praktikaj konsideroj en la jaro 1968 Burkhardt komencis krei kartotekan katalogon (sur papero), kaj en 1977 li sukcesis, ke la katalogado de la havajo atingis preskau la finon. En tiu periodo, en la jaro 1971, Adolf Burkhardt estis nomumita pastoro de la luterana paroĥo Bissingen/Teck, kaj en 1972 okazis translokigo de familio Burkhardt kaj de la Esperanto-biblioteko al nova urbo, kie la biblioteko ricevis ejon en la plej supra etago de tiu pastora domo.

Ke en la persono de Burkhardt oni vere trovis la gustan bibliotekiston, tion montras la fakto, ke daure alvenis novaj bibliotekajoj, kiuj fine okupis preskau lian plenan liberan tempon. Post kelkaj jaroj ne plu suficis la spaco en la biblioteka cambro; do parto de la biblioteko jam devis okupi spacon en apuda cambro kaj je la flankoj de la stuparo. Fine de la okdekaj jaroj de la 20-a jarcento alproksimigis la pensia ago de Burkhardt. Li komencis serci novan lokon por la biblioteko en la tempo post sia emeritigo.

Guste tiutempe la aktiva Esperanto-Grupo de Aalen kaj ties bibliofilaj membroj konatigis persone kun Burkhardt kaj lia Biblioteko. La prezidanto de la grupo, *Karl Heinz Schaeffer* havis tre bonajn rilatojn kun la supera urbestro *Ulrich Pfeifle* de la urbo Aalen kaj povis interesigi lin pri la ideo, translokigi la Esperanto-Bibliotekon al Aalen.²³ Tiun translokigon kunpreparis la juristo *Rainer Heckhausen* per targa kontrakto inter la urbo Aalen kaj la germanaj Esperanto-institucioj, kiu unue validis por 10 jaroj. Ekde tiam la stato de la biblioteko estas jena: daŭra prunto al la urbo Aalen; proprietulo restas la Germana Esperanto-Instituto. La solena subskribo de tiu kontrakto okazis la 8-an de Julio 1989.

Kiel signo de bonveno la urbo Aalen pagis t. n. Kompaktus -bretaron en valoro de 30 000 germanaj markoj kaj ciujaran bugeton de 3 000 markoj por aceti librojn kaj aliajn necesajojn por la biblioteko. Nu, normale ja ne povas esti la tasko de iu urbo, esti respondeca por la bugeto de

²³ Komisie la estro de la urba biblioteko Aalen, *Jürgen Betzmann*, krome *Karl Heinz Schaeffer* kaj *Utho Maier* surloke esploris la staton de tiu biblioteko en Bissingen/Teck. Betzmann kiel profesia bibliotekisto tuj rimarkis, ke la biblioteko estis suface atrakcia kolekto kaj fakte bone transprenebla, car gi estis en modela ordo kaj facile uzebla (ne iu arkivo). Pro tio la urba konsilantaro de Aalen laŭ propono de la supera urbestro – ec unuvoce – decidis, ke la Germana Esperanto-Biblioteko venu al Aalen.

Esperanto-biblioteko, kiu restas propraĵo de kvazaŭ privata institucio! Do Schaeffer kune kun *d-ro Werner Bormann*, kiu tiutempe estis direktoro de la Germana Esperanto-Instituto, sukcesis konvinki Germanan Esperanto-Asocion, ke ankau ĝi aldonu el propra buĝeto pliajn 3 000 markojn jare por la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. Post tio, ekde 1990, kiel versajne la ununura Esperanto-biblioteko en la mondo, la biblioteko havis propran buĝeton por aceti librojn kaj gazetojn. Alvenis alia donaco: la FAME-Fondajo por stimulado de internaciaj kompreniloj donis kelkajn mil markojn por aceti taŝgan komputoran ekipaĵon, kiu tre helpis plu evoluigi la elektronikan katalogon de la biblioteko.

La Esperanto-Grupo Aalen sultris la taskon, translokigi en Novembro 1989 la tutan bibliotekon de Bissingen/Teck al Aalen. Tiel ke oni tuj rehavu la antaŭan ordon la grupo elpakis la kestojn kaj metis ties enhavon sur la novan bretaron. Tuj evidentigis, kiom vasta estis la laboro, kiun Burkhardt investis por la Esperanto-komunumo, ĉar en la biblioteko trovigis pli ol 10 000 titoloj. Plian tempon ni bezonis por envicigi la kroman enhavon de la apuda ĉambro, nun al la ĝusta loko en la nova biblioteka stoko.

Jam dum la antaŭaj jaroj, sub zorgo de *Martin Weichert*, oni komencis enkomputorigi karton post karto de la kartoteka katalogo; ofte helpis ne tro spertaj helpemuloj kaj volontuloj; ankau tial ensteligis multaj tajperaroj kaj aliaj fusoj, sed tamen la laboro de Weichert (per la programo DBase3) kondukis al presita katalogo en libroformo, kiu fine kompletigis la bibliotekon. Tiel, je la Zamenhof-Tago de la jaro 1989, vendrede, la 15-an de Decembro, povis okazi la solena inaŭguro de la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, dum ĉesto de multaj gastoj.

La tempo post la inaŭguro alportis pli da problemoj; do necesis prudenta labordivido por kontentigi la altajn pretendojn, kiujn oni postulas de grava speciala biblioteko: Burkhardt restis direktoro de la biblioteko, kaj en tiu funkcio li precipe prilaboris la kartotekan katalogon kaj klasifikis la novajn akirojn. Tio ankau signifis, ke ĉiu materialo por la biblioteko iris rekte tra la manoj de la direktoro.

La apotekisto *Karl Heinz Schaeffer* transprenis la funkcion de afergvidanto, kiu ankau respondecas pri la financoj. *Dipl.-Ing. Utho Maier* gvidis la sekciojn de elektronika datumprilaboro, literatura reserĉo kaj teleprunta servo; li ankau respondecis pri la kontaktoj al aliaj bibliotekaj institucioj kaj Esperanto-bibliotekoj. *Helga Czirn-Terpitz* prizorgis la sekciojn de biblioteka ordo, enmetado de la bibliotekajoj, engaĝo de necesaj helpantoj²⁴ kaj loka pruntoservo.

4 Aktuala stato

La sorto de la Germana Esperanto-Biblioteko, malgrau gravaj batoj dum la jardekoj, pli kaj pli bonigis. Ni komparu la kvanton de nia havaĵo je diversaj datoj: 1.200 titoloj en la jaro 1918, 3.000 titoloj en 1936, 2.000 titoloj en 1967, 10.000 titoloj en 1989 kaj fine de 2008 la biblioteko disponas pri preskau 41.000 bibliotekaj unuoj.

La regula buĝeto garantias, ke oni ne nur devas malfacile serĉi intersangpartnerojn, sed povas pli libere aceti ĉ multekostajn eldonojn de la libromarkato. Pro tio la biblioteko enhavas ankau tre aktualajn eldonojn en la stoko. Krome tio ofte permesas, ke eblas stopi truojn el pasintaj jaroj, ekzemple se mankas kajeroj ĉe la gazetaj jarkolektoj, kiuj ne alvenis donace au intersange.

Intertempe, post morto de la direktoro Burkhardt, regule laboras honorofice kvin personoj: *Helga Czirn-Terpitz*, *Jürgen Bauer*, *Hedwig* kaj *Karl Heinz Schaeffer*, kiu ankau respondecas pri la financoj kiel afergvidanto. Kaj la komputorajn laborojn kaj problemojn prizorgas la nova direktoro, *Dipl.-Ing. kaj Dipl.-Teol. Utho Maier*.

²⁴ Ok anoj de la Esperanto-Grupo Aalen kaj pliaj amikoj el la regiono.

Konklude oni do rajtas konstati, ke la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen trovis taugan hejmlokon, satatan de ciuj, cu uzantoj, cu servantoj, cu urbaj instancoj, cu esperantistoj. La kunlaboro kun la urba biblioteko estas modela (kvankam gi ne estas scienca, sed publika biblioteko –do havas ja tute aliajn kriteriojn) kaj ebligas multajn servojn, kiel ekzemple libroriparojn au la uzadon de laborkabinetoj, de kopiiloj kaj la servojn de telepruntado.

Daure progresas la stato de nia elektronika katalogo. Komence, en la jaro 1989, gi enhavis 6.656 bibliotekajn unuojn lau stato de 1985 (spicita per tajperaroj, sed tamen jam efike uzebla); kaj nun post 19 jaroj gi jam atingis la kvanton de 21.000 kurantaj numeroj (tio signifas: la biblioteka stoko enhavas tiom da diversaj titoloj, el kiuj tre multaj havas duan au trian ekzempleron). Jam antau la morto de Burkhardt, en 2004, ni bedaŭris, ke certe por ciam devos resti diferenco al la kartoteka katalogo ce Burkhardt (tiam la nure aktuala). Ni taksis, ke la elektronika katalogo enhavas nur 80-90 % de la kartoteka. Intertempe tio ne plu validas, car ni sukcesis tute enkomputorigi la kartojn kaj poste cesis produkti pliajn kartojn sur papero. Nun, la aktuala stato respeguligas nur en la elektronika katalogo.

Paralele daure kreskas dum la lastaj jaroj la katalogo pri nia gazetaro. Tial nun inter la libroj tute ne plu enestas la ekzempleroj de la iamaj klasifo-formoj "P", "G" kaj "L". En la jaro 2003 tiu ci katalogparto jam enhavis pli ol 2.300 gazetojn (parte kompletajn jarkolektojn, ofte pli ol dufoje, parte nur unuopajn kajerojn el iu ajn jaro).

Estis do ne facile, doni ekzaktan informon pri la amplekso de tiu ci parto de nia stoko. La siatempan staton de aprilo 2002 priskribas la presita katalogo "Gazetoj", kiun ni presis kiel labor-ekzemplero por A. Burkhardt kaj kiu jam eniris en la bibliotekan stokon. Fine de la jaro 2006 ni nombris 6.221 kompletajn jarkolektojn, krome 1.934 duoblajn (do sume 8.155).

Finante la raporton pri la lastaj 19 jaroj, ni iomete citu el la statistiko, sed sen nombroj: Apenau okazis petoj de niaj uzantoj, kiujn ni ne povis plenumi kontentige, kvankam regule alvenas petslipoj el la teleprunta reto, kiuj evidentigas ties fiaskojn ce la antaue demanditaj centraj biblioteko-katalogoj de Germanujo.

Ni do fieras, esti la plej kompleta germana biblioteko pri esperantologio, interlingvistiko kaj la diversaj planlingvoj. La amplekso de nia biblioteko²⁵ certe ne nur estas la firma bazo, kiu permesas, ke eblis, eblas kaj eblos preskau ciam facile plenumi la dezirojn de niaj klientoj, sed gi ankau montras iugrade, kiom gigantan laboron nia longjara direktoro, Adolf Burkhardt, por gi jam investis.

Nun sekvu kelkaj aktualaj informoj pri la katalogoj: Surpapera kartoteka katalogo kompleta (je iu plimalpli fresa dato) ne plu ekzistas. Por la cebretara laboro ni presis en februaro 2007 liston de AAGAZ, kiu ampleksis cirkau 500 pagojn; por AALIB ni rezignis produkti tian liston.²⁶

Tamen:

Ekzistas nun 2 dosieroj, kiuj haveblas tra nia retejo:²⁷

(1) listigo de AAGAZ je stato 2007-Aprilo-27²⁸ kaj

²⁵ Gi baldau atingos la kvanton de 41.000 bibliotekaj unuoj.

²⁶ Estus versajne pli ol la dekobla amplekso; car presante liston de mallongigitaj titoloj (por interna uzado, en decembro 2006) ni jam atingis la amplekson de 1.595 pagoj.

²⁷ Tio estas: <http://esperanto-bibliothek.gmxhome.de/2003/einstieg.htm>

²⁸ En la retejo klaku je "Zeitschriftenbestand (27.04.2007)", priskribo en la lingvo internacia: <http://esperanto-bibliothek.gmxhome.de/2003/kurz-inf.htm#kataagaz>

(2) listigo de AALIB je stato de 2007-Majo-01.²⁹

Pri la unua (AAGAZ):

Utho Maier produktis la unuan dosieron por subteni la laboron de *d-ro Árpád Máthé*, kiu nuntempe preparas gravan eldonon.³⁰ Gi enhavas la koncernajn datojn el nia programo LARS, kiuj estis aparte prilaboritaj por pli konvena uzado.³¹ Oni rajtas uzi ĝin libere, sed oni NE sangu ion, sen samtempe informi nin pri tiu eventuala plibonigo.

Pri la dua (AALIB):

Simile, Maier produktis ankau la duan dosieron:³² estas la datoj el nia programo LARS, kiujn ni poste NE plu prilaboris kaj adaptis, car ni mem tute ne emas manipuli tiom grandajn dosierojn.³³

5 Perspektivoj

La aktuala stato de la Germana Esperanto-Biblioteko pruvas, ke ĝi estas en bonaj manoj, kun tauga hejmo en Aalen, kaj ke ĝi tie guas favorajn kondicojn.³⁴ Jam en 1999, kiam alvenis la fino de nia kontrakto kun la urbo Aalen, ni neniam devis timi, ke eble revenus necerta estonteco por nia biblioteko. Male: la urba konsilantaro sen hezitoj au problemoj plilongigis la kontrakton kaj ec adaptis la sumon de nia bugeto al la altigintaj kostoj.

Do, kune kun la mono de Germana Esperanto-Asocio, la Germana Esperanto-Biblioteko Aalen ĉiujare disponas pri regula bugeto de cirkau 3.545 .€Al la biblioteka stoko do ne ekestos minaco de malmmodernigo, kaj dum restos vivanta iu Esperanta libromarkato, certe ne minacos al ĝi la sangigo de biblioteko al kvazau arkiva kolekto de antikviginta materialo. Ankau koncerne la bibliotekan personaron ni estonte ne devas timi grandajn malfacilaĵojn, dum ekzistos vigla Esperanto-Grupo en Aalen. *Karl Heinz Schaeffer* nun estas pensiulo kaj post sia apotekista vivo havos pli da tempo por plenumi la taskojn kiel afergvidanto.

La biblioteko kaj ties uzantoj povas senti sin felicaj, ke ne plu svebas super ilia kapo la fantoma glavo de plia translokigo al iu ajn centra biblioteko, cu landa, cu universitata, por poste denove suferi la trapason de necerta tempo en iu malhela kelo kaj atendi pli bonan periodon. Se ne pereos la Internacia Lingvo Esperanto, ni povos rigardi al la estonteco de nia biblioteko kurage kaj esperplene ni ja estas parto de la esperantistaro.

²⁹ En la retejo klaku je *Buchbestand* (01.05.2007) ,priskribo en la lingvo internacia: <http://esperanto-biblio//inf.htm#kataalib> thek

³⁰ Máthé preparas superrigardon pri la tuta Esperanto-gazetaro, omage al la antau ses jaroj mortinta *Luis Hernández Yzal* (1917-2002) [pri kiu Maier persone bone memoras pro vizito ce li antau la UK de Valencio].

³¹ Por legado oni povas uzi la normalan Notepad de Windows_XP au la Unired de *Jurij FINKEL*. Lau peto, ni ankau povus sendi la tekston en formato *rtf* por uzado kun Word au iu simila programo. Same oni povus peti alian densigitan formon (*.zip au *.exe) au ec la tekston sen iu ajn densigo.

³² Sed en tiu kazo ni devas serioze averti, ke la rezultanta dosiero estigus vere ege ampleksa! Oni do pripensu dufoje, cu oni vere volos labori per ĝi.

³³ Kvankam tio eblus au per la normala Notepad de Windows_XP au ekz. Word 2002 au la Unired de *Jurij Finkel*.

³⁴ Ili tute ne dependas de grandeco de loko au institucio, kiel montras la muzeo en Sant Pau d Ordal. Ke Aalen ne estas granda urbo kun certe ne ege granda urbo-biblioteko, tion ni tute konscias. Ankau neniu kontestas, ke ni en Aalen estas amatoroj, se temas pri biblioteka scienco au ec interlingvistiko.

6 Resumo tipologia

Lau la dĵistingaj kriterioj kaj la tipologio, ³⁵ la Germana Esperanto-Biblioteko taksas sian priskribon nun jenamaniere:

Tipo	Kutima biblioteko, nek muzeo nek arkivo.
Jura statuso	Proprajo de la Germana Esperanto-Instituto, kiu mem estas parto de la D.E.B. e.V. (Germana Esperanto-Asocio r.a. ³⁶)
Amplekso	41 000l bibliotekaj unuoj, libroj kaj 6221 kompletaj gazet-jarkolektoj (1934 duoblajoj) kaj multaj nekompletaj jarkolektoj
Specialigo	libroj kaj gazetoj en kaj pri la Internacia Lingvo Esperanto, krome: planlingvoj kaj lingvistiko
Registrigo	Katalogoj elektronikaj (libroj, gazetoj), tro ampleksaj por facile uzi en presita formo, rete havebla (kvankam ne ciam plej aktuale)
Kataloga tipo	-> registrigo
Ordigo	Lau Universala Dekuma Klasifo (UDK) en la formo adaptita al Esperantaj temoj, kiun siatempe proponis Montagu Christie Butler (1884-1970)
Flegateco	Regule prizorgata flanke de volontuloj
Prizorgateco	-> flegateco
Priskribiteco	Interrete per www.esperanto.de.nr , krome vidu nian bibliografian liston.
Persona aliro	Por scienca laboro post interkonsento kun la loka UEA-deligito, ne por vizitoj (biblioteko, nek muzeo nek arkivo!), ->pruntservo
Pruntservo	Prunteblaj estas la bibliotekaj unuoj post 1939 kaj la duoblajoj; prefere oni uzu la (inter-)nacion pruntoservon; la resto estas uzebla surloke -> persona aliro
Aktualeco	Kolekto daŭre aktualigata
Teknika ekipaĵo	Bretaro en konvena ejo kun fajro-alarmiloj, komputoroj, kopiilo, laborcambretoj (sen bindiloj au mikrofotiloj)
Tipo de ejo	Facile trovebla, konvena, seka -> teknika ekipaĵo
Memstareco	Memstara kolekto de Germana Esperanto-Instituto
Stabileco	Jam 100-jara -> memstareco, financoj
Financoj	Regula buĝeto
Programfunkcio	Sen eldonejo au klerigejo, kvankam kelkfoje eldonigas informbrosuroj k.s. kaj okazas seminarioj kunlabore kun la surloka popol-klerigejo
Prestigo	En la (inter-)nacia biblioteka pejzago bone konata kaj registrita (kp. Handbuch der historischen Buchbestände in Deutschland, vol. 7, t.e. BURKHARDT 1994)
Kunlaboro	Kontaktoj, kunlaboro kun aliaj bibliotekoj, intersango de duoblajoj, reciproka helpo ktp.
Uzateco	Regule uzata (rekte per retleteraj kontaktoj kaj -> pruntservo)

³⁵ BLANKE (2007).

³⁶ r.a. = registrita asocio, grava statuso lau la germana imposta lego. Tiaj registritaj asocioj havas certajn avantaĝojn.

Geografia situo	Relative facile atingebla (trafike)
-----------------	-------------------------------------

Specife ni ankau rigardu al la aparte gravaj kriterioj *jura statuso* kaj *memstareco* de nia kolekto, pri kiuj Blanke jam skribis ion, kaj kion ni emas nun iomete modifi:

Fakte nia kolekto loĝas ŝub la tegmento de la urba biblioteko Aalen (tipo 3.1), kaj estas do *relative memstara kolekto en komunuma au urba biblioteko*.

Sed kvankam ni guas la subtenon de la urbo en formo de ciujara bugeto kaj disponigo de la ejo – la Germana Esperanto-Biblioteko Aalen estas kaj restos ciam la posedajo de la Germana Esperanto-Instituto, kiu mem estas jure institucio de Germana Esperanto-Asocio r. a. Ni do estas tute (kaj ne nur relative) memstaraj koncerne al la urbo kaj ties biblioteko. Sekve ni samatempe apartenas ankau al la tipo 5.2, estante *posedajo de nacia nestata organizajo*.

Bibliografio

BLANKE, Detlev (2003): Interlinguistik und Esperantologie: Wege zur Fachliteratur. En: *Esperanto-Dokumente* 7. Bamberg, Deutsches Esperanto-Institut, 2003. 58 p. - Legebla interrete, URL: <http://www.interlinguistik-gil.de/fachlit.html>

BLANKE, Detlev (2007): Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj – kelkaj problemoj. En: *Pluhar, Zdenek* (2007, Red.): *Lingvo kaj interreto kaj aliaj studoj*. (Serio: Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko 6). Dobrichovice: KAVA-PECH, p. 75-81. Kiel resumo legebla ankau interrete sub titolo "Ni konservu la sciojn! ", URL: <http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/152-lode.htm#152-03>

BRANDENBURG, Barbara (1995): *Die Esperanto-Bibliothek in Aalen. Kritische Überlegungen zu Geschichte, Aufbau und Funktion einer geisteswissenschaftlichen Spezialbibliothek*. Bonn: Fachhochschule für das öffentliche Bibliothekswesen. 69 p. [026 BRA]

BURKHARDT, Adolf (1977): Die Bibliothek des Deutschen Esperanto-Instituts. En: *Deutsches Esperanto-Institut. Aufbau, Entwicklung, Leistungen*. Augsburg: DEI 1977. 56 p., p. 33-38. [E 071.6 (43) TUC]

BURKHARDT, Adolf (1994): Aalen. Deutsche Esperanto-Bibliothek. En: *Handbuch der historischen Buchbestände in Deutschland*. Bd. 7. Baden-Württemberg und Saarland. A-H. Hrsg. von Wolfgang Kehr. Hildesheim, Zürich, New York: Olms-Weidmann 1994. 309 p., p. 41-43. [027 HAN]

BUTLER, Montagu Christie (1950): *Klasifo de Esperantaj temoj*. Bergen op Zoom: Esperanto-Film-Grupo. 144 p. [025.45 BUT]

Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen (2007). Einstiegsseite. URL: www.esperanto.de.nr kaj ankau: <http://esperanto-bibliothek.gmxhome.de/2001/einstieg.htm>

Dezimal-Klassifikation (1941). Deutsche Kurzausgabe, 2., erweiterte u. verbesserte Auflage Berlin: Beuth <Druck: April 1947>. 182 p. [025.4 DEZ]

Dezimal-Klassifikation (1953). Gesamtausgabe. Berlin: DNA 1934-1953. (FID; 196). Kp. ankau interrete, URL: <http://www.udcc.org/bibliography.htm> . [025.45]

- DIETTERLE, Hans-Burkhardt (2000): Prof. Dr. Johannes Dietterle –Initiator für Esperanto. En: *Beiträge zur Geschichte der deutschen Esperanto-Bewegung*. Berlin: Dt. Esperanto-Institut. 62 p., p. 9-19.
- DIETTERLE, Hans-Burkhardt (2001): Johannes Dietterle –Organisator der wissenschaftlichen Arbeit für Esperanto (organizanto de scienca laboro por Esperanto) En: *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omage al la 60-jarigo de Detlev Blanke*. Red. Sabine Fiedler, LIU Haitao. Dobrichovice-Praha: Kava-Pech. 736 p., p. 467-486. - Legebla ankau interrete, URL: http://esperantic.org/librejo/dbstudoj/32_DIETTERL.htm [92 BLA]
- DIETTERLE, Johannes (1921): Biografiaj notoj pri D-ro Steche kaj resumo de liaj poresperantaj artikoloj kaj alparoladoj. En: *La Vendreda Klubo. 11 diversaj originalaj artikoloj*. Red. Johannes Dietterle. Leipzig: Hirt. 115 p., parto aldonata, p. 112-115. [812-8 DIE]
- DIETTERLE, Johannes (1925): *An die Mitglieder des Direktoriums des Esperanto-Instituts für das Deutsche Reich*. Jahresbericht 1924/25. Rechnungsabschluß 1924/25. Voranschlag des Instituts 1925/26. Leipzig: Esperanto-Institut. 2+9+6 p. [E 071.6 (43) "1925"]
- FILL, Karl (1969): *Einführung in das Wesen der Dezimalklassifikation*. 3., völlig neu bearb. Aufl. mit einem Anhang: Kleinstausgabe der Dezimalklassifikation. Berlin: Beuth. 102 p. (Deutscher Normenausschuß, Ausschluß für Klassifikation) [025.45.001.83]
- FRANK, Otto (1960): *Die Dezimalklassifikation*. Aufbau und Arbeitsmittel. 3., neu bearbeitete Auflage. Stuttgart: Dorotheen-Verlag 64 p. (Handbuch der Klassifikation; H. 1) [025.45]
- Germana Esperanto-Biblioteko (1947): *Katalogo pri Esperanto-gazetoj kaj -revuoj*. 1918-1947 <kun multaj krajonaj kompletigoj de Adolf Burkhardt, montrantaj la kreskon de la periodaj kolektoj en la unuaj jaroj post la restarigo de la biblioteko ĝis 1971>. München: Germana Esperanto-Biblioteko, 13 p. tajpitaj. [018.2 (05) GEB]
- Germana Esperanto-Biblioteko (1989): *Katalogo de la Biblioteko de Germana Esperanto-Instituto en Bissingen, Teck*. Lau la datumoj, entajpitaj ..1985, surpaperigita ..1989 per programo <de> Martin Weichert. München. 299+81 +108+15+18 p. [017.1 KAT]
- Germana Esperanto-Biblioteko Aalen (2002): *Gazetoj*. Listo de nia havajo ĝazet .”1. eld. pres., ordigita laŭ klasifiko, stato: n-roj 1-2185 de 2002 aprilo 02. <por la klasifa laboro aranĝita de Utho Maier.> Aalen. 406 p. <presita en 5 partoj per programo Komfort-Text 5.23 sur HP Laserjet 4+ kaj por estonta uzado nove aranĝita en programo LARS 5.62 kiel NOVGAZ >. [017.1 AAL]
- Germana Esperanto-Biblioteko Aalen (2006): *Liste der Kurztitel unseres Buchbestands AALIB*. Dezember 2006.
- Germana Esperanto-Biblioteko Aalen (2007): *Liste unseres Bestands AAGAZ*. Februar 2007.
- Germana Esperanto-Biblioteko Aalen (2007): *Gazetoj*. Listo de nia havajo AAGAZ. 2-a eldono presita, ordigita laŭ klasifiko. Stato: n-roj 1 ĝis 2319 de 19 februaro 2007. < ..preparita de Utho Maier.> Aalen. 468 p. [017.1 AAL]
- GJIVOJE, Marinko (1989): *Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj*. Kun resumoj en ses lingvoj. Zagreb: Gjivoje. 56 p. [026 :E GJI]

- GJIVOJE, Marinko (1978): *Manlibro pri Esperanto en bibliotekoj*. Zagreb: Gjivoje. 33 p. [026 :E GJI]
- HAUPENTHAL, Reinhard (1968): *Biblioteko de GEI ree ordigita*. Gi farigu impona dokumentejo pri Esperanto. En: *Germana Esperanto-Revuo* 21, p. 117.
- HAUPENTHAL, Reinhard (1977): *Katalogo de la planlingva literaturo de la Universitata Biblioteko Saarbrücken = Katalog der Plansprachenliteratur der Universitätsbibliothek Saarbrücken*. Saarbrücken: SEB. V, 50 p. [018.1 HAU]
- HAUPENTHAL, Reinhard (1983): Albert Schramm (1880-1937). Ein vergessener Esperanto-Pionier. En: *Sindelfinger Jahrbuch* 25, p. 234-242. [92 SCH]
- HAUPENTHAL, Reinhard (1985): *Albert Schramm (1880-1937) kaj lia korespondo kun Lazaro L. Zamenhof (1859-1917)*. Saarbrücken: Itis. 58 p. [92 SCH]
- HAUPENTHAL, Reinhard (1987): Albert Schramm (1880-1937)[,] ein vergessener Esperanto-Pionier. En: *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo. II. Esperantismo*. La Laguna: Universidad de La Laguna, p. 259-273. [4 (08) SER]
- HUBE, Walter (1975); März, Herbert: *Alfabeta katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien*. Parto II, literoj M-Z. Wien: IEMW. 378 p. [018.1 HUB]
- KING, Geoffrey (1990): *Biblioteka klasifiko de Esperanto*. [Fotokopio de la manuskripto lau gia stato je 1990.01.01.] London: TEBA. 67 p. [025.45 KIN]
- Königlich Sächsische Esperanto-Bibliothek* (1913). Übersicht über den Stand der Bibliothek bei der Übergabe am 1. Aug. 1913. Leipzig: Königl.-Sächs. Esp.-Bibl. Fotokopio de pagoj 205-211. [017.1 KÖN]
- Königlich Sächsische Esperanto-Bibliothek* (c.1932). [Fotokopiita] parto el la manskribita katalogo: Sekcio I. Andere Weltsprachen-Systeme. Sekcio K. Politische Anwendung des Esperanto. Leipzig: Königl.-Sächs. Esp.-Inst. 84 fol. 21x30 cm. [017.1 KÖN]
- LINS, Ulrich (1977): Geschichte des Deutschen Esperanto-Instituts. En: *Deutsches Esperanto-Institut. Aufbau, Entwicklung, Leistungen*. Augsburg: DEI. 56 p., p. 19-27. [E 071.6 (43) TUC]
- LINS, Ulrich (2000): Zur Geschichte des Esperanto-Instituts in Sachsen 1908-1936. En: *Beiträge zur Geschichte der deutschen Esperanto-Bewegung*. (Hrsg. von Martin Haase.) Berlin: Deutsches Esperanto-Institut, p. 20-29.
- MAIER, Utho (2007): *La Germana Esperanto-Biblioteko*: hierau, hodiau - kaj kio morgau?; 19 jarojn en la nova hejmo Aalen; historio, aktuala stato, perspektivoj / Utho Maier, Karl Heinz Schaeffer. - Speciala eldono de resumo konciza pri La stato de la 100-jara Germana Esperanto-Biblioteko Aalen - 2008 ≙ 4-a eldono, iom modifita de Utho Maier - Aalen : Germana Esperanto-Biblioteko Aalen, 2008, 24 p. - Legebla interrete, URL: http://esperantobibliothek.gmxhome.de/broshur/espbib_eo/vieno2007/GEB_2008_resumo_konciza.pdf

- PABST, Bernhard (2002): *Marie Hankel. Esperanto-Dichterin, Organisatorin, Feministin*. Bonn: Bernhard Pabst. – Legebla interrete, URL: <http://www.familienforschung-pabst.de/EspBiographien/EspBiogr/Hankel.pdf>
- PABST, Bernhard: *EBEA Retrobibliographierung nichtmonographischer Literatur zum Esperanto*. - Legebla interrete, URL: <http://www.interlinguistik-gil.de/ebealink.html>
- PORTMAN, Doug (1989); KORALO: *Biblioteka terminaro*. Esperanta-angla-cina-franca-germana-hispana. Tutmonda Esperanta Bibliotekista Asocio. Pekino: Eldonejo de Akademias Revuoj. 240 p. [02 (03) POR]
- SCHAEFFER, Karl Heinz (2002): *Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen. Geschäftsbericht für das Jahr 2001*. Aalen. 3 p. [026 AAL "2001"]
 - Same/simile havebla por ĉiu sekva jaro, ekde la jaro 2006 resume ankaŭ en la interreto, URL: http://esperanto-bibliothek.gmxhome.de/novajxoj/g_ber_06.htm
- SCHAEFFER, Karl Heinz (2003): *La Germana Esperanto-Biblioteko. 15 jarojn en la nova hejmo Aalen. Historio, aktuala stato, perspektivoj*. Aalen. 28 p. [026 KHS]
- SCHAEFFER, Karl Heinz (2003): *Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen. Geschäftsbericht für das Jahr 2002*. Aalen 2003. 4 p.
- SCHAEFFER, Karl Heinz (2004): *Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen. Geschäftsbericht für das Jahr 2003*. Aalen 2004. 4 p.
- SCHRAMM, Albert (1909-1912): *Sächsisches Esperanto-Institut zu Dresden. Bericht über das Jahr ... Dresden [k. a.] -1908/09. 26 p. 1909. 16 p.; 1909/10. 1910. 16 p.; 1910/11. 1912. 8 p.; 1911/12 k. 1912/13. 1913. 12 p. [E 071.6 (43) BER]*
- STEINER, Hugo (1957): *Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien*. Parto I, sistema katalogo pri la Esperanto-presaĵoj laŭ la Internacia Dekuma Klasifiko. Wien: Internacia Esperanto-Muzeo. 554 p. [017.1 STE]
- STEINER, Hugo (1958): *Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien*. Parto II, sistema katalogo pri la presaĵoj de la ne-Esperantaj artefaritaj lingvoj. Wien: IEMW. 93 p. [017.1 STE]
- STEINER, Hugo (1969): *Alfabeta katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien*. Parto I, literoj A-L. Wien: IEMW. 462 p. [018.1 STE]
- SZIMKAT, Annakris [pseud. de HAUPENTHAL, Reinhard] (2004): Dokumentoj ĉirkaŭ la morto de unu biblioteko. En: *Esperante kaj ekumene. Festlibro por la 75-a naskiĝtago de Adolf Burkhardt*. Schliengen: Iltis, p. 201-210. [063.8 ESP]
- TAKÁCS, Jozefo (1934): *Katalogo de la Esperanto-gazetaro*. Jablonné: Prazáth. 168 p. [017 (95) TAK]
- Verzeichnis der Königl. Sächs. Esperanto-Bücherei* (1918). (Dresden: Mimosa). 48 p. [017.1 KÖN]
- WUNDERLICH, Elisabeth (1921): La stata saksa Esperanto-biblioteko. En: *La Vendreda Klubo. 11 diversaj originalaj artikoloj*. Red. Johannes Dietterle. Leipzig: Hirt, parto 10, p. 100-102. [812-8 DIE]

WUNDERLICH, Elisabeth (1933): 25 Jahre Esperanto-Institut. En: *Germana Esperantisto* 30, p. 188-190. [G3 GE]

ZILVAR, Peter (2003): Bibliotekoj kaj muzeoj rilate al Esperanto. En: *Scienca Revuo* 54, nr. 193 kajero 2, p. 75-82. [F 5 SR]

La adreso de la biblioteko:

Germana Esperanto-Biblioteko,
Gmünder Str. 9 (Torhaus),
DE-73430 Aalen

Christian Cimpa

Modernaj teknikoj en la servo de la Esperantokulturo:

Bildarchiv Austria

En la mondon venis nova invento: la bilddatenbankoj. Ili estas ege kostaj, sed ankaŭ ege helpaj instrumentoj de moderna informperado. Jam ekde 2007 Esperantujo havas sian propran bilddatenbankon. Jen ĝiaj historio kaj funkcio.

La evoluoj en la elektroteknika kampo forte sangis nian ciutagon. Apud la postelefono cefe la interreto vere revoluciis la vivon de la plimulto de la homaro. Kaj tio validas ne nur en la sfero de amuzo kaj distro, sed ankaŭ de instruado kaj klerigado. Scio ne plu estas ekskluziva proprajo de eruditaj elitoj, intelektuloj, specialistoj. Hodiaŭ ne necesas foliumi dikajn volumojn por satigi ian scivolon. Kelkaj fingromovoj tuj gvidas nin al la dezirata informo. Cu bone, cu malbone (pripensu nur, ke ekde la invento de la poskalkulilo la kapablo de libera eŝkapo kalkulado preskaŭ komplete malaperis), la situacio estas fascina, la mondo saĝas pli bunta kaj pli facile alirebla ol antaŭe.

Kaj kompreneble inter tiuj, kiuj ege profitas de tiuj sangoj, estas la institucioj kiuj administras informojn, kiel ekzemple bibliotekoj kaj ties klientoj. Mi bone memoras la tempojn, kiam la scivolulo devis migri al unu el la temploj de la Scio, humile proksimigi al la egaj, respekton postulantaj lignaj sranks kun centoj da tirkestoj strange surskribitaj, antaŭe studinte la sanktajn legojn de la manipulado, sen kiuj la srankegoj ne malkasos siajn sekretojn. Kia progreso! Hodiaŭ la resercoj facile fareblas el la logcambra fotelo. La ebla malagrablaĵo de vana vojaĝo, car la dezirata dokumento ne ekzistas aŭ ĵus ne troviĝas en la biblioteko pro iuj kaŭzoj, ne plu minacas nian legemulon. Oni agrable resercas kaj mendas hejme, kaj la postan tagon povas iri al la biblioteko por certe trovi la deziratan trezoreton. Kaj post nelonge ankaŭ tiu lasta reverenco al la pasinteco malaperos. Pli kaj pli da revuoj kaj libroj jam estas legeblaj rekte per interreto, oni ne plu bezonas forlasi la hejmon. Cu bone, cu malbone eerte fascine.

Oni eble hodiaŭ ankoraŭ ne plenplene kontentas legi librojn desur la komputila ekrano. Niaj sentoj povus taksu sin trompitaĵ, mankas laodoro de ledo kaj polvo, la varma aspro de malnova papero. Sed ekzistas kampo, en kiu la ekrano certe sukcesas plene kontentigi nin. Temas pri cefe optikaj informoj, troveblaj sur afisoj, postkartoj, glumarkoj kaj precipe sur fotoj. Tiujn dokumentojn oni ne bezonas teni en la manoj por ricevi maksimumon da informoj.

Konscie pri tio la Austria Nacia Biblioteko (ANB) kun ege ricaj bild-kolektoj (ekzistas milionoj da fotoj, ksilografioj, litografioj, afisoj k.s.) longe sercis pri programo, kiu taugas por bona katalogado kaj konvena bildigo de siaj trezoraĵoj. Evidentigis, ke ne ekzistas sufiĉe kontentiga sistemo acetebila en jam prete ellaborita stato. Do oni kune kun granda softvar-entrepreno evoluigis programon, kiu plej eble plenumas la altajn bezonojn de datenbanko, kiu samtempe servu kiel katalogo kun ĉiuj ties funkcioj, kaj kiel virtuala fotoalbumo, en kiu oni povas kvazaŭ foliumi kaj rigardi la dokumentojn en optike bona kvalito. Cetere la kapacito de la tuto devis certigi, ke la enorma kvanto da rikordoj ne damaĝu tiujn funkciojn. La rezulto de la klopodoj manifestigis en la jaro 2003, kiam la datenbanko Gideon sub la adreso www.bildarchivaustria.at komencis esti konsultebla en interreto.

Kompreneble bezonataj por la sukceso estis, estas kaj estos konsiderindaj kvantoj da kapabloj, klopodoj kaj kostoj. La necesaj rimedoj estas tre ampleksaj, kaj la investoj neniam refluas. Krome datenbankoj bezonas daŭran prizorgadon, aktualigadon, ec plievoluigadon. Nuntempe nur grandaj, state direktitaj bibliotekoj alfrontas tian defion. La ekzisto de nia Esperanta bilddatenbanko suldigas do al la unika bonsanco de la fakto, ke la Esperantomuzeo en Vieno estas parto de la ANB.

En 2006 la Esperantomuzeo komencis la katalogadon de siaj kolektitaj fotoj en **Bildarchiv Austria**. La cirkau 23.000 fotoj gis tiam estis nur troveblaj per slipara katalogo, alfabete ordigita laŭ la personaj nomoj de la fotitoj aŭ la nomoj de la lokoj de la koncerna arango. La arangoj mem plej ofte ne estis serceblaj, same kiel multaj gravaj bildenhavoj. Personoj, kiuj aperis sur granda nombro da fotoj, kompreneble kauzis grandan nombron da slipoj – fakto kiu estis tre maloportuna por facila sercado. Evidentis, ke ankaŭ la katalogaj kvalitoj multe plibonigos per la elektronika versio. Almenaŭ la malnova sliparo kun sia ampleksa priskribo de la fotoj certigas, ke la novkatalogado okazas sur firma bazo.

La unuaj reagoj de la publiko baldaŭ alvenis. Por la mondvaste dissemiita Esperanta kulturkomunumo la interreta akireblo de specifaj informoj kompreneble des pli valoras. La antaŭe malofte utiligata, ĉe apenaŭ konata fotokolekto igis vera komuna havaĵo, konsiderinda parto de la kultura memoro kaj do de la identeco de la esperantistaro. Sed, surprize, ekde la komenco granda nombro de la demandoj kaj mendoj venis ankaŭ el neesperantista medio. Precipe ĵurnalistoj utiligis la novan datenbankon por siaj reserĉoj, kaj tiel ekestis multaj artikoloj en gazetoj pri Esperanto.

Tamen la tioma nova intereso pri malnovaj fotoj ne nur klarigeblas per la pli facila alirebleco de la fotokolekto. Ankaŭ la uzado mem gajnis je kvalito per la ciferecigo de la fotoj. La avantaĝoj por la interesatoj estas evidentaj: Personoj, lokoj, datoj, arangoj kaj ĉio alia priskribita estas facile serceblaj. La fotoj estas videblaj tuj, sen interveno de alia persono, kaj de iu ajn loko en la mondo kondiĉe de dispono pri interreta konekto. Oni povas trarigardi nelimigitan nombron da fotoj sen produkti haŭson sur la skribotablo. La informoj pri la elektita foto legeblas sub ĝia bildo, en space apenaŭ limigitaj tekstokampoj. Eblas do listigi la nomojn de cent kaj pli da personoj, montrataj sur iu foto. Al la priskribo povas aldonigi klarigoj, kiuj neniam trovas lokon sur kataloga slipo. La avantaĝoj por la biblioteko same klaras: Ne plu necesas elserĉi la fotojn el la bretaro (kio povas esti temporaba afero, se temas pri multaj), kaj kompreneble same ne plu necesas kalkuli, kontroli kaj remeti ilin. Sed, pli grave: Pro la fakto, ke la originaloj ne plu estas bezonataj, ili povas resti en la stokejo, sen iu danĝero de damaĝo per malbona manipulado, troa lumo, vandalismo aŭ ĉe stelo. Tio helpas ilin transvivi multajn generaciojn pli.

Onidire neniu afero havas nur avantaĝojn. Tio ankaŭ validas por la interreta prezentado de la fotoj de la Esperantomuzeo. Estante katalogo de la ANB **Bildarchiv Austria** ampleksas ĉiujn ties bilddokumentojn, ne nur la Esperantajn. Por certigi, ke la rezulto havas la deziratan rilaton al Esperanto, unu el la serĉnocioj ĉiam estu *Esperanto*. "Per tio oni evitas la ricevon de nedezirataj rikordoj. Due, la katalogo kompreneble funkcias en la germana lingvo. Por la granda plimulto de la uzantoj de la Internacia Lingvo tio unuavide saĝas nesuperebla obstaklo. Tamen ne: Estas planite modifi la datenbankon tiel, ke en la futuro ankaŭ Esperanto kiel serĉlingvo aplikeblos. Krome, kompreneble jam nun personoj – la plej ofta temo de reserĉoj – tre facile troveblas, ĉar personaj nomoj ĝenerale ne diferencas laŭ lingvoj. Kaj gravaj arangoj (ekzemple la Universalaĵ Kongresoj) estas serceblaj ankaŭ per ilia Esperanto-nomo (do germane: 55. Esperanto-Weltkongress kaj Esperante: 55a Universala Kongreso de Esperanto)."

La strategioj por la reserĉo estas ĝe simplaj. Ne necesas tajpi la kompletan esprimon, unuopa vorto sufiĉas – do per la serĉnocio *universala* (ĉu majusklo aŭ minusklo, ne estas distinge) oni ricevas ĉiujn fotojn de iu Universala Kongreso, sed ankaŭ aliajn rikordojn enhavantajn la vorton *universala* – ekzemple *Universala Esperanto-Asocio*. "Seri per pluraj vortoj do malgrandigas la nombron de la ricevotaj rikordoj, la rezulto estos pli ekzakta ."

Ekzemplo: Serĉo per la nocioj *kongreso*, "rotterdamo" kaj *universala* (la vortsinsekvo estas libera) liveros ĉiujn fotojn pri iu ajn Universala Kongreso okazinta en Roterdamo, do tiuj de 1967, 1988 kaj 2008. Por limigi la rezultaron al unu speciala UK, sufiĉas aldone tajpi la jaron. Per tiu metodo eblas limigi la nombron de la trovitaj rikordoj ĝis ekstremo, do per la nocioj *kongreso*, "

ŭniversala "1988 Kaj tŭnkin ŝni ricevas nur fotojn de la koncerna kongreso, sur kiu troveblas iu s-ro au s-ino Tonkin se ni posedas tian.

Alvoko

Kaj tio jam gvidas min al tre grava punkto: La humila, sed senhonta petado. Mi alvokas el la tuta koro, ke esperantistoj alsendu au alsendigu siajn fotojn. Post la morto de fervoraj fotintoj la heredantoj plej ofte forjetas la fotojn, sur kiuj ili neniun rekonas, al kiuj ili havas nenian rilaton. Kaj ciu malaperinta foto estas grava perdo por nia komuna memoro. Mi ankau energie malkonsilas taksi la fotojn lau la grupoj iŝteresaj Kaj ŝeninteresaj Kaj elekti lau tiuj kriterioj la fotojn valorajn por supervivi. Neniu povas scii, kio interesos la homojn de la venontaj generacioj. Kiel instruas la spertoj, la plej interesaj objektoj kaj personoj en multaj kazoj por la posta rigardanto ne estas la samaj kiel por la fotinto. *Alfred H. Fried* ekzemple, persone tre modesta kaj versajne ankau tial trovebla sur nur malmultaj fotoj el la fruaj tempoj de Esperanto, en 1911 igis nobelpremiito. Hodiaŭ la sola foto en nia kolekto, sur kiu li sendube estas identigebla, estas elstara dokumento guste pro li, kiu tiam 1907 inter *Gaston Moch* kaj la *geedzoj Zamenhof* certe ne estis la cefa persono. Tio e pli validas por foto el la jaro 1925 kun la posta urbestro de Vieno kaj ec statprezidanto de Austrio *Franz Jonas*. Fotita kiel simpla partoprenanto de loka Esperanto-renkontigo, li por postaj rigardantoj estas simbolo de la tiel malofta bonsanco de kunfandigo de esperantismo kun la plej altaj politikaj sferoj. Sed kompreneble ne nur al statprezidantoj sin turnas nia intereso. Ciu persono, kiu okupis sin pri Esperanto, estas ebla celo por resercoj de la posteuloj. Kaj cu ne flatas al ni ciuj la certeco, ke finfine io restos de ni?

Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto

Enhavo

- 1 Rolo de periodaĵoj en tutmonda kultura movado
- 2 Kolekto kaj informado pri la Esperanto-gazetaro
- 3 Agado de Rondo Takács

1 Rolo de periodaĵoj en tutmonda kultura movado

En la unuaj du jaroj nur la korespondado de L.L. Zamenhof ebligis kontakton inter la novaj adeptoj de la internacia lingvo Esperanto kaj la aŭtoro. Kvalitan kaj kvantan evoluon certigis la monata apero de la unua Esperanto-periodaĵo (*La Esperantisto* , Nürnberg, la 1-a de septembro 1889).

Fine de la jaro la unua redaktoro, Christian Schmidt, dissendigis la organon jam al 113 abonantoj, logantaj ĉefe en la ĉara Rusio. Poste mem la aŭtoro redaktis la gravan informilon, kies aperon helpis la malavara financa apogo de W.H. Trompeter. Sen periodaĵo oni ne povintus aranĝi la voĉdonon en 1894.

Kiel sciante, pro la aperigado de Prudento kaj kredo ĉe Tolstoj, en la februara n-ro en 1895, la rusa cenzuro malpermesis postigi la organon al la c. 400 ruslandaj abonantoj, tiel kreigis novtipa movada krizo, t.e. ĉeso de la aperigo de *La Esperantisto* .“

Solvis la gravan problemon la oferemaj anoj de Klubo Esperantista en Uppsala , Svedio.

Paul Nylén kaj la juna Valdemar Langlet, kunlabore kun Vladimir Gernet el Odessa, Ruslando sukcesis eldoni somerfine en 1895, en Uppsala la duan centran Esperanto-organon sub titolo *Lingvo Internacia* .“La novan finanĉan problemon en 1899 solvis la donaco de la sveda Hj. Bäckström kaj la presista helpo de Pál Lengyel, kiu ekde 1890, en urbo Szekszárd, Hungario favorpreze presis la movadan organon. Tiutempe en Hungario ekzistis nek regiona nek landa esperanto-societo. Pál Lengyel kun sia familio kaj kun sia help-presisto Kajetán Seper, ekde 1904 jam trovigas en Parizo, la tiama centro de la internacia Esperanto-movado, kie li kunfondis la presejon Presa Esperantista Societo.

2 Kolekto kaj informado pri la Esperanto-gazetaro

Ekde 1905, post la unua kongreso de esperantistoj en Boulogne-sur-Mer, Francio signifis kreskis la nombro de la eldonitaj libroj kaj periodaĵoj en Esperanto. La eldonejoj de la diversstemaj libroj kaj la redaktejoj de la variaj periodaĵoj trovigis ĉefe en Eŭropo. Landaj asocioj kaj individuoj komencis sisteme kolekti la aperintajn centojn kaj milojn da Esperanto-eldonaĵoj. Unu el la plej konataj kolektantoj estis Georgo Davidov, urbestro de Saratov, kiu celis akiri ĉiujn verkojn en aŭ pri Esperanto, kaj havis tiam la plej grandan Esperanto-bibliotekon de la mondo. Li mem eldonis katalogojn, kie aperis krom la libroj kaj broŝuroj ankaŭ datenoj pri la aperintaj kaj aperantaj Esperanto-periodaĵoj. Onidire por helpi la intersangojn de la maloftaj Esperanto-gazetoj li mem eldonis en Saratov kelkajn unikajn organojn (ekz. *Eŝkima Revuo* , “*Karnevala Stelo*” , “*Pŭlo*”).“

En 1913 sub direkto de Joan Amades Gelats en Barcelona funkciis Instituto de l' Esperanta Gazetaro, aliginta al la Kataluna Esperantista Federacio. Li eldonis bibliografion de c. 500 Esperanto-periodaĵoj aperintaj inter septembro 1889 kaj septembro 1913, do en la unua kvaronjarcento de la esperanta gazetaro. La titolo de la verko estas *Plena recenzo de l' Esperanta gazetaro* .“Mi trovis kaj havas nur la unuan parton (du pagojn) de tiu tre valora listo, kiu

komencigas per *Afrika Esperantisto*, “Algiers, Algerujo, Maj. 07, kaj finigas per *Kimra Kroniko*, “Portmadoc, Kimrujo, Jan. 1911. Do ĝi entenas la titolon, eldonlokon (kun eldonlando) kaj la aperdaton de la unua numero de la organo. En tiu parto aperis informoj pri 249 titoloj.

Trafoliumante la numerojn de *Oficiala Gazeto Esperantista* (Paris, jun. 1908 - jan. 1922) oni plurfoje trovas informojn pri la novaj Esperanto-gazetoj. La bibliografian laboron de la esperantistaj esploristoj tre ofte helpas la gazetoj mem. En la unua duonjarcento de Esperanto estis kutimo saluti la novajn fratojn, “almenau per mencio de la titolo, eldonloko kaj karaktero de la novnaskita periodaĵo. En kelkaj ĉefe ekstereuropaj organoj ankau nuntempe oni trovas rubrikon kun titolo *Ricevitaj gazetoj*.”

Bona fonto por la esploristoj estas la jarlibroj de UEA, kvankam oni devas esti singarda, ja plurfoje tie mankas la novaj organoj kaj aperas en ili aliaj, jam ne aperantaj organoj.

La unua mondmilito, ĉefe en Europo kie mortis 16 milionoj da homoj haltigis plurloke ankau la pacon, kiun bezonas la Esperanto-movado.

La grava verko de P.E. Stojan "Bibliografio de Internacia Lingvo" (Genève, 1929), kun bibliografia aldono de Reinhard Haupenthal (Hildesheim, New York, 1973) enhavas informojn ankau pri la esperanto-gazetaro kaj tiujn ankau pri la jarlibroj, aperintaj ĝis c. 1928. Oni trovas en ĝi ankau la familian nomon de la redaktoroj.

Apartan lokon okupas inter la fontoj de la Esperanto-periodaĵoj la valora verko de d-ro Jozefo Takács (Nagymaros, Hungario) Katalogo de la Esperanto-gazetaro. “La manuskripton reviziis kaj per 198 novaj gazetotitoloj kompletigis Paulo Tarnow (Germanio) kaj László Spierer (Somlai), el Budapeŝt, Hungario, kiu aldonis 31 novajn gazetotitolojn. La verkon oni eldonis en 1934 en Jablonné nad Orli, (Ĉeĥoslovakujo, nun Ĉeĥio). La unua kapitro portas la titolon *Listo de la Esperanto-Gazetoj*. “Oni trovas tie 1274 titolojn, krome la eventualan subtitolon, eldonlokon (en aparta indekso ties landon), la aperdatojn, lau monata precizeco, amplekso(j)n, formato(j)n, krome la kodon de la Stojan-verko, foje ankau aliajn karakterizajn informojn. D-ro J. Takács, kiu estis prezidanto de Tutmonda Asocio Kolektanta, redaktoro de Tutmonda Kolektanto, fine de la antaŭparolo mencias, ke La manuskripto de la unua aldono kun 300 titoloj estas jam prespreta.” Bedaurinde oni ne aperigis tiun aldonon.

3 Agado de Rondo Takács

Ekde fino de la 1960-aj jaroj formigis seriozaj kaj rezultohavaj fakaj kontaktoj inter tri individuaj kolektantoj de Esperanto-periodaĵoj. El inter ili fakte la plej sperta estis Ramon Molera el urbeto Moyá (Katalunio/Hispanio), kiu jam en la kvindekaj jaroj aperigis anoncojn en diversaj esperanto-periodaĵoj, por trovi mankantajn numerojn de gravaj kaj interesaj Esperanto-organoj. Luis Ma. Hernández Yzal, fondinto de la Hispana Esperanto-Muzeo kolektis tion, kio ligigis al la esperanto-movado. La tria persono en la triopo estis Árpád Máthé, kiu okupigis ĉefe pri kolektado de la periodaĵoj. Li proponis al César Vanbiervliet (Kortrijk, Belgio) turni sin unuavice al kompletigo de jarkolektoj de Esperanto-periodaĵoj. La kolekta agado liveris multe da datenoj por la komuna bibliografia laboro. Se oni havas hejme milojn da jarkolektoj, tiam oni ne nepre bezonas viziton de pluraj Esperanto-bibliotekoj.

En la jubilea jaro de la Esperanto-movado, en aŭgusto 1987, en Budapeŝto, nia karmemora Luis Hernández Yzal iniciatis fondon de bibliografia esplorgrupo omage al d-ro József Takács kun nomo (Labor)rondo Takács. Anoj de la triopa Rondo Takács estis la iniciatinto, Hernández Yzal, Ana Maria Molera Urgellés, filino de Ramon Molera, kiu forpasis en 1983, kaj Árpád Máthé.

En la nomo de Rondo Takács Árpád Máthé kadre de la Kongresa Universitato en Brajtono (1989) prelegis pri la centjara Esperanto-gazetaro. Daurigante nian esploran laboron en 1990 ni resumis niajn datenojn kaj aperigis kvarpagan numeron de faka revueto: Periodaĵoj en au pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj. Ni prezentis lingvan distribuon de 6577 titoloj (91,14 % en au pri Esperanto), kiuj laŭ nia tiama sliparo konsistigas 29 306 jarkolektojn (26 926 jarkolektoj en au pri Esperanto, t.e. 91,88 %). Samtempe por ni evidentigis, ke en la estonto ni okupigos nur pri esperanto-periodaĵoj.

Periodaĵoj, bibliografia organo de Rondo Takács aperis en Budapeŝto, julio 1993 - 1995, 30 numeroj (ISSN 1216-7800). Redaktis ĝin d-ro Árpád Máthé, kunredaktis Luis Hernández Yzal, Ana Maria Molera Urgellés. La listo de periodaĵoj en au pri Esperanto entenas 8735 titolojn. Krom la titoloj aperas en la listo nur la eldonloko(j), kaj eldonjaro(j). Sekvas la liston eldonloka indekso, kaj 2 aldonoj.

Post la bedaŭrinda morto de nia iniciatinto Luis Hernández Yzal, ni daurigis nian esploran laboron. Tio okazis en formo de vizitoj de gravaj Esperanto-bibliotekoj, unuavice IEMW en Vieno. Ni krome akiris periodaĵo-katalogojn de konataj E-bibliotekoj. Nia informaro ricigis je 50 %-oj kalkulante nur la titolojn. La ampleksigo de la esplorado estis kaj estas tre signifa. Krom titolo ni aperigas en la t.n. laborekzempleron ankaŭ la eventualan subtitolon, la eldonanto(j)n, eldonloko(j)n. Ni ankaŭ aldonas la lando(j)n, aperjarojn, laŭ monata precizeco, amplekso(j)n, formato(j)n, preŝtipo(j)n, nomojn de ĉiuj kontribuantoj (iniciatinto, fondinto(j), redaktoro(j) (de kiam ĝis kiam) kaj atingeblecon de la maloftaj organoj en la gravaj Esperanto-bibliotekoj. Tio koncernas IEMW, Hispanan Esperanto-Muzeon, Germanan Esperanto-Bibliotekon en Aalen, Bibliotekon Hodler, kaj malofte privitajn bibliotekojn de la anoj de Rondo Takács, t.e. Biblioteko de Ana Maria Molera, Biblioteko de Árpád Máthé. La rezulto de nia esplora laboro rezultigis la unuan version, kiun Árpád Máthé prezentis en Hispanio, komence de oktobro 2007 kadre de la Kultura Semajno, poste ĝin prezantis kadre de la Kolokvo: Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj.

La unua volumo havas la titolon **Bibliografio de periodaĵoj en au pri Esperanto**. Ĝia subtitolo estas **"In Memoriam Luis Hernández Yzal"**. Tiel ni omagas al nia karmemora iniciatinto kaj gvidanto. Amplekso c. 1000 pagoj, A4. La kontrolita prova volumo aperos ĝis la UK en Bjalystok (Aŭgusto 2009) en papera varianto. La t.n. laborekzempleron ĝis mezo de decembro 2008 ekspedos por la verkista triopo kaj por la inspektoroj de la bibliografia laboro profesoroj Humphrey Tonkin kaj Detlev Blanke. Unu ekzempleron ni liveros ankaŭ al Osmo Buller, kiu multfoje helpis nian esploran laboron. Post la ricevo de la kritikoj sekvas redaktado de la kontrolita, tralaborita prova numero. La eldonnombron decidis la kompilantoj laŭ la proponoj de niaj ekspertoj-inspektoroj. Por kovri la eldonkostojn ni povos uzi la Bibliografian fondaron Luis Hernández Yzal de UEA.

Por aperigi vere detalan bibliografion ni proponas ankoraŭ kelkajn jarojn da esplorado, ja nur la trastudado de la periodaĵoj troveblaj en mia propra hejma biblioteko bezonas c. 18 monatojn.

Lau niaj planoj la subtitolo de la dua volumo estos **"In Memoriam Ramon Molera Pedrals"**. En ĝi estos listigataj tiuj nacilingvaj organoj, en kiuj aperis rubrikoj, kronikoj, resumoj, au kursoj, krome la eldonloka indekso kaj indekso de kontribuantoj (kun c. 25-30 mil nomoj) de la unua volumo. La atendebla amplekso estos c. 800-900 pagoj. La laborekzempleron de la dua volumo laŭ niaj planoj aperos diske ĝis la UK en 2010. En niaj sliparoj nuntempe troveblas pli ol 6 mil gazetotitoloj.

La plan-lingvo Volapük en arkivoj kaj bibliotekoj¹

Enhavo

- 1 Enkonduko
- 2 La bibliografia situacio
 - 2.1 Kerckhoffs 1889
 - 2.2 Kausch 1900
 - 2.3 Stojan 1929
 - 2.4 Takács 1934
 - 2.5 Schmidt 1962/65 (1981, 2008)
 - 2.6 Haupenthal 1982
 - 2.7 Schleyer-bibliografio (preparata)
- 3 La biblioteka situacio
- 4 La arkiva situacio
- 5 Dezirendoj kaj farendoj
 - 5.1 La ekzemplo de *Rund um die Welt*
 - 5.2 Sciencaj dezirendoj
 - 5.3 Represo de pliaj Volapük-dokumentoj
 - 5.4 Kompleta prezento de Volapük
- 6 Proponoj pri kunlaboro
- 7 Bibliografio

1 Enkonduko

Antaŭ precize 100 jaroj, de la 15a ĝis la 24a de oktobro 1907, en Collège de France, en Parizo, membroj de la Komitato de la Délégation pour l'Adoption d'une Langue auxiliaire internationale (Delegacio por Adopto de Helpa Lingvo Internacia) plenumis 18 kunsidojn por revui kaj prijugi la diversajn projektojn de plan-lingvo. En sia fina kunsido (1907-10-24) la Komitato decidis principe adopti Esperanton, tamen kun iuj modifoj farotaj de la konstanta Komisiono laŭ la senco difinita en la Konkludoj de la Raporto² de la du sekretarioj Louis Couturat (1868-1914)³ kaj Léopold Leau (1868-1943)⁴ kaj en la pseudonima projekto de Ido. Estis la naskigo de la plan-lingvo Ido.

Hodiaŭ, cent jarojn post la evento, la dokumenta situacio estas malfacila, la detaloj pri la Delegacio ankoraŭ ne komplete prezentitaj. Ĉu la Raporton mem, kies nurajn konkludojn aperigis la duopo Couturat/Leau kaj kiun Waringhien en sia editoraĵo de la leteroj de Zamenhof nomis „dika”⁵; neniue konas, ĉar ĝi ekzistis en nuraj 25 ekzempleroj.⁶ Nur lasta-tempe mi sukcesis elspuri du postvivintajn ekzemplerojn, kiujn mi editoras kun la plan-lingva poligloto Gonçalo Neves.

Ĉu la arkiva kaj biblioteka situacio de aliaj plan-lingvoj pli bonas ol tiu de Ido? Apenaŭ. Mi volas reliefigi la situacion per la ekzemplo de la plan-lingvo Volapük.

Mian referaton mi dividis en kvin sekciojn:

¹ La prelego intertempe aperis kiel broŝuro du-lingva (germana, Esperanto), kp. HAUPENTHAL 2007c.

² Kp. COUTURAT/LEAU 1907 a.

³ Pri Couturat kp. *Louis Couturat* ... BEAUFRONT, DASSEN, L'œuvre ... SCHMID 1983, 2001.

⁴ Pri Leau kp. CORNIOLEY.

⁵ ZAMENHOF, vol. 2, p. 40.

⁶ COUTURAT/LEAU 1907 b.

1. La bibliografia situacio
2. La biblioteka situacio
3. La arkiva situacio
4. Dezirendoj kaj farendoj
5. Proponoj por kunlaboro

2 La bibliografia situacio

Por la plan-lingvoj Ido⁷ kaj Volapük ekzistas pli-malpli kompletaj bibliografioj. Rilate al Volapük mi deziras atentigi pri sep titoloj:

2.1 Kerckhoffs 1889

La cefa protagonisto de la franca Volapük-movado, Auguste Kerckhoffs (1835-1903), en 1889 publikigis la duan, multe ampleksigitan eldonon de sia *Yelabuk pedipedelas*⁸ (Jarlibro de diplomitoj), kiu entenas detalan bibliografion de ciuj plan-lingvaj provoj gis tiu tempo. Oni povas supozi, ke Kerckhoffs posedis au almenau vidis la listigitajn titolojn. Kvankam ni nenion scias pri la lasta jar-deko de lia vivo (li mortis en 1903 pro trajn-akcidento en Svislando), estas interese, ke Couturat/ Leau en sia *Histoire de la lange universelle*⁹ dankas al Kerckhoffs pro ties helpo. Cu ili disponis pri lia biblioteko au ec akiris gin, ni ne scias.

2.2 Kausch 1900

Duan provon entreprenis en 1900 la Dresdena post-sekretario Oskar Kausch (1848-1932) per sia apenau konata verko *Die Literatur der Weltsprache (Literat volapüka)*¹⁰ (La literaturo de la mond-lingvo). Liaj indikoj bazigas sur Kerckhoffs, sed mankas al ili la ekzakto kiun oni atendus de trejnita bibliografo. Pro tio la verko ne meritas apartan atenton.

2.3 Stojan 1929

La plej ampleksan interlingvistikan bibliografion autoris en 1929 la ruso Petr E. Stojan (1884-1961). Lia *Bibliografio de Internacia Lingvo*¹¹ aperis kun la apogo de International Auxiliary Language Association (IALA). Kvankam pri Esperanto gi estas pli-malpli kompleta, la du plan-lingvoj Ido kaj Volapük montras gravajn mankojn, kiuj mia-opinie havas du kauzojn:

- 1) la nesufica dokumentiteco de la tiama UEA-biblioteko en Genevo, kie Stojan laboris ekde 1925;
- 2) la nesufica sercado en la stokoj de gravaj universal-bibliotekoj. En la kazo de Ido aldonigas, ke sia-tempe nul instanco entreprenis la sisteman kolektadon de la presita materialo.¹²

La Volapük-titoloj de Stojan etendigas de n-ro 5757 gis n-ro 5852, entute do (nur) 95 registritaj eroj.

Krom evidentaj mankoj (multajn titolojn oni vane sercos), la indikoj ofte estas nesuficaj kaj malprecizaj, pruvo, ke Stojan ne autopsiis la verkojn.

⁷ Pri Ido kp. CARLEVARO/HAUPENTHAL.

⁸ Kp. KERCKHOFFS; pri gi kp. ankau la studon de GACOND 1994.

⁹ COUTURAT/LEAU 1903, p. XXX.

¹⁰ Kp. KAUSCH.

¹¹ Kp. STOJAN.

¹² Nun-tempe la plej ampleksajn Ido-kolektojn supozeble posedas CDELI kaj IEMW.

2.4 Takács 1934

En 1934 la hungara dent-kuracisto József Takács (1890-1944) eldonis *Katalogo de la Esperanto-gazetaro*¹³. La titolo estas erariga, car la verko enhavas liston de periodaĵoj ankaŭ de aliaj planlingvoj. La sekcio de Volapük (p. 132-134) enhavas (nur) 35 erojn, estas do neniel kompleta kaj elcerpa. (Cetere, la Katalogo de Takács estis represita c. 1980 sen indiko pri eldonisto, eldon-loko kaj eldon-jaro. Lau informo de D-ro Mathé ci represon faris Károly Fajsz (1911-2004).)

2.5 Schmidt 1962/65 (1981, 2008)

La unua kaj sola kiu sisteme studis kaj dokumentis la fenomenon Volapük (kaj kiu meritis la nomon de volapükologo) estis la muzikisto Johann Schmidt (1895-1977)¹⁴. Li malkovris la lingvon komence de la 1920aj jaroj kaj sukcesis kontakti volapükistojn kiuj ankoraŭ vivis: Albert Sleumer (1876-1964), Jakob Sprenger (1872-1951), Arie de Jong (1865-1957). Tra ili kaj per la stokoj acetitaj de frankfurta antikvaĵejo, Schmidt sukcesis krei la kredeble plej ampleksan bibliotekon kaj arkivon de Volapük¹⁵. Li aktivigis en la volapüka renesanco provokita de la lingvaj reformoj de la nederlanda kuracisto Arie de Jong¹⁶, verkis lerno-libron por german-lingvanoj¹⁷, multe tradukis por la *Volapükagased pro nedänapükans* (1933-1963), sed cefe verkis resuman historion de Volapük¹⁸ kaj postlasis du tajpo-skriptajn bibliografiojn: *Erste vollständige Zeitschriften-Liste des Volapük* (1962) (Unua kompleta listo de Volapük-gazetoj) kaj *Literatur-Liste des Volapük* (1965) (Literaturlisto de Volapük) kies faksimilojn mi eldonis en 1981 kaj kies dua eldono ĵus aperis¹⁹. La revuolisto de Schmidt entenas 124 erojn, ankaŭ de revuoj kun pli-malpli konstanta rubriko en Volapük. Lia listo de monografioj ampleksas 941 erojn kaj donas realan bildon pri la ekzistanta Volapük-literaturo. La plusoj kaj minusoj de lia laboro resumeblas jene:

1. strebo al kompleteco, kvankam iuj titoloj restas fantomaj. (Miaj provoj en la 1970aj jaroj teleprunti surbaze de la Schmidt-indikoj ofte montrigis vanaj.);
2. li ne notas, kion li havis/vidis kaj kion li cerpis el aliaj fontoj (ekz. recenzoj);
3. la fremd-lingvaj titoloj estas ofte misortografiaj;
4. ne trovigas konsekvence aplikitaj bibliografiaj normoj.

2.6 Hauptenthal 1982

Sur la jam solida bazo de Schmidt kaj ankoraŭ helpate de li, mi povis aperi en 1982, ce Olms, mian propran Volapük-bibliografion²⁰. Ĝian utilon kaj valoron devas prijugi aliaj. Mia cefa strebo estis duobla:

1. strikte apliki bibliografiajn normojn;
2. montri la realan ekziston de la koncerna verko per indiko de konkreta trov-loko.

La paso de la jaroj kaj la nun-tempa eblo konsulti la elektronikajn katalogojn de multaj bibliotekoj kaŭzis, ke divers-loke mia rimarko *kein Nachweis* (‘nul trov-loko’) povis malaperi kaj ke novaj ankoraŭ ne registritaj titoloj emergis el la maro de forgeso.

¹³ Kp. TAKÁCS.

¹⁴ En preparo estas artikol-kolekto de Schmidt pri Volapük.

¹⁵ Kp. mian intervjuon kun Schmidt: HAUPENTHAL 1966.

¹⁶ Kp. JONG.

¹⁷ Kp. SCHMIDT 1933.

¹⁸ Kp. SCHMIDT 1998.

¹⁹ Kp. SCHMIDT 2008.

²⁰ Kp. HAUPENTHAL 1982.

2.7 Schleyer-bibliografio (preparata)

Kiam en 2001, en la lulilo mem de Volapük, en la pastra domo de Litzelstetten, konstituigis Prelato-Schleyer-Komitato, unu el ĝiaj proklamitaj celoj estis la kompilo de kompleta Schleyer-bibliografio. Ĝi estas slipare finita, jam kompostita, sed bezonas fundan revizion kaj aldonon de ankoraŭ pluraj bibliotekaj trov-lokoj. Ĝi listigos en ordo strikte kronologia la monografian verkaron de Schleyer (ankau ekster Volapük) kaj aldonos ĉiujn sciatajn trov-lokojn de la koncerna verko.

3 La biblioteka situacio

Se mi bone komprenas la situacion, ekzistas nur du publikaj bibliotekoj, kiuj specialigis en la ekskluziva kolektado de plan-lingva materialo: la Austria Nacia Biblioteko kun sia Kolekto pri Planlingvoj, en kies Palaco Mollard ni nun trovigas, kaj la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds (Svislando) kun sia Centre de Documentation et d'Etude sur la Langue Internationale (CDELI)²¹.

Ĉiuj ceteraj bibliotekoj kiuj kolektas interlingvistikan materialon, estas nepublikaj, por ekzemplo la asociaj bibliotekoj de UEA (Biblioteko Hodler en Rotterdam), de BEA (Biblioteko Butler en Barlaston) kaj de GEA (Biblioteko Burkhardt en Aalen)²². Ili ĉiuj posedas pli au malpli (kutime malpli) grandan kolekton de Volapük-materialoj. Tamen nur tiu de IEMW estas alirebla per elektronika katalogo. Ali-flanke ekzistas, ni diru, kasitaj Volapük-stokoj en publikaj bibliotekoj. Temas au pri hazardaj akiroj (tiu-kaze kutime temas pri etaj libro-kvantoj) au pri donacoj de volapükaj fondusoj (ili povas esti relative ampleksaj) au temas pri la depono de t.n. devigaj ekzempleroj en la koncernaj naciaj bibliotekoj. En la kazo de Germanujo la Naciaj Bibliotekoj komencis sian kolekton aktivecon nur en 1913 (Leipzig) respektive post la dua mondmilito (Frankfurt), t.e. en epoko kiam la volapüka libro-produktado jam finigis. Ali-flanke la Stata Biblioteko de Berlino havas la laulegan devon kolekti la materialojn aperintajn inter 1870 kaj 1918. Ĝia devo do estas posedi (t.e. akiri au reakiri) Volapük-librojn kaj -revuojn aperintajn en Germanujo ekde 1880. Efektive Berlino posedas konsiderindan kvanton da titoloj venintaj ĉefe el tri fontoj:

1. akiro en la aper-momento;
2. la materialoj de la antaŭmilita Germana Esperanto-Instituto;²³
3. postaj akiroj au reakiroj en kazo de militaj perdoj. La problemo tamen estas, ke brokanta merkato por volapükaj titoloj praktike ne ekzistas.

Du aliaj bibliotekoj en Germanujo meritas mencion: la universitata biblioteko de Kolonjo²⁴ kaj la Bavara Stata Biblioteko en Munkeno. La unua akiris parton el la fama kolekto de Paul Tarnow (1881-1944) el Düsseldorf, kies leona parto tamen pereis pro neglektemo de Nobert Barthelmess (1897-1987), kiel evidentigas el korespondo de la Tarnow-vidvino al Johann Schmidt. Tarnow akiris, por ekzemplo, la kompletan kolekton de *Volapükabled* (1881-1908) apartenintan al Rupert Kniele (1835-1911). La Bavara Stata Biblioteko akiris komence de la 1920aj jaroj la ampleksan kolekton de la iama Munkena Volapük-Klubo, unu el la plej gravaj.

Simile gravan akiron faris la Stiria Landa Biblioteko en Graz kiu transprenis la kolektojn de la Volapük-klubo en Graz. Alia konsiderinda kolekto trovigas en la universitata biblioteko de Amsterdam kiu akiris la kolekton de la nederlanda volapükisto Johannes George Marie Reijnders (1869-1963). La stokoj de CDELI devenas grand-parte de Johann Schmidt kiu komence de la 1970aj jaroj disvendis sian unikan kolekton. Aliaj menciindaj kolektoj trovigas en British Library en Londono kaj en New York Public Library kaj jen jam preskau ĉio. Ĉio cetera suldigas al la

²¹ Kp. pri ĝia historio GACOND 2003, 2004.

²² Pri la historio de tiuj bibliotekoj kp. Aalen: SCHAEFFER, Rotterdam: SIKOSEK.

²³ Kp. SZIMKAT.

²⁴ Kp. WINGEN.

hazardo au al lega depono, kiel estas la kazo, por ekzemplo, ce la Rega Dana Biblioteko en Kopenhago.

Ce iuj bibliotekoj la serco ne eblas per simpla enmeto de slozil-vorto Volapük, “car mankas indeksado lau slozil-vortoj por la oldaj fondusoj. Tial serco eblas nur lau aŭtoroj, precipe ce bibliotekoj kiuj skanis siajn oldajn man-skribitajn slipo-katalogojn (ekz. Vurtembergia Landa Biblioteko en Stuttgart, kaj la menciitaj en Graz kaj Munkeno).

4 La arkiva situacio

Principe distingeblas tri tipoj de arkivoj:

1. asociaj, klubaj ktp. arkivoj;
2. privataj arkivoj de individuoj;
3. publikaj (urbaj, stataj, ekleziaj ktp.) arkivoj.

Temas esence pri nepresita materialo, car libroj kaj revuoj konsistigas bibliotekajn elementojn. En sia eseo Vom Zenith zum Nadir oder Wie Volapük spurlos verschwand²⁵ (De zenito al nadiro au Kiel Volapük vanuis senspure) Johann Schmidt elmontras la kauzojn, kial la materia substrato de la iama Volapük-movado draste reduktigis kaj grand-parte ne plu ekzistas. Unu el ci kauzoj konsistas en tio, ke la roluloj transvivis movadon por kiu ili engagigis. Ili au transiris al aliaj tendaroj au tute forlasis la sinkan siron. La korespondoj sekve igis balasto, plej malfrue post ilia morto. Konatas, por ekzemplo, la kazo de la viena plan-lingvisto Julius Lott (1845-1905) kies postlasajon makulaturigis la vidvino²⁶. Tiel, kun ege pokaj esceptoj, ni nenion scias pri la korespondoj de Johann Martin Schleyer (1831-1912) (kaj li dissendis milojn da ili), Rupert Kniele, Heinrich Schnepfer (1853-1934), Moritz Obhlidal (1849-1934), Alfred Kirchhoff (1838-1907), Auguste Kerckhoffs, Leopold Einstein (1833-1890), por citi nur kelkajn. Rudimentoj de klubaj arkivoj, i.a. ampleksa foto-kolekto de la cefaj volapükistoj, konservigis en la antaŭe menciitaj bibliotekoj (Graz, Munkeno). Konservigis ankaŭ, en pluraj urbaj arkivoj, la spuroj de la iam ekzistintaj Volapük-kluboj²⁷: dokumentoj pri la fondo kaj malfondo, protokoloj, statutoj, foje gazet-artikoloj pri la aktiveco de la klubo.

El la personaj arkivoj mi konas nur tri kazojn de pli-malpli kompleta konservo:

1. **Johann Martin Schleyer.** —La sorto de lia biblioteko estas komplika kaj ne estas nun la momento skizi ties meandrojn. Ĝi disiris al diversaj posedantoj, i.a. al Johann Schmidt, kaj tra li parte al Vieno. Sed la plimulto nun trovigas en privataj posedoj, i.a. la tag-libroj, el kiuj mi povis cerpi por pluraj prelegoj pri Schleyer.²⁸ La *Prälat-Schleyer-Jahrbuch*²⁹ publikigas pliajn partojn de tiu arkiva materialo.

Kolekton da post-kartoj adresitaj al Schleyer posedas la Badena Landa Biblioteko en Karlsruhe: kalejdoskopika bildo pri la vigla korespondo okazinta en la Volapük-movado. Pri Schleyer arkivaĵojn posedas ankaŭ pluraj instancoj: la Urba Arkivo de Konstanz, la paroka arkivo de Litzelstten, la Arkiepiskopa Arkivo de Freiburg (i.a. la personaj aktoj), la Generala Landa Arkivo en Karlsruhe (la proces-aktoj) kaj Heimatmuseum Lauda-Königshofen.

²⁵ Kp. rim. 13.

²⁶ Kp. LOTT.

²⁷ Pri la Volapük-kluboj kp. SCHMIDT 2005.

²⁸ Kp. HAUPENTHAL 2005 a, 2006, 2007 a.

²⁹ Ĝi intertempe aperis: kp. HAUPENTHAL/HAUPENTHAL 2008.

2. **Johann Schmidt.** —Lia korespondo ekzistas kaj trovigas en privata posedo. Gi ampleksas cefe leterojn adresitajn al li de Albert Sleumer, Jakob Sprenger, Arie de Jong kaj Paul Tarnow. Sed cio ci dokumentas nur la lastan fazon de Volapük.
3. **Arie de Jong.** —Ankau lia arkivo (kronologie ordigita de 1900 gis 1957) konservigis kune kun la kopioj kiujn li faris de siaj elirantaj leteroj. Car ci korespondo estas grand-parte en Volapük, necesus kompetenta konanto de la lingvo por ekspluati gin.

Regas ankoraŭ neklareco pri la arkivo de la brazila volapükisto José Brasilício de Sousa (1854-1910) kies nepo Abelardo Sousa³⁰ en 2002 publikigis libron pri la volapüka aktiveco de sia avo.

Esplorendaj estas du publikaj arkivoj: tiu de *American Philosophical Society* en Philadelphia kaj tiu de Unuigintaj Nacioj en Genevo. La Amerika Filozofia Societo instigis multajn akademiojn okupigi pri la mond-lingva demando kaj publikigis du raportojn pri Volapük³¹. La gisnunaj studoj de Bernard Golden³² estas nesuficaj.

Kun la arkivo de UN mi konatigis sercanta la Zamenhof-leterojn al la austra Nobel-premiito Alfred Fried (1864-1921) kiuj venis tien tra la postlasaĵo de Bertha von Suttner (1843-1914). La arkivo entenas ankau materialojn de la svisa Weltspracheamt kaj la dosierojn pri la diskutoj de Ligo de Nacioj pri Esperanto.

5 Dezirendoj kaj farendoj

5.1 La ekzemplo de *Rund um die Welt*

Kiam en la jaro 2000 Olms reprenis la gravan Volapük-revuon *Rund um die Welt*³³ de Siegfried Lederer (1861-1911), mi kaptis la okazon starigi en mia postparolo liston de sciencaj dezirendoj³⁴. Ili rilatis unu-flanke la revuon mem, ali-flanke kromajn studojn.

Sistema analizo de la revuo povus konsisti en jenaj ses punktoj:

1. Pretigo de kumulita registro lau persona kaj tema indekso. Per tio la revuo ricevus la karakteron de konsultilo.
2. Bibliografiaj indikoj trovigantaj en la revuo bezonus komparon kun la ekzistantaj bibliografiaj. Titolojn ankoraŭ ne registritajn oni devus serĉi tut-monde.
3. La ekziston de ciuj menciitaj Volapükkluboj oni devus kontroli en la respektivaj arkivoj.
4. La menciojn de Volapük en la tiama gazetaro oni devus registri kaj verifiki. Ili donas autentan bildon pri la tiama socia realo de Volapük.
5. Laueble devus kompiligi biografiojn de ciuj iom signifaj volapükistoj (ekz. aŭtoroj). Ili prezentus partan kontribuon por estonta enciklopedio de Volapük. Por la cifaloj kaj la personeco de Kerckhoffs mi instigis tiajn studojn aperintajn en la volumo *Menade bal püki bal.*³⁵

³⁰ Kp. SOUSA.

³¹ Kp. BRINTON/PHILLIPS/SNYDER 1888 a, b.

³² Kp. GOLDEN 1980 a-c, 1982, 1985.

³³ *Rund um die Welt. Zeitschriften für Volapükisten und solche, die es werden wollen.* 1.-4. Jahrgang April 1888 bis incl. März 1892. Mit einem Nachwort zum Neudruck hg. von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausgabe Berlin 1888 bis 1892.) Hildesheim, Zürich, New York: Olms 2000. 764, 13* S.

³⁴ La samo en HAUPENTHAL 2002.

³⁵ Kp. BISHOP, CARACO.

6. La historiaj datoj kaj eventoj devus prilaborigi sinoptike. Per tio ekestus kontribuo por la historiografio de Volapük en unuopaj landoj. Por Svislando mi instigis tion sam-okaze.³⁶

Konsentite: mi konscias, ke al la adreso de oni estas facile admoni ...

5.2 Sciencaj dezirendoj

La sistema ekspluato de *Rund um die Welt* markus vojojn de futura volapükologio (se uzi la patosan vorton). La grand-parte okazintan registradon de monografioj devus sekvi sistema ekspluato de la ankoraŭ ekzistantaj periodaĵoj. Futura volapükologio sekve ampleksu jenajn sekciojn:

1. la definitiva bibliografio de la monografioj kaj periodaĵoj kun laueble ciuj bibliotekaj trovlokoj;
2. konciza analizo de ciuj periodaĵoj (kompleta registro de la Volapüka gazetaro estus tasko por aparta monografio);
3. listigo de ciuj Volapük-kluboj kun ties ankoraŭ rekonstruebla aktivado kaj historio;
4. (laŭlanda) listigo de gazetara substrato pri Volapük, kiu povus speguligi la publikan resonancon de Volapük. Dezirindus kunigi la koncernajn gazetarajn raportojn en aparta volumo, ĉar la sam-tempulaj ĵurnaloj nur malfacile konsulteblas. Penseblas ankaŭ la kompilo de gravaj artikoloj pri Volapük en kolektiva verko (kiel kontribuo al la formiganta interlingvistiko).
5. La Volapük-historio estas reskribenda en sia tuteco surbaze de la ekzistantaj presitaj materialoj kaj de arkivaĵoj. Aparte necesus reliefigi la fluktuojn kaj transirojn okazintajn ekde somero 1887 pro la apero de Esperanto.

En ciuj ĉi projektoj principe necesus konsideri la tempon ĝis 1912, t. e. ĝis la morto de Schleyer.

5.3 Represo de pliaj Volapük-dokumentoj

La ekzemplo de *Rund um die Welt* montris la malfacilon trovi ankoraŭ kompletajn jar-kolektojn de revuo. Pro tio dezirindus, se la ĉefaj kolektoj de Volapük provus kompletigi siajn fondusojn kaj ofertus kompletajn foto-kopiojn (mikrofilmojn, mikrofotojn aŭ simile) kiuj konsulteblas ankaŭ en aliaj grandaj bibliotekoj. La plej gravajn Volapük-revuojn oni devus alirebligi per fotorepresoj (ankaŭ por savi la paperon de la originaloj). Tio validas ankaŭ por la monografioj. Multaj, precipe malampleksaj verkoj, povus kombini en konvolutoj (ekz. informiloj, statutoj, klubaj raportoj ktp.).

5.4 Kompleta prezento de Volapük

Se oni sukcesos sekurigi resp. (re)krei ĉi materialan bazon, penseblas fino-fara kompleta prezento de la fenomeno Volapük. Tia prezento devus konceptigi kiel briko por la historio de la plan-lingvoj en la finiganta 19a jar-cento. I.a. ĝi povus klarigi, ke la leviganta Esperanto-movado ne penseblas sen la strukturoj preformitaj de Volapük. Multaj el la fruaj esperantistoj per la kontakto kun Volapük igis sentemaj por la ideo uzi arte kreitan lingvon kiel internacian komunik-rimedon. Aldonigas, ke laŭ-strukture prefigurigis preskaŭ ĉio ĝis nun renkontebla en la Esperanto-movado³⁷:

1. propagando celanta ekspansion kun ties arsenalo argumenta kaj apologia;
2. la kulto pri la inventinto kaj ties elstara pozicio;

³⁶ Kp. KÜNZLI 1998, nun ankaŭ 2006.

³⁷ Kp. HAUPENTHAL 2005 b.

3. la organizo de la movado laŭ lokaj grupoj, landaj asocioj kaj internaciaj organizaĵoj;
4. la landaj pres-organoj ligitaj al tio;
5. la arango de regionaj kaj internaciaj kongresoj;
6. la kreo de lingvo-akademio por kontroli la evoluon de la lingvo;
7. la sento de la adeptoj aparteni al homara avangardo kaj la mistikismo ligita kun la lingvo.

Vi vidas: multo estas farenda, sed estos neniam farita pro manko de homaj fortoj, materiaj rimedoj kaj, antaŭ tio, pro manko de intereso.

6 Proponoj pri kunlaboro

La kadra temo de nia kolokvo previdas formojn de kunlaboro. Antaŭ ol prezenti kelkajn ideojn, mi ne povas ne tusi du negativajn ekzemplojn:

- 1) La revuo *Esperanto aktuell* du fojojn faris misasertojn pri la plan-lingva kolekto de mia edzino kaj mi³⁸. Laŭ instrukcio de la responsa estraro de GEA la redaktoro rifuzas publikigon de registigo.
La saman misinformon faris ankaŭ unu el la ceestantoj en publikigita teksto³⁹. Tiaj misinformoj havas nur unu celon: konscie aŭ pretervole misorienti la publikon. En kazo de privata kolekto tio tutas eĉ rekte la intim-sferon de la koncernatoj kaj tial estas esprimo de mankanta respekto.
- 2) Kvankam Gesellschaft für Interlinguistik e. V. deklaras siajn konferencojn apertaj por ĉiu interesato, la prezidanto de la Societo rifuzis unue al mi, poste al mia edzino, la partoprenon en la novembra konferenco. La Societo dekomence rifuzis al mi membrecon sen indiko de kialoj. Ĉi ekzemploj montras, ke por iuj ideologio aŭ antaŭjuĝo gravas pli ol faka kompetento. Sur tia bazo ne povas prosperi kunlaboro.

Ni kutimigis al tio, ke nun-tempe oni parolas multe pri la savo de kultura heredaĵo. UNESCO deklaris multajn objektojn savindaj: de la piramidoj ĝis la staci-doma kvartalo de Metz. Sed la koncepton kultura heredaĵo ŝi ne povas limigi al la arkitekturo de la homaro. Ĝi ampleksas ankaŭ la savon de kultur-pejzaĝoj kaj same la savon de ĉio ligita al la homa skribo. La plan-lingvoj kaj la verkoj en ili kreitaj devus inkluzivigi en ĉi kulturen heredaĵon de la homaro. Responsuloj devus konscii pri tio kaj agi laŭe.

En sia libro *Cu Esperanto postvivos la jaron 2045?*⁴⁰ —tabuigita en la Esperanto-movado —Tazio Carlevaro konkludas: Ne videblas estonto por la planlingvoj. **Ili malaperos.** En la fina ĉapitro li faras jenan alvokon: Nia tasko, nuntempe konsistas en la *konservo de la memoro* pri Esperanto [kaj aliaj plan-lingvoj, R. H.]: kiel lingvo, kiel movado, kiel kulturo, kiel literaturo. Ni ne povis estis [sic!] la kavaliroj de la efektivigita idealo zamenhofa. Ni estu, malgraŭ ĉio [sic!], minimume, la administrantoj de la memoro. “

Sur la fono de ĉi prava rezono rilate la situacion de (ne nur) la plan-lingvo Volapük mi volas fari jenajn proponojn:

³⁸ Bekanntster Interlinguist verschenkt seine Bibliothek. En: *Esperanto aktuell* 24. 2005: 2, p. 11; Übergabe nicht erfüllt. En: *Esperanto aktuell* 26. 2007: 1, p. 10.

³⁹ Kp. BLANKE.

⁴⁰ CARLEVARO, p. 47.

1. La Esperanto-movado devus rezigni pri siaj kutimaj antaŭjugo kaj ignorado de ĉio ekster ĝi. Bonan ekzemplon antaŭ nelonge donis CDELI, kies arkivisto Claude Gacond invitis esperantistan publikon al kiu mi povis prezenti kvar prelegojn pri la vivo kaj verkaro de Schleyer.⁴¹
2. Kiel aludite en la komenco, en la nunaj tagoj plenumigos la cent jaroj de la plan-lingvo Ido. Preskau ĉio en tiu movado restas esplorenda. Mi atentigas nur pri la estig-periodo por kiu, post Bertrand Russell (1872-1970)⁴² kaj Giuseppe Peano (1858-1932)⁴³, oni devus publikigi ankau la korespondojn de Couturat al Wilhelm Ostwald (1853-1932)⁴⁴ kaj Hugo Schuchardt (1842-1927)⁴⁵. Alia esplor-objekto estus la kazo Filareto Kavernido.
3. La Prälat-Schleyer-Komitee⁴⁶ preparas aron da projektoj:
 - la eldonon de kompleta Schleyer-bibliografio;
 - la eldonon (ekde 2008) de *Prälat-Schleyer-Jahrbuch*. Ĝi invitas al kunlaboro;
 - la reeldonon de la Schleyer-biografio de Rupert Kniele⁴⁷ k. a.

Ĝi jam kunlaboras kun la Heimatmuseum de Lauda-Königshofen kiu posedas konsiderindan nombron da suveniroj pri Schleyer.

4. La Schleyer-Komitato ofertas al nia gastiganto IEMW ekzameni la eblon transpreni al la kreiganta bild-arkivo⁴⁸ ĉiujn disponeblajn fotojn kaj bildojn de Schleyer kaj generale de Volapük (diplomoj, vizit-kartoj, invitiloj, program-folioj ktp.). Kompetenta foto-firmao en aprilo 2006 digitigis la materialon disponatan de la Komitato.
5. Tio validas ankau por aliaj fotoj de volapükistoj au volapükaj eventoj. Parte ili trovigas kasite en revuoj. Pro tio, cetere, necesus granda font-registro kiu donas precizan trov-lokon de tiaj portretoj.
6. En la kadro de sia skan-programo IEMW povus skani ĉiujn Volapük-revuojn. Mankantajn numerojn, jar-kolektojn au revuojn ec komplete mankantajn ĝi devus aldoni el aliaj fontoj. Tiu-cele mi volonte helpas per atentigo pri trov-lokoj. Aliaj publikaj bibliotekoj certe donos sian helpon pli volonte kaj pli facile al IEMW kiel stata institucio ol al bibliotekoj de la Esperanto-movado au al individuoj. Ankau la kostoj ver-sajne estas malpli altaj.
7. Junaj sciencistoj kiuj deziras magistrigi, doktoriĝi au verki diplom-laboron el la kampo de interlingvistiko devas scii, ke la movado de Volapük kaj la reagoj provokitaj de Volapük grand-parte ankoraŭ estas *terra incognita*, kie eblas veraj esplor-laboroj kiuj saĝnas al mi pli gravaj ol la eterna remacado de difinoj.
8. La voko al fontoj ĉi devas mutigi.⁴⁹ Mi kredas, ke se en la Esperanto-movado oni fortikigus la konscion pri tio, trovigus mecenatoj subten-pretaj kaj ankau acet-pretaj kolektantoj kiuj permesus, ke UEA foto-represu el sia Biblioteko gravajn fru-tempajn

⁴¹ 2007-09-01. Nun HAUPENTHAL 2007b.

⁴² Kp. SCHMID 1983, 2001.

⁴³ Kp. LUCIANO/ROERO.

⁴⁴ La arkivo de Ostwald trovigas ĉe Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft e. V., en Großbothen. Kp. HANSEL/WOLLENBERG.

⁴⁵ Antaŭlaborojn faris MAYER 1991, 2001.

⁴⁶ Kp. www.bodanrueckgemeinden.de.

⁴⁷ Kp. KNIELE.

⁴⁸ www.bildarchivaustria.at

⁴⁹ Kp. ĉi-rilate mian ĵam tre fruan alvokon: HAUPENTHAL 1967.

dokumentojn. Tute konkrete: ni rebezonas la unuajn grand-formatajn jar-kolektojn de la revuo *Esperanto*, i. a. por ke la tempo ne detruu la paperon. Kie mankas faktoj, tie kreskas mitoj.

9. Ni bezonas pli da verkoj kiuj kolektas malnovajn malfacile atingeblajn dokumentojn, kiel siatempe mi provis fari per mia volumo *Plansprachen*⁵⁰. Se tio iros glate, realigos projekto *Interlinguistica Austriaca* kiu kunigos la plan-lingvan verkadon de profesoroj Back kaj Ölberg kun tiu de Hugo Schuchardt kies arkivo troviĝas en la universitata biblioteko de Graz⁵¹, kaj eventuale aliaj. Dank al la apero de Volapük, Schuchardt estis la unua lingvisto kiu rompis lancon por arte-farita lingvo kaj tiel incis senmitigan procezon ĝis hodiaŭ ne finitan.

Kaj fine por kompletigi la dekalogon:

10. Ni bezonas pli da agoj ol da vortoj aŭ inverse: al multaj vortoj devas sekvi almenaŭ kelkaj sukcesaj agoj. Mi esperas, ke nia kolokvo kontribuos al tio.

7 Bibliografio

BEAUFONT, Louis de: *Doktoro Louis Couturat*. Frankfurt: Werner u. Winter [1923]. 15 p.

BISHOP, Brian B.: La ĉifaloj de Volapük. En: *Menade bal püki bal*, p. 375-390.

BLANKE, Detlev: Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj – kelkaj problemoj. En: Pluhar, Zdenek (Red.): *Lingvo kaj interreto kaj aliaj studoj*. Dobrichovice: KAVA-PECH 2007. 134 p., p. 75-81.

BRINTON, Daniel Garrison; PHILLIPS, Henry; SNYDER, Monroe Benjamin (1888 a): Reports of the committee. Appointed October 21, 1887 to examine into the scientific value of Volapük. Presented to the American Philosophical Society, November 18, 1887, and January 6, 1888. En: *Proceedings of the American Philosophical Society*. 25. 1888: 127, p. 3-17.

samaj (1888 b): Supplementary report of the Committee appointed to consider an International Language. Read before the American Philosophical Society, dec. 7, 1888. l. c. 25. 1888: 128, p. 312-318.

CARACO, Jean-Claude: Auguste Kerckhoffs (1835-1903) kaj lia rolo en la Volapük-movado. En: *Menade bal püki bal*, p. 391-404.

CARLEVARO, Tazio: *Cu Esperanto postvivos la jaron 2045?* 2. eld. rev. kaj pligrand. Bellinzona: Dubois 2000. 61 p.

CARLEVARO, Tazio; HAUPENTHAL, Reinhard: *Bibliografio di Ido*. Bellinzona: Dubois; Saarbrücken: Edition Iltis 1999. 193 p.

CORNIOLEY, Hans: Prof dr. Louis [sic!] Leau. En: *Progreso* 20. 1944: 3 (138), p. 17-18.

COUTURAT, Louis; LEAU, Léopold (1903): *Histoire de langue universelle*. Paris: Hachette 1903. XXX, 576 p. (Repr. Hildesheim, New York: Olms 1979.)

⁵⁰ Kp. HAUPENTHAL 1976.

⁵¹ Kp. SLAJE 1988, 1994.

- COUTURAT, Louis; LEAU, Léopold (1907 a): *Conclusions du rapport sur l'état de la langue internationale*. Coulommiers: Brodard 1907. 31 p.; [2. eld.] 1910. 31 p.
- COUTURAT, Louis; LEAU, Léopold (1907 b): *Délégation pour l'Adoption d'une Langue Internationale. Rapport au comité sur l'état présent de la question de la langue internationale*. [Paris] 1907. 120 p. 4° [Multobl. tajposkripto.]
- DASSEN, Claro C.: Vida y obra de Louis Couturat. En: *Anales de la Academia Nacional*. Buenos Aires 4. 1939, p. 73-204.
- GACOND, Claude (1994): Yelabuk pedipedelas fa Plofed Kerckhoffs, Dikel kadema. Yelüp telid: 1888-1889. En: *Premier Colloque d'Interlinguistique: CDELI –La Chaux-de-Fonds. Contributions*. Bellinzona: Dubois 1994. 112 p., p. 45-65.
- GACOND, Claude (2003): *Le Centre de Documentation et d'étude sur la langue internationale de la Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds 1954-2003: bientôt un demi-siècle d'activité. Rapport historique*. La Chaux-de-Fonds 2003. 36 p.
- GACOND, Claude (2004): Naissance de CDELI. En: *Esperante kaj ekumene*. Fest-libro por la 75a naskig-tago de Adolf Burkhardt. 1929 40 aprilo 2004. Ed. Irmí kaj Reinhard Haupenthal. (Schliengen): Edition Iltis 2004. 368 p., p. 119-128.
- GOLDEN, Bernard (1980 a): Letero de D-ro Zamenhof al Henry Phillips, filo. En: *La Brita Esperantisto* 75. 1982: 837, p. 387-388.
- GOLDEN, Bernard (1980 b): Henry Phillips, jr. (1838-1895). La unua esperantisto en Ameriko. En: *Israela Esperantisto* 1980: 71, p. 4-6.
- GOLDEN, Bernard (1980 c): La korespondado Zamenhof-Phillips. En: *Israela Esperantisto* 1980: 73, p. 1-3.
- GOLDEN, Bernard (1982): La propono de la Amerika Filozofia Societo al la Hungara Scienca Akademio en 1888. En: *Hungara Vivo* 22. 1982: 3 (103), p. 90.
- GOLDEN, Bernard (1985): La cirkulero de la Amerika Filozofia Societo en 1888. En: *Bulgara Esperantisto* 54. 1985: 3, p. 6-7.
- HANSEL, Karl; WOLLENBERG, Fritz: *Aus dem Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zur Einführung einer Weltsprache*. (Großbothen: Wilhelm Ostwald-Gesellschaft 1999.) 149 p. (Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e. V. Sonderheft 6.)
- HAUPENTHAL, Reinhard (1966): La plej interesa projekto . Intervjuo pri Volapük. En: *Germana Esperanto-Revuo* 19. 1966: 6, p. 63.
- HAUPENTHAL, Reinhard (1967): Reiri al la fontoj. En: *Heroldo de Esperanto* 43. 1967: 11 (1438), p. 1.
- HAUPENTHAL, Reinhard (Hg.) (1976): *Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik*. Darmstadt: Wissenschaftl. Buchges. 1976. VI, 365 p. (Wege der Forschung. Bd. 325.)

- HAUPENTHAL, Reinhard (1982): *Volapük-Bibliographie*. Hildesheim, Zürich, New York: Olms 1982. VI, 124 p.
- HAUPENTHAL, Reinhard (2002): *Prof. Dr. Siegfried Lederer (1861-1911) und die Volapük-Zeitschrift „Rund um die Welt“ (1888/89-1891/92)*. (Schliengen): Edition Iltis 2002. 15 p.
- HAUPENTHAL, Reinhard (2005 a): *Johann Martin Schleyer (1831-1912). Pfarrer von Litzelstetten (1875-1885)*. (3., korrigierte Aufl.) (Schliengen): Edition Iltis 2005. 40 p.
- HAUPENTHAL, Reinhard (2005 b): *Über die Startbedingungen zweier Plansprachen. Schleyers Volapük (1879/80 und Zamenhofs Esperanto (1887))*. (Schliengen): Edition Iltis 2005. 48 p.
- HAUPENTHAL, Reinhard (2006): *Prälat Johann Martin Schleyer (1831-1912). Ein Lebensbild anlässlich seines 175. Geburtstages und seiner Priesterweihe vor 150 Jahren mit besonderer Berücksichtigung seiner Meßkircher Zeit (1862-1867)*. En: *Meßkircher Heimathefte*. 2006: 14, p. 21-50.
- HAUPENTHAL, Reinhard (2007 a): *Prälat Johann Martin Schleyer (1831-1912). Ein Lebensbild anlässlich seines 175. Geburtstages und seiner Priesterweihe vor 150 Jahren mit besonderer Berücksichtigung seiner Meßkircher Zeit (1862-1867)*. Vortrag gehalten in Meßkirch am 11. Oktober 2006. (Saarbrücken): Edition Iltis 2007. 39 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 6.)
- HAUPENTHAL, Reinhard (2007 b): *Johann Martin Schleyer. Vivo - Verkoj - Volapük. Prelegoj prezentitaj en la Kultura Seminario de Centre de Documentation et d'Études sur la Langue Internationale (CDELI), La Chaux-de-Fonds, 2007-09-01*. (Saarbrücken): Edition Iltis 2007. 60 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 2.)
- HAUPENTHAL, Reinhard (2007c): *Die Plansprache Volapük in Archiven und Bibliotheken. La plan-lingvo Volapük en arkivoj kaj bibliotekoj*. Saarbrücken: Edition Iltis 2007. 53 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 4.)
- HAUPENTHAL, Irmi /HAUPENTHAL, Reinhard (2008, Red.): *Prälat Schleyer-Jahrbuch. Studien zu Leben, Wirken und Werk von Johann Martin Schleyer (1831-1912). Band 1*. Herausgegeben vom Prälat-Schleyer-Komitee. Saarbrücken: Edition Iltis., 237 p.
- JONG, Arie de: *Leerboek der wereldtaal*. Voorburg: Repko 1932. 54 p.
- KAUSCH, Oskar: *Die Literatur der Weltsprache. (Literat volapüka.)* Dresden: Kausch 1900. 105 p.
- KERCKHOFFS, Auguste: *Yelabuk pedipedelas. Yelüp 1-2*. Paris: Le Volapük (2: Le Soudier) 1887-1889. 1. 1887. 46 p.; 2. 1888/89. 1889. 176 p.
- KNIELE, Rupert: *Johann Martin Schleyer, der Erfinder der Weltsprache Volapük. Ein Lebensabriß*. Neu hg. u. mit einer Personennotiz zu Kniele vers. v. Reinhard Haupenthal. (Saarbrücken): Edition Iltis 2007. 47 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 3.)

- KÜNZLI, Andy (1998): La mondlingvo Volapük en Svislando. En: *Menade bal püki bal*, p. 411-420.
- KÜNZLI, Andreas (2006): *Universalaj lingvoj en Svislando. Svisa enciklopedio planlingva. Schweizer Plansprachen-Lexikon. Encyclopédie suisse des langues planifiées. Enciclopedia svizzera delle lingue pianificate.* (Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua). La Chaux-de-Fonds: (SES et CDELI) 2006. 1129 p.
- L'œuvre de Louis Couturat. (1868-1914) ... de Leibniz à Russell.* Paris: Presses de l'École Normale Supérieure 1983. 130 p.
- LOTT, Heinrich: [Letero al Karl Janotta, Biografio de Julius Lott.] En: *Cosmoglotta* 9. 1936: 1 (68), p. 18-20.
- Louis Couturat 1868-1914.* Coulommiers: Brodard [1915]. 69 p.
- LUCIANO, Erika; ROERO, Clara Silvia (ed.): *Carteggio (1896-1914). Giuseppe Peano – Louis Couturat.* Firenze: Olschki 2005. LXIX, 254 p. (Archivio della corrispondenza degli scienziati italiani. 16.)
- MAYER, Herbert (1991): *La naskigo de Ido au tragedio en la planlingva movado. Prezento de leteroj de Louis Couturat al Hugo Schuchardt (1901-1914).* Vieno: Pro Esperanto 1991. 15 p.
- MAYER, Herbert (2001): Das Kind des Esperanto. Briefe Louis Couturats an Hugo Schuchardt (1901-1914). En: Helmut Lang (ed.): *Mirabilia artium librorum recreant te tuosque ebriant.* Wien: Phoibos 2001. 378 p., p. 207-214. (Biblos-Schriften. 177.)
- Menade bal püki bal.* Festlibro por la 50a naskig-tago de Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Edition Iltis 1998. 487 p.
- SCHAEFFER, Karl Heinz: *La Germana Esperanto-Biblioteko – 15 jarojn en la nova hejmo Aalen – Historio, aktuala stato, perspektivoj.* Aalen: Germana Esperanto-Biblioteko 2003. 28 p.
- SCHMID, Anne-Françoise (1983): La correspondance inédite entre Bertrand Russel et Louis Couturat. En: *Dialectica*. Biel 37. 1983: 2, p. 75-109.
- SCHMID, Anne-Françoise (ed.) (2001): *Correspondance sur la philosophie, la logique et la politique avec Louis Couturat (1897-1913).* Edition et commentaire par Anne-Françoise Schmid. Transcription et notes sur la langue internationale par Tazio Carlevaro. Paris: Editions Kimé (2001). 734 p.
- SCHMIDT, Johann (1933): *Lehrbuch der Weltsprache Volapük.* Frankfurt a. M.: Brönnner 1933. 36 p.
- SCHMIDT, Johann (1998): *Geschichte der Universalsprache Volapük.* Vorwort und Literaturverzeichnis von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Typoskripts Weißkirchen a. Ts. 1963. 2. Aufl.) Saarbrücken: Edition Iltis 1998. 52 p.
- SCHMIDT, Johann (2005): *Liste der Volapük-Verbände und Vereine.* Nach Originallisten

und nach handschriftlichen Nachlässen von Johann Martin Schleyer (1831-1912) zusammengestellt. Mit einer Einleitung von Reinhard Haupenthal. 2. Aufl. (Saarbrücken): Edition Iltis 2005. 20 p.

SCHMIDT, Johann (2008): *Volapük-Bibliographie. Literatur-Liste des Volapük. Erste vollständige Zeitschriften-Liste des Volapük und Literatur-Liste des Volapük*. Neu hg. u. mit einem Nachwort vers. von Reinhard Haupenthal. (2. Nachdr. d. Original-Typoskripte Weißkirchen a. Ts. 1962, 1965.) (Saarbrücken): Edition Iltis 2008. 55, 9, 6 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 5.)

SIKOSSEK, Marcus: Books and their association: The History of the Hector Hodler Library. En: *Language Problems and Language Planning* 28. 2004: 1, p. 45-73.

SLAJE, Walter (1988): Plansprachliche Materialien im Nachlaß Hugo Schuchardt. En: *Anzeiger. Österreichische Akademie der Wissenschaften. Phil.-hist. Klasse. Wien* 124. 1988, p. 250-263.

SLAJE, Walter (1994): Planlingvaj materialoj en la postlasajo de Hugo Schuchardt. En: *Aktoj. Internacia Scienca Simpozio „Esperanto 100-jara“*. Wien: Pro Esperanto; Maribor: Interkultur 1994. 249 p., p. 90-94.

SOUSA, Abelardo: *O sábia e o idioma*. Florianópolis: IOESC 2002. 359 p.

STOJAN, Petr Evsta evic: *Bibliografio de Internacia Lingvo*. Kun bibliografia aldono de Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Genf 1929.) Hildesheim, New York: Olms 1973. 560 p.

SZIMKAT, Annakris: Dokumentoj cirkau la morto de unu biblioteko. En: *Esperante kaj ekumene*. Fest-libro por la 75a naskig-tago de Adolf Burkhardt. 1929 – 40 aprilo – 2004. Ed. Irmi kaj Reinhard Haupenthal. (Schliengen): Edition Iltis 2004. 368 p., p. 201-210.

TAKÁCS, Jozefo: *Katalogo de la Esperanto-gazetaro*. Rev. kaj kompl. Paul Tarnow. Jablonné n. orl.: Prazák 1934. 168 p.

WINGEN, Hans: Publika Esperanto-libraro en Kolonjo. En: *Esperanto Post* 6. 1953: 12, p. 138; *Germana Esperanto-Revuo* 7. 1954: 1, p. 4.

ZAMENHOF, L. L.: *Leteroj de L.-L- Zamenhof. La tragedio de lia vivo rivelita de lia juse retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj*. Prez. k. kom. de G. Waringhien. Paris: SAT 1948. 1. 1901-1906. XVII, 367 p.; 2. 1907-1914. XI, 372 p.

Mallongigoj

BEA	British Esperanto-Association
BSB	Bayerische Staatsbibliothek
CDELI	Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue Internationale, La Chaux-de-Fonds
GEA	Germana Esperanto-Asocio
IALA	International Auxiliary Language Association
IEMW	Internationales Esperanto-Museum Wien
ÖNB	Österreichische Nationalbibliothek
UEA	Universala Esperanto-Asocio

Esperanto-bibliotekoj en Cehio kaj disponigo de libroj per elektronikigo

Enhavo

- 1 La grandaj bibliotekoj en Cehio
- 2 Kolektoj en publikaj bibliotekoj
- 3 Privataj kolektoj
- 4 Libroj en la reto
- 5 Elektronika arkivo?

1 La grandaj bibliotekoj en Cehio

La *plej granda* ceha Esperanto-biblioteko troviĝas en la urba muzeo de Česká Třebová¹, profesie prilaborita, sed ne alirebla de la publiko. Ĝi disponeblas nur por fakuloj. Tiu biblioteko origine apartenis al la Praga Esperanto-Klubo kaj portis la nomon de ĝia honora prezidanto *Jaroslav Šiřtr*², kiu plej multe meritis pri ĝia grandeco (ĉirkaŭ 5 mil libroj).

Post la falo de la komunista regimo la domo, kie ĝi troviĝis, estis redonita al la posteuloj de la iamaj posedantoj, kaj tiuj elpelis la klubon kun ĝia biblioteko. Kiam ne estis trovebla tanga loko en Prago, la direktoro de la urba muzeo en Česká Třebová, *Jirí Pi řora*, esperantisto, proponis loki la **Bibliotekon Jaroslav Šiřtr** en la urba muzeo de Česká Třebová. Estis subskribita kontrakto, ke la libroj ciam apartenos al Ceha Esperanto-Asocio, poste oni ilin profesie enkatalogigis. La muzeo samtempe komencis kolekti diversajn arkivaĵojn de unuopaj kluboj, korespondaĵojn, manuskriptojn k.s.

Komence de la nova jarmilo Jirí Pi řora farigis pensiulo kaj en la muzeon venis nova juna direktorino. Tiu atentigis, ke la kontrakto inter la muzeo kaj nia asocio estis subskribita kontraŭlege kaj pro tio nevalida, ĉar laŭ muzea lego ĉiuj eksponaĵoj, kiuj estis registritaj en la muzea katalogo, farigas automate posedaĵo de la stato, administrata de la kulturministerio. Do neniuj rajtas redoni la libro-kolekton. Aliflanke neniuj povas eljeti la librojn el la muzeo, ĉe se aperus iu malamiko de Esperanto en la funkcio de la direktoro.

Alia afero estas la arkivaĵoj, pri kiuj validas alia lego kaj kiujn la direktorino ne deziras. Sed ĉar nia asocio ne posedas proprajn ejojn, la komitato petis, ke la arkivaĵoj provizore restu tie ĝis kiam ĝi trovos taŭgan spacon. Aferis espero, ke iu nove konstruata muzeo ilin akceptos, sed ni devas atendi, kiel la afero evoluos.³

Dua plej granda Esperanto-biblioteko en Cehio estas tiu de la **Esperantista klubo en Brno**⁴, kiu nun troviĝas en mia loĝejo. Por mi tiu situacio estas avantaĝa, ĉar mi havas je dispono grandan librokolekton (ĉirkaŭ 3 mil titolojn), kaj samtempe mi povas malrapide prilabori la librokolekton. Antaŭe ĝi estis en diversaj kulturdomoj, sencese forpusata de unu cambro al alia, dum kio la libroj ciam denove kaj denove miksigis, sekve ne eblis ilin prilabori. Nun mi havas liston en mia komputilo kaj klopodas prilabori la librojn iom pli profesie ol antaŭe. Nia biblioteko estas destinita nur por niaj klubanoj, kvankam ili malmulte utiligas ĝin. Ĉijare mi ricevis heredaĵojn de kelkaj mortintaj esperantistoj. Plie ĉe mi troviĝas ankaŭ pluraj manuskriptoj, kiujn mi klopodas

¹ Vidu <http://www.esperanto-praha.net/knihovna/trebova.htm>

² http://eo.wikipedia.org/wiki/Jaroslav_Šiřtr

³ Intertempe realigis la espero: En la ceha urbo Svitavy, en oktobro 2008, estis inaugurita la Ceha Esperanto-Muzeo-Red.

⁴ <http://members.chello.cz/malovec/Bib-Brno>

enkomputiligi, por ke ili estu duonpreparitaj por eventuala eldono au publikigo en la interreto. Mia celo estas prilabori la bibliotekon tiamaniere, ke post mia morto gi povu facile transiri al alia loko interne de nia asocio au al iu profesia biblioteko kiel interlingvistika kompleto.

Tria biblioteko estas la **libro-kolekto de la iama scienc-teknika sekcio**⁵. Gi farigis asocia biblioteko kaj nun trovigas en la privata domo de *familio Vy šnka* en Vracov (suda Moravio), kiuj ankau promesis prilabori la bibliotekon kun helpo de loka bibliotekistino. Ili ankau zorgas pri la asocia libroservo. En la kolekto origine trovigis nur fakaj libroj, sed poste estis aldonitaj ankau beletraĵoj.

La *kvara* kolekto, pri kiu mi scias, estas la **biblioteko en Prerov**, kiun nova bibliotekistino, pensiulino, nun prilaboras. Si lernis Esperanton en junago kaj nun revenis al la movado. Temas pri kelkcent libroj.

2 Kolektoj en publikaj bibliotekoj

Esperanto-kolektoj ankau trovigas ce grandaj publikaj bibliotekoj, kvankam tie oni havas kutime nur lernolibrojn kaj vortarojn, beletron nur escepte. La samo validas por **lernejaj bibliotekoj ce universitatoj**. Iliaj katalogoj estas disponeblaj en la reto, sekve mi tie provis serci sub la vorto Esperanto. Kutime mi trovis inter dek kaj dudek titolojn, nur en la **sciencia biblioteko en Brno** preskau 170 librojn. En la **urba biblioteko Mahen en Brno** oni havas unu breton da Esperanto-libroj en la fremdlingva fako. Sed mi ankau konstatis, ke multaj libroj estas kasitaj, ke la bibliotekistoj ne indikis, ke temas pri Esperanto, tial la automata sencilo ilin malfacile trovas. Logike almenaŭ tiuj grandaj bibliotekoj, kiuj ricevas la t.n. devigan ekzempleron, devus posedi ciujn librojn eldonitajn en Cehio post la dua mondmilito.

Okazis, ke iu distrikta biblioteko petis de mi sendi Starton⁶. Mi ankau sendis al ili plurajn librojn donace, sed gis nun ili ne aperis en la katalogo. La bibliotekistoj estas nur homoj kaj se iu donas al ili plian laboron sen alpago, estas por ili pli facile eljeti la donacon ol gin prilabori kaj meti en katalogon. Ofte ili forigas librojn, kiujn longe neniu elpruntis, precipe kiam nova bibliotekisto konsideras Esperanton stultajo. Tial donaci librojn al la publikaj bibliotekoj estas tre riska afero.

3 Privataj kolektoj

Unuopaj esperantistoj posedas librokolektojn, kiujn ili kutime neniel prilaboras, nur havas sur bretaro. Post ilia morto la heredantoj iam proponas la librojn al loka Esperanto-klubo, foje ilin vendas en libro-brokantejo, foje eljetas. Unu el la plej grandaj cehaj esperantistoj, *Theodor Kilian*, heredigis sian domon al la loka klubo, kiu pietate konservas en la domo lian laborcambron. Tie trovigas librosranko plena de libroj, sed lau mia scio neniu ec faris ilian liston. Okazas ankau, ke neniu esperantisto volas zorgi pri klubaj biblioteko kaj tial la klubo donacas siajn librojn al alia klubo, kies biblioteko ankoraŭ vivas.

La konservo de nia kultura heredaĵo estas granda problemo en Cehio, car gi trovigas en privataj manoj. Profesiaj bibliotekoj ne montras grandan emon akcepti esperantaĵojn, car la bibliotekistoj ofte rigardas Esperanton malrespekte, iam ec malamike. Eble solvo estus prilabori la bibliotekojn kiel scian lingvistikan kolekton kun interlingvistika kaj esperantologia specialigo, car tia kolekto havus alian kvaliton ol nura miksajo de libroj en Esperanto. Sed estas demando, kiamaniere eblas prilabori tian scian bibliotekon.

⁵ <http://www.esperanto-praha.net/biblioteko.htm>

⁶ Starto estas la oficiala organo de Ceha Esperanto-Asocio. Gin redaktas *Miroslav Malovec*-Red.

Tute alia afero estas, kiel disponigi la Esperanto-literaturon al la esperantista publiko, precipe al novaj kaj junaj esperantistoj, kiuj kutime facile trovas lernolibrojn kaj vortarojn, sed pri la cetera literaturo ili nur legas, ke ĝi ekzistas, sed ne scias, kiel ĝin akiri. Esperanto-bibliotekoj ne trovigas en ĉiu vilaĝo kaj lernejo kiel la nacilingvaj bibliotekoj, ja eĉ en grandaj urboj ili raras. La libroservo de UEA por novuloj estas multekosta, klubaj bibliotekoj ne volonte pruntas librojn al nekonatoj, plie raraj malnovaj ekzempleroj povus facile foruzigi. Malnovaj libroj ofte ne estas belaj, ilia papero flavigis, literoj estas malmodernaj.

4 Libro en la reto

La nuntempa junularo ĉiam pli preferas elektronikajn dokumentojn antaŭ la paperaj, precipe se ili estas disponeblaj en la reto. Tie eĉ malnovaj libroj rejunigas, miloj da homoj ilin povas legi sen damage tusi la paperan originalon. Multaj esperantistoj jam almenaŭ dek jarojn ciferecigas Esperanto-literaturon, sekve nia movado havas avantaĝon antaŭ la projekto de Europa Unio pri ciferecaj bibliotekoj.

En 2005 Europa Komisiono publikigis alvokon⁷, ke estu elektronikigata la kultura heredaĵo de Europo en ĉiuj lingvoj, ne nur libroj, sed ankaŭ bildoj, fotoj, filmoj, muziko kaj parolo, kaj estu konservataj tiuj novaj, kiuj jam en elektronika formo kreigis. Oni celas milionojn da libroj libere atingeblaj en la reto, precipe tiujn, kiujn apenaŭ iu eldonisto reeldonus libroforme, kiuj tamen povus interesi multajn homojn. Relative baldaŭ retaj publikaj bibliotekoj estos atingeblaj en ĉiu hejmo same kiel televidaj programoj kaj iliaj ofertoj nun ĉiam pli ricigos en la sekvaj jardekoj kaj jarcentoj. Interreto influos publikigadon de literaturo en la estonteco de la homaro same kiel la invento de presado influis la pasinteco dum la lasta duonjarmilo. Por nia movado tre gravas, ke la esperantlingvaj tekstoj ne manku en la projekto, tamen ne kiel nura kuriozaĵo, sed ke ili ludu rolon kompareblan kun alilingvaj tekstokolektoj.

La **usona projekto Gutenberg**⁸ fieras per 20 mil titoloj, la **franca projekto Gallica**⁹ per ĉirkaŭ 1800 titoloj. *Don Harlow*¹⁰ en sia retejo **Literaturo en la reto**¹¹ registris ĉirkaŭ 7 mil titolojn en Esperanto. Sed estas problemoj, ke tiuj verkoj ne trovigas en unu loko kaj sub la sama formo kiel ĉe Gutenberg kaj Gallica. Ili estas dissemataj tra la tuta mondo, apartenas al privataj unuopuloj, havas malsaman nivelon de prilaboro, kelkaj estas kompletaj libroj, aliaj nur unuopaj poemetoj. Ankaŭ la retejo de Don Harlow mem estas privata, ne povas do oficiale reprezenti la Esperanto-movadon inter la alilingvaj projektoj kaj ĉefe ne povas certigi la konservadon de la tekstoj kaj aliaj elektronikaj materialoj, kiuj nun povas facile malaperi, se io okazos al ilia privata posedanto. (Kelkaj ligoj en la listo jam ne plu funkcias).

Aperis ankaŭ pluraj iniciatoj, kiuj havas duonoficialan karakteron. Ekzemple **eLibrejo**¹² de la karmemora *Franko Luin*, fakaj verkoj en **STEB**¹³ de *László Szilvási*, verkaroj de *Ivo Lapenna* kaj *Kolomano Kalocsay* en retejoj dediĉitaj al ilia memoro, inkunabloj¹⁴ kaj fotoj¹⁵ de la **Viena Esperanto-muzeo**, pluraj kompaktaĵoj kun muziko, lernolibroj kaj tekstoj, inter ili ankaŭ skanitaj gazetoj de esperantistoj¹⁶ kaj la germanaj eldonoj de *Paŝo*¹⁷. Sed ankaŭ ĉi tiuj projektoj laboras izole, okupigas nur pri malgranda parto de nia kultura rikaĵo.

⁷ <http://europa.eu.int/eur-lex/lex/LexUriServ/LexUriServ.do?uri=COM:2005:0465:FIN:EN:HTML>

⁸ http://www.gutenberg.org/wiki/Main_Page

⁹ <http://gallica.bnf.fr/textesListe.htm>

¹⁰ Don Harlow intertempe forpasis (1942-2008), vidu *Esperanto* 4/2008, p. 94-Red.

¹¹ <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>

¹² <http://esperantujo.org/eLibrejo/>

¹³ <http://eventoj.freeweb.hu/steb/>

¹⁴ http://www.onb.ac.at/plansprachen_100fruehdrucke.htm

¹⁵ <http://www.bildarchivaustria.at/Searcharchiv.aspx>

¹⁶ de esperantistoj (1965-1990) estis la organo de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA)-Red.

5 Elektronika arkivo?

Tamen la menciitaj faktoj pruvas, ke multa laboro jam estas farita, sekve nia literaturo povus aperi inter la plej gravaj, se ekzistus komuna tegmenta kaj pilota projekto, oficiala movada elektronika arkivo, al kiu ĉiu esperantisto povus sendi siajn elektronikajn laboraĵojn kun indiko pri ilia uzeblo.

Unue necesas distingi inter **arkivado** (konservado) kaj **enretigo** (publikigo) de elektronikaj materialoj. Ne ĉio estas tuj publikigebla, ĉar ankoraŭ ne disvendigis la papera versio aŭ la posedanto de la aŭtoraj rajtoj planas foje denove reeldoni la paperan version aŭ decidas, ke la verko estos libera post certa dato. Tamen li aŭ ŝi deziras konservi la elektronikan version, se ĝi jam ekzistas, ĉar estus stultajo forvizi la dosieron kaj post kelkaj jaroj ĉion denove enkomputiligadi. Plie, la paperaj bibliotekoj kaj arkivoj, estante en privataj manoj, ofte malaperas el la mondo, do la tekstoj estu savitaj almenaŭ en elektronika formo, kvazaŭ per mikrofisoj.

La kompaktaj diskoj (CD-ROM kaj DVD) ne estas fidindaj, ofte ili ĉesas esti legeblaj post certa tempo. Pro tio necesas arkivi ĉion per grandaj malmolaj diskoj (almenaŭ 120 gigabajtoj), kies prezo nun estas relative malalta. Ekzistu almenaŭ du aŭ tri diversloke, por savi la enhavon, se unu el ili kolapsos.

La tekstoj estu savataj en du formoj: unue kiel skanitaj bildoj (fotoj), due kiel tajpajo, kiun oni enkomputiligis per klavado aŭ decifris la skanitan tekston per iu OCR-programo kaj poste per klavado korektis erarajn decifrojn. La dua maniero estas pli klopoda kaj temporaba, sed sparas lokon en la reto, ebligas pluan prilaboron de la teksto aŭ ĝian novan paperan reeldonon. La unua maniero taugas ĉe gazetoj, kie oni volas konservi ankaŭ la grafikan arangon, aŭ ĉe malpli gravaj tekstoj, kiujn sufiĉas konservi kvazaŭ elektronikajn mikrofisojn, ekz. leterojn, raportojn pri kunvenoj aŭ aliajn dokumentojn, kiuj future estos grava fonto por la historio de la movado.

¹⁷ Ĥaco ĉstis la organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)-Red.

Propono pri starigo de interreta superkatalogo kaj cifereca arhivo de Esperanto-literaturo

Enhavo

- 1 Enkonduko
- 2 Superkatalogo
- 3 Cifereca biblioteko

1 Enkonduko

La propono, kiun mi hodiaŭ prezentas al vi, estas multe influita de la pensoj de *Miroslav Malovec* (2008)¹, kun kiu mi tenas aktivajn kunlaborajn kontaktojn jam ekde la jaro 2005. Li prizorgas la Bibliotekon de la Esperanto-klubo en Brno, mem skanis kaj enkomputiligis plurajn verkojn de la Esperanto-literaturo kaj havas generale multajn sciojn kaj spertojn pri la Esperanto-movado. Al mi tiaj spertoj ankoraŭ mankas, sed aliflanke mi kadre de mia studo estas en kontakto kun la plej novaj teknologioj kaj ofte estas guste ili, kiuj alportas novajn, revoluciajn perspektivojn por la aktivado de la esperantistoj. Analogie do, en mia kontribuo mi prezentas proponon pri konkreta realigeblo de kelkaj el la ideoj de Malovec, sub influo de pluraj aliaj homoj kaj kun iuj aldonoj miaj.

2 Superkatalogo

Jam tre frue la esperantistoj revis pri generala bibliografio de ciuj libroj kun rilato al Esperanto. Ekzemple la Esperantista Centra Oficejo (1905-22) de generalo Sebert provis komence informi pri la novaj libroj en Esperanto, sed iam ĝi rezignis pro la granda kresko de la nombro. Alia provo, Bibliografio de Internacia Lingvo de Petro Stojan (1929), aperis en la tempo, kiam Stojan estis bibliotekisto de UEA (financite de Alice Morris). Kompreneble, tiaj paperaj bibliografioj havas plurajn malavantaĝojn, precipe: ili rapide malaktualigas kaj oni devas provizi sistemojn por trovi libron laŭ diversaj kriterioj. Ekzemple oni devas aldoni indeksojn, kio estas multe da laboro kaj papero. Tial bibliotekistoj (kaj ne nur tiuj esperantistaj) estis inter la unuaj, kiuj profitis la alvenon de komputiloj kaj komencis helpe de ili konstrui elektronikajn librokatalogojn.

Kun la ideo de interreta superkatalogo de la Esperanta literaturo mi mem unue konatigis en junio de 2006, per retmesago de *Ziko van Dijk*. La eksa bibliotekisto de Biblioteko Hector Hodler kaj arhivisto de UEA tiam eksperimentis kun ideo de superkatalogo aŭ generala bibliografio kun ciuj libroj en aŭ pri Esperanto, kiu estus nedependa de konkreta Esperanto-biblioteko. Kun helpo de *Brion Vibber* el Usono sub nomo Bretaro van Dijk starigis novan projekton de tia superkatalogo, kiu funkcii per metodo de vikio, t.e. kunredaktebla retejo, kies enhavon ciuj rajtas ampleksigi, sangi aŭ korekti koncepto versajne plej famiginta en la libera interreta enciklopedio Vikipedio.

La koncepto de vikio taugas guste por aplikoj kiel kunredaktata enciklopedio, sed ĝi apenau uzeblas por apliko tiom strukturata, kia estas katalogo de libroj. Se per aldona programado oni ekzemple ekestus venkinta la problemon, ke vikio supozas kiel enhavon fluon de teksto, kaj ne rigide strukturitajn datumojn, tamen plu regus grandaj problemoj. Al ili ekz. apartenas redundanco de datumoj, prezentataj en diversaj pagoj (kaj la neceso prezervi konsistencon inter ili), krome temos pri malfacila eblo de efika serĉado, amasa prilaborado ktp. Eble ankau pro tio la iniciato de van Dijk ekde tiu tempo neniom progresis. Tamen, unu trajto de vikia aliro estas sekvenda: la malfermiteco de la sistemo, kiu ebligas al ĉiu volontulo partopreni en la projekto.

Guste diversaj unuopaj esperantistoj sentas la plej grandan bezonon pri katalogigo de siaj librokolektoj. Bibliotekoj de Esperanto-klubo, kiuj foje anklaŭ kasas valorajn kaj rarajn atestajojn

¹ Vidu la kontribuon de Malovec en ĉi-tiu volumo-Red.

pri la loka Esperanto-movado, plej ofte trovigas en privataj manoj de iu unuopa membro de la klubo, kiu pli au malpli vigle strebas fizike prizorgi tiun kolekton, alirebligi al interesigantoj kaj eventuale ankaŭ katalogigi. Jam de pluraj posedantoj de klubaj au asociaj Esperanto-bibliotekoj mi audis bedaŭrojn au ricevis petojn pri helpo, kaŭzitajn de nescipovo taugmaniere kaj moderne katalogigi sian kolekton kaj tiuforme prezenti ties enhavon al la publiko. Kelkaj, kiuj scipovas ĝis pli alta grado labori per komputilo, trovis provizorajn solvojn en entajpado de informoj pri siaj libroj en programoj kiel ekzemple Word au Excel, sed tiaj katalogoj ne havas unuecan formon, same kiel vikio ne donas bonajn eblojn de automata prilaboro (masina generado de indeksoj ktp.) kaj ĝenerale ne ekspluatas ĉiujn eblojn, kiujn hodiaŭ proponas la komputiloj kaj interreto.

La penso pri amatoraj bibliotekistoj sopirantaj je profesieca solvo de siaj katalogigaj problemoj kaj la koncepto de superkatalogo de laŭeble ĉiuj aperintaj publikajoj kunigis en mia kapo. El tiu kunigo rezultis ideo pri projekto de malfermita interreta katalogo de Esperantaj eldonaĵoj, al kiu ĉiu interesiganto povus aligi. Pere de ĝi per profesiaj iloj kaj unueca interfaco li/si povus mastrumi la enhavon de sia privata, kluba au asocia Esperanto-biblioteko. Samtempe per tiu agado eblus kaj profiti kaj profitigi la suman enhavon de la katalogo. Imagebla analogio estas urba biblioteko en granda urbo, kiu havas plurajn filiojn en diversaj urbokvartaloj: Ĉiu filio posedas alian kolekton de libroj, sed pluraj libroj aperas en kelkaj filioj. Centra katalogo enhavas informojn pri ĉiuj libroj disponeblaj en la biblioteko, ĉiam kun indiko pri tio, en kiuj filioj la koncerna libro estas disponebla. Nova libro registrigas en la katalogo kiam la unua filio de la biblioteko ekposedas ĝin, kaj aliaj filioj ekposedantaj ĝin poste nur aliĝas al la jam ekzistanta registro. Se leganto petas iun libron, la sistemo tuj sciigas lin, en kiuj filioj la libro estas disponebla.

Lau informoj, prezentitaj de van Dijk kadre de lia Bretaro, projekton de komputila superkatalogo de Esperanto-literaturo jam antaŭ 16 jaroj klopodis realigi laborrondo ĉirkaŭ *Martin Weichert* (1991). Tiam diversaj reprezentantoj de Esperanto-bibliotekoj montris sian interesigon, sed la projekto fine fiaskis pro nevenkeblaj problemoj. Tiuj estis kaŭzitaj ne nur pro la malfacileco akiradi datenojn por la superkatalogo de grandaj bibliotekoj au tiuj, kiuj ofte dependas de aliaj institucioj. La problemoj grandparte ankaŭ estis teknikaj. Plej baza problemo de la superkatalogo tiam onidire estis, trovi taugan programon: malmultekostan, facile uzeblan, estonto-havan. Diversaj bibliotekoj siatempe uzis programojn, kies produktintoj dume malaperis, kaj tial la programojn neniu pli modernigadis kaj signifa parto de la investo en tian katalogigon saĝnis perdita.

Dum la pasintaj 16 jaroj la evoluo tamen rapide progresis kaj multaj aferoj sangigis. Komputilaj programoj ne plu estas rara varo, komputado estas multe pli alirebla por homoj kaj multaj specoj de programoj farigis kutimaj, kiuj antaŭe estis domajno de specialistoj kaj por kiuj oni devis multe pagi. Aperis pluraj tre bonaj alternativoj, kiuj estas tre altkvalitaj kaj tamen senpagaj, kun publike rigardebla, modifebla kaj reuzebla fontokodo, evoluataj de amaso de kapablaj volontuloj. Tiu kresko kaj alveno de la tiel nomata libera programaro estas forte konektita kun apero de la Ĝenerala Publika Permesilo (General Public License) kaj la ekesto de Linukso (Linux), komputila mastruma sistemo iniciatita de Linus Torvalds en 1992. Por nure aludi analogion: Oni foje diras, ke Esperanto estas la Linukso de lingvoj kaj Linukso estas la Esperanto de la komputila mondo.

Ankaŭ la evoluo de taugaj formatoj por informokonservado kaj normoj rilataj al tio spertis rapidan progreson. Pro bezono de retrokongruenco oni tamen ofte reuzas malnovajn formatojn kaj nur pakas ĝin en mantelon de novaj teknologioj. La plej ofta nun uzata formato por bibliografiaj datumoj estas MARC, jam en la 1960-aj jaroj kreita en la usona Biblioteko de Kongreso.

Sed car MARC per si mem estas eble eĉ tro robusta kaj nefakuloj apenaŭ kapablas kun ĝi labori kaj utiligi ĉiujn ĝiajn eblojn, en 1995 oni kreis alian, pli simplan normon, kiu nuntempe ankaŭ tre furoras: La formato Dublin Core uzas 15 bazajn kampojn en kiuj oni indikas la informojn pri la kolektero: ekz. aŭtoro, titolo, formato, lingvo au aŭtoraj rajtoj. La baza versio de Dublin Core ne preskribas konkretan formaton por enhavoj de tiuj kampoj, sed oni povas verki enskribojn ankaŭ en kyalifita formato, kiu jam donas konkretajn postulojn pri strukturo de la enmetataj informoj.

Ankorau estas menciinde, ke en sia provo pri Bretaro, van Dijk mem proponis strukturon de libra slipo tre similan al tiu de Dublin Core.

Datumaj formatoj tamen ciam aperadis kaj malaperadis, nur por esti anstatautaj de aliaj. Tian evoluon versajne neniam eblos haltigi, sed por ke konstruado de grandskalaj projektoj kiel superkatalogo de literaturo havu sencon, necesas certigi ke ciam ekzistos vojo, kiel relative facile transiri de malnova formato al nova. Kaj subteno de vaste uzataj, malfermitaj kaj norme agnoskataj formatoj donas tian certecon: Hodiaŭ ekzemple en la interreto eblas trovi plurajn detalajn priskribojn pri tio, kiel transformi datumojn el MARC al Dublin Core.

La situacio pri daurigebla evoluo de komputilaj programoj estas parenca al tiu de la datumaj formatoj. Sian certecon pri eŝonto-haveco de konkreta elektata solvo oni povas signife plialtigi, se oni dekomence serĉas solvon, kiu subtenas la plej vaste rekonatajn datumojn kaj formatojn, kies evoluo ne estas dependa de unu konkreta unuopulo aŭ firmao. La sukceso de multaj hodiaŭ furorantaj programoj kiel la retumilo Mozilla Firefox aŭ la ofica programaro OpenOffice.org, kiuj nun havas milionojn da uzantoj, trovigas guste en apliko de la liberprogramara koncepto: La projekto estas evoluata de internacia komunumo de volontuloj, kutime sub tegmento de iu neprofitcela fondajo, kaj ĉiuj ciam rajtas senpage konsulti aŭ modifi la fontokodojn de la programo. Tio provizas ne nur la avantaĝon de minimumaj financaj elspezoj por la uzanto, sed donas samtempe ankaŭ pli altan garantion pri eŝonto-haveco (ĝisnuna volontulo povas eksigi dum nova homo eniras la teamon kaj la iniciato ne povas cesi pro simpla malestablo de unu firmao). Tio fine ankaŭ ebligas mildigon de eventuala investoperdo. Ekz. se la tuta projekto tamen iam finigus, ciam eblas eĉ mem kiel memstara programisto atingi la tutan fontokodon de la programo kaj fari en ĝi necesajn adaptojn, ekzemple por pretigi la datumojn por transiro al alia nova teknologio.

Repriensinte la hodiaŭajn eblojn kaj perspektivojn pri la superkatalogo, mi decidis profiti la novajn ĵus skizitajn eblojn kaj surbaze de ili proponi lancon de nova iniciato. La ideon mi proponis al la organizajo **E@I**, kiu okupigas guste pri utiligado de modernaj teknologioj por la profito de la Esperanto-komunumo. La propono, kiu unuafoje prezentigis jam novembre de 2006 dum seminario de E@I en Brno kaj tuj sinsekve ankaŭ dum konferenco KAEST en Dobrichovice, estis plu diskutata dum kelkaj sekvintaj okazoj. Dum la 92-a Universala Kongreso de Esperanto 2007 en Jokohamo la projekto estis prezentita ankaŭ al kelkaj estraranoj de la fondajo ESF², kiuj ankaŭ montris sian subtenon al la afero.

3 Cifereca biblioteko

La ideon de virtuala arĥivo de Esperanta literaturo kaj aliaj Esperanto-rilataj dokumentoj en sia prelego jam priskribis *Miroslav Malovec*, tial mi ĉi-tie nur mallonge mencias ĝin.

Starigo de cifereca biblioteko estas antaŭvidebla kiel dua paso de la proponata iniciato, ĉar konsiderante ke plej grandan parton de tia arĥivo konsistigos printitaj publikajoj, estus utile havi por ili jam iun bazon en la superkataloga parto de la projekto. Tiam la cifereca biblioteko povus eĉ saĝni tutsimple nur unu kroma el la bibliotekoj registritaj en la superkatalogo, t.e. kun indikoj pri tio, kiuj libroj el la tuta superkatalogo haveblas en ĝi. Tamen ekzistas tia diferenco, ke por konsulti la libron oni ne devus kontaktigi kun la koncerna loka bibliotekisto, en kies kolekto ĝi trovigas aŭ voĵagi al tiu loko ktp., sed en nia projekto oni simple alklakus ligilon, kiu direktus al alie aparta pagaro de la cifereca biblioteko.

La gravecon de la protekto de la konservado de la literaturo por la venontaj generacioj jam delonge konscias ĉiuj statoj, kreante por tiaj celoj "naciajn bibliotekojn". Lastatempe pri simila bezono, sed je internacia nivelo, ekkonsciis ankaŭ la Europa Komisiono kadre de siaj alvokoj Culture 2000 kaj 2007 aŭ la hodiaŭaj administrantoj de la reta Projekto Gutenberg, kiuj aldone donis al la strebo la revolucion elektronikan formon.

² Esperantic Studies Foundation estas usona fondajo, kiu finance subtenas lingvopolitikajn kaj esperantorilatajn sciencajn projektojn - Red.

Ankau la Esperanto-movado sendube bezonas similan virtualan arhivon, cefe por protekti kaj meti denove en la lumon siajn malnovajn librojn –eu rarajn antikvaĵojn de la originala literaturo, cu malalt-eldonkvantaj amatorajn tradukojn el nacilingvaj literaturoj. Tiel oni povus krei ian nŝcian bibliotekon Esperantan ,“kies celo estus kolektadi ciferecforme ciujn informmaterialojn rilatajn al Esperanto. Lau stato de autoraj rajtoj de ciu unuopa verko gi estus sub certaj kondicoj konsultebla en la interreto, au gi dume restus nepublika, sed kun perspektivo de posta publikigo, kiam la autoraj rajtoj jam ne plu aplikigos al gi. Se la verko antaue ne estus ciferece konservita, gi eble ec tute ne plu estus konsultebla pro malapero au detruigo de la nemultaj paperaj ekzempleroj. Ciuj tekstaj dokumentoj trovigus en la arhivo kaj en sia originala grafika formo (ekzemple por konservi grafikan arangon ce revuoj), kaj en tekstrekonita (do facile masine prilaborebla) formo. Kiel kroma efiko, la tuta enhavo de la cifereca biblioteko ankaŭ povus servi kiel granda tekstaro por uzo de Esperantaj lingvistoj, kaj supozeble ciuj ĝiaj tekstoj (do ankaŭ tiuj el alie ne ankoraŭ libere publikigeblaj verkoj) povus esti plentekste priserceblaj.

La tenado de tia grandega cifereca arhivo certe postulus ankaŭ starigon de unuecaj normoj por formato de dokumentoj kaj bone elpensitan sistemon de stokado de grandega kvanto de datumoj. Ankaŭ la kampo de ciferecaj bibliotekoj tamen bonsance tre rapide evoluas kaj dum tiu ci semestro en mia fakultato mi povas sekvi kurson, en kiu oni prezentas guste ciujn defiojn kaj solvojn tie ekzistantajn. Ciferecaj bibliotekoj en la mondo jam hodiaŭ sufiĉe multas kaj kun ili evoluis ankaŭ rekomendoj kaj normoj pri unuopaj aspektoj de ciuj rilataj laboroj, tiel ke per gusta elekto oni povas spari al si multajn problemojn. Eble ec pli ofte ol ce la katalogoj oni ci tie audas la riprocojn pri nepersistopovo de informoj en ciferecaj formatoj. Pri tiu risko tre bone konsciis ankaŭ la evoluintoj de tiuj menciitaj rekomendoj, pro tio kun la nune uzataj metodoj ili jam strebas kontraŭbatali ankaŭ tiun ci problemon (ekzemple per malemo al ajna kroma datumkriptado, ec se tiu alportus rimedsparon sen ajna informperdo).

Kadre de E@I nuntempe tiu ci ideo pri cifereca biblioteko evoluas, oni esploras la terenon, starigas kontaktojn kaj serĉas kunlaborantojn. Subtenon mi versajne povos ricevi ankaŭ de la universitato, kie unu doktoro instruas studobjekton specife rilatan al tiu ci temo. Ankaŭ la Esperanto-komunumo saĝnas esti plejparte favora al la ideo. Kaj eblas diri, ke ciu paso sur tiu ci tereno efektive signifas unu plian stupon direkte al certigo de senzorga estonteco por la tuta literatura rikaĵo de la Esperanto-mondo.

Bibliografio

BLAHU ŝMarek (2008): Vorschlag zur Schaffung eines Superkatalogs und digitalen Archivs der Esperanto-Literatur im Internet. En: Blanke, Detlev (2008, Red.): *Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2007, in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 15.* Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [157 p.], p. 91-95.

MALOVEC, Miroslav (2008): Esperanto-bibliotekoj en Cehio kaj disponigo de libroj per elektronikigo

STOJAN, Petro (1929): Bibliografio de Internacia Lingvo. Genève: Universala Esperanto-Asocio

WEICHERT, Martin (1991): Esperanto-bibliotekoj, bibliografioj kaj librokatalogoj. Göteborg: Virtuala Esperanto-Biblioteko. Konzultebla enrete ce:
<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/bibl/>

Esperantlingvaj arkivajoj de Pola Radio

Enhavo

- 1 Kio konservigis de la Esperanto-programoj de Pola Radio el la 1-a (1928-1939) kaj el la 2-a elsendoperiodoj (1945-1950)
- 2 Nova kapitro ekde 1959
- 2.1 La arkivado de la Esperanto-programoj de Pola Radio ekde la 4-a de aprilo 1959
- 2.2 La klopodoj savi nesaveblajn
- 2.3 Detruo de la saĝne firme protektitaj
- 2.4 Dauraj klopodoj savi la plej valorajn sondokumentojn
- 3 Tansiro al la cifereca registrado kaj emisiado – tiuperiodaj sukcesoj kaj fiaskoj de la arkivado
- 4 La drameca savperiodo anticipanta la likvidon de la malnovformulaj E-elsendoj (15.12.2006)
- 5 Pri la aktuala arkivejo de Pola Radio
- 5.1 Ciferigitaj arkivajoj
- 5.2 Savitaj, savataj sondokumentoj; la aktualaj sonregistraĵoj
- 5.3 Kelkaj entreprenendaj taskoj.

1 Kio konservigis de la Esperanto-programoj de Pola Radio el la 1-a (1928-1939) kaj el la 2-a elsendoperiodoj (1945-1950)

Kvankam la esperantlingvaj programoj en Pola Radio havas longan historion la unusola spuro pri tiuj de antaŭ la 2-a mondmilito, ilia ekzisto kaj kelkfoje enhavo, havas skriban formon. Nome iliaj tekstoj estis publikigitaj en *Pola Esperantisto* (esplorendas, ĉu temas pri ĉiuj elsendotekstoj). Pri kelkaj Esperanto-programoj de Pola Radio informis la esperantlingva gazetaro. Pri la Esperanto-prelegoj de PR celitaj al eksterlandaj auskultantoj raportis i.a. *Järlibro de Pola Radio 1933 ĝis la 1934-a jaro*. Ĉiuj ĉi fontoj estas tamen malfacile konsulteblaj por la meza publiko. Ne estas nun sciate, kiel sonis tiuj ĉi programoj kaj la voco de iliaj parolistoj, kvankam iun spuron pri tio ni trovas ekzemple en la maja numero de *Nia Gazeto* ĝis la 1935-a jaro sciiginta inter siaj informoj pri diverslandaj E-elsendoj jene:

Varsovio kies anoncisto bonege efikas per sia mirinde bela prononcmannerio de Esperanto informis la 31-an de januaro pri Altsilezio, la lando de la nigraj diamantoj. Prof. Hodakowski parolis pri pola folkloro, cerpanta sian vivon precipe el la religiaj kutimoj, nome Kristnaska kaj ankaŭ el la najbarlanda influo tra la jarcentoj. Pluraj dancoj farigis mondkonataj: mazurkoj, krakoviakoj, polonezoj [...] .”

Konservigis bedaurinde ankaŭ neniuj registroj pri la unuaj postmilitaj Esperanto-programoj de Pola Radio emisiataj en la periodo 1945-1950, kvankam inter la savitaj sondokumentoj troviĝas interparolo kun la gvidinta ilin Tadeusz Pleskaczynski.

2 Nova kapitro ekde 1959

Aparta kapitro entute en la historio de la esperantlingva radiofonio malfermigis lige kun la reinauguritaj en la Pola Radio Esperanto-elsendoj en la 1959-a jaro. La unuan fojon tiuj duonhoraj elsendoj estis premisitaj kaj envivigitaj kiel programoj ĉiutagaj, plurvocaj, enhavantaj la samajn

programerojn (inkluzive de la tn. kontaktoj) kiel la ceteraj nacilingvaj elsendoj en la poreksterlanda programo de Pola Radio.

2.1 La arkivado de la Esperanto-programoj de Pola Radio ekde la 4-a de aprilo 1959

La Esperanto-Redakcio ricevis la samajn rimedojn, pri kiuj disponis la aliaj redakcioj. Temis i.a. pri la eblo arkivi siajn elektitajn programojn. Evidente en la arkivo de Pola Radio la unuan lokon inter multaj aliaj havas tiu unua originala Esperanto-elsendo el la 4-a de aprilo 1959.

La arkivado ne apartenis tamen al la ciutaga praktiko. La bendoj estis reutiligataj, ts. post la likvido de la malnova programo ili ĵam puraj servis por nova registro de la programeroj. Cetere la tiamaj bendoj estis ne sole grandaj, sed ankaŭ multaj. Nome registro de la duonhora programo (76 cm/sek) postulis pli ol unu bendon. Tio postulis ankaŭ bretospaĉon. Estis do arkivataj elsendoj nur kun aparta valoro, ekzemple literaturaj, enhavantaj intervjuoj kun elstaraj gastoj ks. Kompreneble neniu havis la ideon arkivi la aktualajn programojn kun novaĵoj, komentarioj, spegulantaj la ciutagan politikan, ekonomian kaj socian vivon ne nur de Pollando, sed ankaŭ la mondo, pri kio amplekse informis la tiamaj redakciaj informjurnaloj kaj semajnfinaĵoj sonmagazinoj.

Kiam mi mem venis al la redakcio en ĝia 9-a ekzistojaro, ĝi laboris ĵam per novkvalitaj stilonaj bendoj kaj la registrado okazis laŭ la rapideco 38 cm/sek. Praktike tio signifis, ke por registro de unu duonhora elsendo sufiĉis unu bendo. En tiu periodo ĵam estis facile konstati, ke la malnovajn bendojn necesis trakti kun aparta zorgo. Ili estis simple tre fragilaj, sed tiam neniu havis la ideon alformi ilin al la rapideco 38 cm/sek per pli moderna bendokvalito. Komence pro tio, ke ekzistis grandaj radiaj magnetofonoj ebligantaj laŭplace uzi la rapidecon 78 cm/sek aŭ 38 cm/sek. Post la veno de novaj produktomagnetofonoj, kiuj ne plu registris laŭ 76 cm/sek, oni transformadis malnovajn surbendigojn, sed prefere laubezone, kiam oni volis reaŭdigi iun tre interesan malnovan arkivadon.

2.2 La klopodoj savi nesaveblajn

Preskaŭ ekde la komenco la redaktoroj okupigantaj pri la registrado de sonraportoj pri Esperanto-arangoj, intervjuoj kun elstaraj esperantistoj, klopodis konservi siajn registraĵojn por la propra, labora uzo aŭ reuzo, protektante ilin kontraŭ la detruo, ne povante tamen ilin arkivi oficiale. Do krom la sondokumentoj deponitaj en la arkivejo de PR ili disponis kvazaŭ pri propra ĉe-mana arkivo, konsciaj pri ofte enorma valoro de tiuj sonmaterialoj en laboro kun la esperantlingva publiko. Ne temis pri bobenaj (pli poste kasedaj) bendoj, sed pri registraĵoj kopiitaj al la radiobendoj. La tirkestoj kaj redakciaj srankoj estis plenaj de ili. Tiam redaktoroj ankoraŭ ne klopodis kolekti proprajn bobenformajn sonregistraĵojn kaj en la komenca periodo ankaŭ ne la kasedojn. Kasedoj estis multekostaj tiuepoke, oni multfoje uzis la saman kasedon por kelkaj diversaj surbendigoj. Nur en la mezo de la 80-aj jaroj la situacio sangigis tiomgrade, ke redaktoroj komencis konservi kasedojn kun la plej valoraj registraĵoj. Temis pri krudaj sondokumentoj, kiuj ankoraŭ ofte postulis prilaboron, te. muntadon. Estis preskaŭ tute maleble oficiale surbendigi ĵam disaŭdigitan elsendon el la radiobendo al kasedo, kaj se ĉe tio okazis tio estis sporada, postulanta ĉiukaze apartan permeson.

2.3 Detruo de la saĵne firme protektitaj

Sajnis tamen, ke la konservitaj en la arkivoj sonregistroj estas tute sekuraj. Tio evidentigis tute iluzia, kiam en la 70-aj jaroj iu nova direktoro de la poreksterlanda programo de unu tago al alia decidis dekumi la arkivaĵojn de la tuta poreksterlanda programo. Tiu decido ne evitis la Esperanto-redakcion, kiu cetere havis la plej ampleksan arkivejon, kiu nur en la daŭro de kelkaj tagoj devis simple forigi signifan parton de sia rica arkiva kolekto. Cetere la decido de tiu direktoro koncernis

ne sole la sonarkivon, sed ankaŭ korespondan arkivon, en kiu estis garditaj leteroj de la auskultantoj ekde la komenco de la ekzisto de la Redakcio. Leteroj do el tiu plej frua periodo fakte ne plu ekzistas (krom kelkaj esceptoj). Se temas pri la sondokumentoj la situacio estis iom pli favora. Guste pro la ekzisto de konservataj sondokumentoj gardataj de la unuopaj redaktoroj.

2.4 Dauraj klopodoj savi la plej valorajn sondokumentojn

Ekde tiu epizodo la konscio pri tio, ke nenio daŭras eterne, firme gravurigis en la konscio de la redaktoroj, kiuj ekde tiam ne sole gardis la proprajn registraĵojn sur la laboraj bendoj, sed ankaŭ klopodis konservi la originalajn kruddokumentojn (nemuntitajn) per kasedoj. Tutcerte iun malordon enkondukis la milita stato, en kies daŭro por 3 monatoj estis suspenditaj multaj programoj de la poreksterlanda programo (inkluzive esperantajn), sed principe la arkivoj kaj eĉ la tn. laboraj bendoj ĵurnalistaj ne estis damaĝitaj. Post tiu periodo la Esperanto-redakcio havis eĉ pli ampleksan programotempon kaj daŭris oficiala arkivado, same kiel protektado de la sonregistraĵoj aparte valoraj de unuopaj ĵurnalistoj.

La situacio denove farigis tre malfacila fine de la 90-a jaroj. Tiam laŭ decido de laŭvica nova direktoro de la poreksterlanda programo la redakcio perdis du kompetentajn redaktorojn kaj la estro de la redakcio subite petis emeritigon. Kiel heredajon li tamen lasis tri srankojn kun neordigitaj dokumentoj kaj sonbendoj. Tiuperiode la redakcio devis trifoje en la daŭro de kelkaj monatoj sangi siajn cambrojn kaj ne ekzistis fizikaj fortoj por klopodi savi la dokumentojn en orda maniero. Multan helpon en tiuj malfacilaj momentoj senavare donis la administracia fako de PR helpante protekti la rican redakcian havajon, inkluzive bendojn disponiginte kromsrankojn kaj deponejojn. La situacio estis tre malfacila, ĉar ne ekzistis la ebleco kasedigi tiujn materialojn en maniero oficiala, samtempe la redakcia stabo estis tiom malmultnombra, ke ne ekzistis fizikaj ebloj pensi pri tio. Pli poste, kiam la redakcio jam disponis pri necesaj teknikajoj por kasedigi sondokumentojn analogajn kaj ciferecajn, la daŭra modesteco de la homaj fortoj, manko de laborantoj kaj kunlaborantoj kapablaj tion fari, denove bremsis tiun laboron.

3 Tanisiro al la cifereca registrado kaj emisiado – tiuperiodaj sukcesoj kaj fiaskoj de la arkivado

La decido ciferigi la programon de la poreksterlanda programo de Pola Radio en la 2004-a jaro signas novan epokon en la arkivado de la programoj de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio. Komence la registrado de la programoj estis paralela. Tio signifas, ke oni ankoraŭ laboris samtempe per ciferecaj registraĵoj kaj analogaj. Analoge eblis ankoraŭ arkivi unuopajn elsendojn, sed la ciferecaj sondokumentoj trovigis en la interreta deponujo de la redakcio kun limigita kapacito. Sed ankaŭ ĉi-kaze pro limigita amplekso de la redakciaj sondokumentujoj plurfoje venadis decidoj pri tuja likvido de la sonregistraĵoj. Multaj sondokumentoj el la komenco de la cifereca epoko perdis ankaŭ pro relative oftaj sangoj en la sonprogramoj en la Pola Radio. Tamen tio koncernis ĉefe aktualajn elsendojn kaj ne materialojn kun dokumenta signifo por la Esperanto-komunumo. Tiuj plej ofte trovigis ankaŭ sur la laborkasedoj kaj labordiskoj, tiam jam en kontentiga kvanto trovigantaj en la dispono de redaktoroj. La privata savado de la sondokumentoj, kompreneble sen tiuj, kiuj koncernis la programojn ĉiutagajn: novaĵojn, komentariojn, felietonojn, havis jam firman praktikon. Ĉetere ekde la 2003-a jaro estas savitaj preskaŭ 100 procente ĉiuj skribitaj tekstoj de la redakcio kiel word-dokumentoj kun ĉiuj redaktaj notoj kaj korektoj.

4 La drameca savperiodo anticipanta la likvidon de la malnovformulaj Esperanto-elsendoj (15.12.2006)

Fruaŭtune 2006 venis la unuaj maltrankviligaj signaloj pri minacita ekzistodaŭro de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio post la ĵunia instaligo de la nova estraro de Pola Radio. Sendepende de la

normala redakcia aktivado tuj komencigis vera vetkuro kun la tempo, en kiu ni sukcesis savi 95-99 procentojn de la sondokumentoj el la tn. labora, ce-mana laborarkivo, el amaso da bendoj (inkluzive de tiuj lasitaj de la eksa estro de la redakcio). Temas pri interparoloj, intervjuoj, sonraportoj. Ciuj ci dokumentoj estis savitaj ciferece (kvankam ne en kohera formato) nun atendante pridokumenton.

5 Pri la aktuala arkivejo de Pola Radio

5.1 Ciferigitaj arkivaĵoj

Post la likvido de la malnovformula Esperanto-Redakcio de la poreksterlanda programo de Pola Radio (15.12.2006) ĝia arkivejo estis fermita por la novformula Esperanto-Redakcio, nun trovinta lokon en la informadika strukturo de Pola Radio Wolne Media '(Liberaj Komunikiloj). La arkivaĵoj estas ciferigitaj kaj ne estas disponeblaj por la uzo en la podkasta programo sub la preteksto de ne reguligita lega situacio rilate la utiligon de la malnovaj radiaj registraĵoj por la interreta emisiado. Temas pri aŭtoraj rajtoj.

5.2 Savitaj, savataj sondokumentoj; la aktualaj sonregistraĵoj

La savitaj sondokumentoj (raportoj, interparoloj, literaturaj elsendoj, iuj malnovaj arkivaj programoj) kaj daŭre savataj (el la amaso de analogaj bendoj, ankoraŭ ne ciferigitaj) estas nun konservitaj private sur la diskoj DVD. Sammaniere estas savataj ĉiuj novaj sonraportoj, intervjuoj, interparoloj, felietonoj el la ciklo 'Ni invitas al Pollando' ekskluzive de aktualaj programeroj. Sammaniere estas savitaj en eta parto la sondokumentoj kolektataj sisteme en la Radioarkivo de *Redd Scott* kaj en Esperanto-retradio de *Anton Oberndorfer*. Bedaŭrinde ĉiuj ajn klopodoj reakiri la kolektitajn de ili sonmanierojn restis senechaj.

5.3 Kelkaj entreprenendaj taskoj.

Al la estontaj entreprenendaj taskoj apartenas:

- ordigo kaj sistemigo de la savitaj sonregistraĵoj el la laborkolektoj de la malnovformula Esperanto-Redakcio de Pola Radio
- ciferecigo de la privataj registroj nun trovigantaj sur analogaj kasedoj, ciferecaj kasedoj kaj minidiskoj
- lanco de la kampanjo cele reakiron, rekolekton de la registraĵoj farataj dum jardekoj de niaj aŭskultantoj.

Pluraj esperantistoj disponas nome pri ĉi-specaj kolektoj (surbendigataj per radioaparatoj, satelito, interreto) pli aŭ malpli grandaj. Iliaj sonbendaj kolektoj povas enhavi ĝuste elsendojn kaj elsenderojn neniam konservitajn de la redakcio mem (novajoj, politikaj komentarioj); povas esti, ke trovigas inter ili ĉerletoj ĉaptitaj varmmomente kaj en redakcio ne konservitaj pro misdecidoj, teknikaj eraroj ks.

Jen kelkaj el la taskoj. Ĉiukaze tute certe temas pri la tn. formika laboro, kiun necesos tamen iumomente entrepreni.

Autoroj

MAREK BLAHU (Rudy Kubícka 1002, CZ-68605 Uherské Hradiště, marek@blahus.cz), Bc., studento pri aplikata informadiko (specialigo pri komputila lingvistiko) ce la Masaryk-Universitato en Brno, Cehio, krome generala sekretario de E@I kaj prezidanto de la Ceha Esperanto-Junularo.

DETLEV BLANKE (Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, detlev@blanke-info.de), Dr.sc.phil., estis sekretario de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (1970-1990), docento pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato (1988-2007), ekde 1991 prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.(GIL), estrarano de CED.

CHRISTIAN CIMPA (Österreichische Nationalbibliothek, Josefplatz 1, AT-1015 Wien christian.cimpa@onb.ac.at), studis pedagogion, kvalifikigis al bibliotekisto, ekde 1990 laboras en la Kolekto Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de Austria Nacia Biblioteko.

REINHARD HAUPENTHAL (La Saousse, F-84340 Malaucène, IRHaupenthal@aol.com) studis germanistikon kaj katolikan teologion en la universitato de Saarbrücken (D), kie li estis instru-komisiito por esperantologio kaj interlingvistiko (1968-1993). De 1999 li vivas en Provenco kaj aktivas kiel esperantologo, interlingvisto (volapükologo), tradukisto kaj agri-kulturisto.

UTHO MAIER (Dewanger Str. 19, DE-73434 Aalen, utho.maier@htw-aalen.de), diplom-teologo kaj diplomingeniero (elektroniko kaj informad-teknologio), dumviva membro de A.I.S., kunlaboranto de la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen ekde 1989, kaj ties direktoro ekde 2004.

MIROSLAV MALOVEC (Bosono sňá 15/10, CZ-625 00 Brno, malovec@volny.cz), laboris en fabriko kiel kontrolisto de teknikaj desegnoj laŭ normoj, nun vendisto de teknikaj, redaktoro de Ŝtarto, „verkis pri esperantologiaj kaj sciencaplikaj temoj, tradukis beletron, redaktis kaj alimaniere partoprenis ce preparo de pluraj eldonadoj de la eldonejo KAVA-PECH.

ÁRPÁD MÁTHÉ (Tusnádi u. 14, HU-1125 Budapest, mathe.arpad@interware.hu), kemiisto, doktoro de natursciencoj, emerita docento de Universitato ELTE, kunautoro de du instru-kajeroj pri literaturo de Esperanto en ELTE (1975-1976, lekciisto pri historio kaj movado de Esperanto kaj prizorganto de la esperantologia biblioteko de la Filologia Fakultato de ELTE. Esperantisto de 1956, iama redaktoro de Budapesta Informilo (1975-1987) kaj Periodaĵoj (1992-1995), kunredaktoro de la aperonta Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto.

HERBERT MAYER (Österreichische Nationalbibliothek, Josefplatz 1, AT-1015 Wien herbert.mayer@onb.ac.at), filologo kaj bibliotekisto, direktoro de la Kolekto Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo ce Austria Nacia Biblioteko, Vieno.

BARBARA PIETRZAK (str. Miedzynarodowa 38/40a m 217, PL-039 22 Warszawa, bpietrzak@onet.eu), ekde 1968 jaro ligita kun la Esperanto-Redakcio de Pola Radio, kiel redaktoro, ĵurnalisto, publicisto kaj fine estro de la redakcio; en la daŭro de la redakcia laboro okupiganta pri la originala verkado, tradukado, raportado, intervjuado, regisorado kaj prezentado de la varsoviaj Esperanto-elsendoj. Post la likvido de la malnovformulaj Esperanto-elsendoj daŭre kunlaboranta kun la redakcio. Nun Generala Sekretario de UEA, estrarano pri informado, membro de Akademio de Esperanto.

KARL-HEINZ SCHAEFFER (Schulstr. 17, DE-73432 Aalen, kh.schaeffer@t-online.de), apotekisto, dumviva subtena membro de A.I.S., afergvidanto de la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen (ekde 1989).